

EN

# Popola Ĉinio

人民中國報道

3 · 1963



# Sur la Vojo de Kolektiviĝo

Fotoj de Vang De kaj Sun Ifu


Antaŭ dek jaroj, naskiĝis la (elementa) Gianming-a Agrikultura Kooperativo en la malriĉa vilaĝo Hipu de Zunhua-gubernio, Hepej-provinco. Am el la pli ol du mil familioj de la vilaĝo kelkint vivtenis sin laborante kiel dungitaj kamuloj, kaj pli ol du cent familioj almozadis.

Post la aŭtuno de 1952 Vang Guofan, kompartiano kaj malriĉa kamparano, kaj du malriĉaj milioj iniciatis fondiĝon de kooperativo, kiun artoprenis nur 23 malriĉaj familioj. Je 1954 efektiviĝis kooperativigo de la vilaĝo. En 1956 la kooperativo kaj tiuj de aliaj 3 vilaĝoj unuiĝis en tigradan agrikulturan kooperativon. Kaj post la aŭtuno de 1958 tiaj kelkaj kooperativoj organiziĝis en la Gianming-an Popolan Komunumon.

Nun la Komunumo havas siajn akvorezevejon, tobrigadon, traktor-brigadon, kaŭĉuk-radajn turilojn, 67 bovojn, ĉevalojn kaj azenojn, pli ol 100 ŝafojn, kaj la propraĵoj de la komunumo loras pli ol 960,000 juanojn.

Ĝia agrikultura produktado ankaŭ ricevis andan disvolvon. Dum la 3 jaroj de elementa kooperativo ĉiujare ĉiu muo da tero produktis 250 juanojn da greno, dum la 3 jaroj de altgrada kooperativo la produktkvanto altiĝis ĝis 475 ĝinoj, kaj post la fondiĝo de la komunumo, malgraŭ sekego de la lastaj jaroj, jara produktkvanto de ĉiu muo atingis 585 ĝinojn. Antaŭ dek jaroj la vilaĝo Hipu ĉiujare bezonis liveron de 50,000 ĝinoj da greno de la ŝtato, sed ĝi vendis pli ol 118,000 ĝinojn da greno al la ŝtato en la lasta jaro sola, krom pli ol 100,000 ĝinoj por rezervo.

Kiam kamparanoj de la vilaĝo Hipu celebris dekjaran datrevenon sur la vojo de kolektiviĝo, rigardas al estontecon kun plena memfido.



Ĉefo de la Gianming-a Popola Komunumo, Vang Guofan kaj la azeno, kies 3 kvaronoj estis la sola posedaĵo de la kooperativo ĉe ĝia fondiĝo.



Hodiaŭ la komunumo jam havas sian aŭtobrigadon.

La komunuma akvorezevejo, kiu kapablas rezervi 3,400,000 kubmetrojn da akvo kaj irigacii pli ol 4,000 muojn da tero.





# Agronomio en Ĉinio

DE GIN ŜANBAŬ

LA VIC-DIREKTORO DE LA ĈINA AGRONOMIA AKADEMIO

**D**UM la pasintaj dek tri jaroj multe floris la ĉina agronomio. Post la Liberigo en 1949, sintezaj agronomiaj institutoj fondiĝis unu post alia en la sep regionoj de la lando. En ĉiuj provincoj estis starigitaj ankaŭ eksperimentaj institucioj (aŭ stacioj) de agrikulturo, kaj plie fondiĝis la Ĉina Agronomia Akademio kaj sub ĝi la bazaj esploraj institutoj de agronomio. Nun jam fondiĝis sinteza agronomia akademio aŭ filio de tia eĉ en Hingiang, Tibeto, Kinghaj, Ninghia kaj aliaj provincoj, kie neniam antaŭe ekzistis agronomiaj institucioj. Eĉ en multaj subaj administrataj unuoj—gubernioj kaj pligrandaj ŝtataj farmejoj oni establis ĉe si instituciojn de agrikultura scienco. La edukado de agronomiaj laborantoj en pli ol tridek altlernejoj de agrikulturo tra la tuta lando liveris al tiuj esploraj institucioj ĉiam pli fortajn kaj grandajn vicojn da agronomiaj laborantoj.

Tiuj institucioj de scienca esplorado koncentrigas unue siajn fortojn al studo de la ĉefaj problemoj pri la disvolvo de la agrikultura produkto en Ĉinio, kaj jam multe atingis en siaj klopodoj.

Disvastigo de bonaj specioj de plantaĵoj estas unu el la gravaj paŝoj faritaj por pliiĝi la produktadon de la ĉina agrikulturo en la lastaj jaroj. Por tio ĉi, la diversrangaj agronomiaj institutoj en la lando per la tuta forto faris sistemajn enketadon, kolektaĵon, esploradojn kaj ordigon de specioj de la plantaĵoj. El la 180 mil raportoj pri specioj de 25 plan-

*Daj Hong, vicestro de la Ŝanhaja Agrikultura Akademio kun sia asistanto ekzamenas la grundon.*

*Foto de Vang Zigin*



*Ĉinaj sciencistoj jam sukcesis en bredado de oraj abeletoj (*Tlatyedra gossyierra* Saunders) por ekstermi ruĝajn kotonfruktajn vermojn (*Drachys cavus* Walker). Jen teknikistino observas ovojn de oraj abeletoj sur kokonoj de ruĝaj kotonfruktaj vermoj.*

*Foto de Vang Zigin*

tajoj, oni elektis multajn bonajn speciojn por disvastigi en la devenloko. Laŭ nekompeta statistiko, ekde 1958 la kulturitaj novaj specoj atingis 487, ilia produkto ĝenerale pliiĝis je 10—40%.

Ankaŭ la selektado de dombestoj kaj la prevento de plantmalsanoj kaj la malutilaj insektoj estas la ĉefaj objektoj de ilia esplorado. Oni studis 256 speciojn de dombestoj kaj dombirdoj, kaj ekspertize trovis 148 bonajn





*Sun Kiaŭmej, observantino de meteorologia stacio de Luŝi-gubernio, Henan-provinco ekzamenas ventorapidecon.*  
Foto de Ĝang Kingjun

speciojn por ilin disvastigi. La akrido estis granda malutilo en la historio de la ĉina agrikulturo. Laŭ la historia registro, dum pli ol 2,600 jaroj en Ĉinio okazis pli ol 800 fojoj de akridaj katastrofoj. De 1942 ĝis 1944 en kelkaj provincoj de norda Ĉinio kie okazis tiu katastrofo, la kamparanoj, kiuj perdis vivrimedon kaj devis rifuĝi, sin nombris ĝis

kelkaj milionoj. Nun, post esplorado de agronomiaj laborantoj en la akridkatastrofaj zonoj oni jam adoptis la metodon de apliko de ĥemiaĵoj, kombinita kun reformo de la natura fizionomio de la loko. La totala areo de akridaj zonoj en la tuta lando reduktiĝis jam de pli ol 80 milionoj da muoj\* antaŭ la Liberiĝo ĝis 30 milionoj da muoj. Povas esti dirite, ke oni jam ĝenerale povas subjungi la akridan katastrofon.

La fabrikado de agrikulturaj drogoj kaj reformado de diversaj agrikulturaj instrumentoj estas novaj esplorobjektoj en la ĉina agronomio antaŭe neglektitaj kaj iom post iom disvolvitaj nur post la Liberiĝo. Nun la specoj de agrikulturaj drogoj produktataj en Ĉinio nombriĝas ĝis pli ol cent. Kelkaj specoj de traktoroj post sukcesa provado jam produktiĝas pogrande. Estas disvastigataj en orienta kaj nordokcidenta Ĉinio la montkampaj kaj rizkampaj plugiloj respondaj al la lokaj bezonoj de la respektivaj regionoj. Precipe la invento de la riztransplantilo kaj akvokampa kablotrema maŝino havas tre gravan signifon en mekanikigo de rizkampaj laboroj.

Krom rikolto de multaj sukcesoj en la ordinaraĵ studobjektoj, kiaj prevento de la epidemioj de dombestoj kaj -birdoj, kulturado de plantajoj, sterkado, la mastrumado de fruktaroj kaj legomoj, la agrikultura irigaciado, kulturado de silkraŭpoj kaj morusujoj, abelbredado ktp, la fakoj kiuj mankis aŭ estis ekstreme malfortaj en la pasinteco, kiaj utiligo de atomenergio en la agrikulturo, la agrikultura meteorologio, la agrikulturaj mikrobiologio, biofiziko kaj bioĥemio k.a. estas starigitaj, plivastigitaj kaj plifortigitaj unuj post la aliaj. La ĉinaj agronomiaj laborantoj estas multe ĝoje ekscititaj de la fakto ke la fruktoj de ilia esplorado helpas al la patrolanda socialisma konstruado kiu prenas "agrikulturon kiel la bazon", kaj tio siaflanke akcelas la plian disvolvon de esploraj laboroj de la agronomio.

\* 1 muo = 1/15 hektaro.

**FENG GIANNAN:**

## Ĝojego en Printempa Festo

(Notoj pri Gianming-popolkomunumo)

**G**IANMING-POPOLKOMUNUMO, kiun oni nomis antaŭ dek jaroj la kooperativo de mizeruloj, nun posedas jam siajn mulojn, ĉevalojn, ŝarĝaŭtojn, traktorojn, kaj fariĝis komunumo kun ĉiuj familioj en bonstato. Ĉi-sube mi ne priskribos pri la gaja atmosfero de la tuta komunumo dum la Printempa Festo de tiu ĉi jaro, sed sole pri la duobla ĝojo de ĝiaj anoj, la fratoj Vang Ĵong kaj Vang Ŝeng. Temas pri la hejmvreveno de la 78-jara patrino de la du maljunaj fratoj post tridekjara disiĝo por ĝui vivofeliĉon en la maljuneco.

Antaŭ la Liberiĝo la patrino kaj filoj vivis el laborado por bienuloj kaj almozpedito: En la komenco la patrino pene laboris kaj petis almozojn kunportante siajn infanojn, kaj poste la filoj laboregis kaj almozis, kun sia patrino subtenata de la filoj. Kiel malfacile estis eĉ por akiri duonbovlon da manĝo-restaĵo en tia dezerteca loko! La familio disiĝis, — ne povis ne disiĝi pro la senespera situacio. Dum la vidvina patrino devis denove edziniĝi al iu en la monta vilaĝeto kelkdekajn liojn for de la hejma vilaĝo.



Reveninte al sia malnova hejmo, kiun ŝi forlasis antaŭ pli ol tridek jaroj, en ŝia koro estis miksitaj ĝojo kaj doloro. Nun ŝi revenis kaj fariĝis avino kun filoj kaj multaj genepoj antaŭ si. Loĝante ĉe la filoj, ŝajnas ke ŝi ekvivas en la "paradizo".

La domo de Vang Ĵong, la pliaĝa filo, situas ĉe la suda flanko de la vilaĝa strato. Ĝi konsistas el vico da ĉambroj kun korto; la loĝejo estas sufiĉe oportuna kaj bone orientita.

"Panjo, kiam la kooperativo estis organizata antaŭ dek jaroj, la plena kunveno okazis ĝuste ĉi-tie." diris la filio kun kontento. Kaj ankaŭ la patrino dividis kun li la gloron.

La ŝrankoj estas tiel ruĝaj kaj brilaj. La terlito\* tiel komforta kaj varma kun litajoj dikaj kaj molaj. La elektraj lampoj tiel lumaj. Kaj la radio tiel oreflata belsona. . . .

"En kiu el miaj antaŭaj vivoj mi faris tiom da bono, ke mi nun fariĝas feliĉa en maljuna aĝo?" murmuretis al si la patrino.

La plejaĝa nepo estas kapabla laboranto kaj elektita kiel estro de la tria produkta brigado. "Ne estas facile mastrumi tiel grandan bienon!" ĝoje rimarkis la avino.

Estis ankaŭ alia afero de ĝojego: la dua nepo ankaŭ prenis edzinon. Vang Ĵong diris antaŭ lia edziĝo: "Ni malriĉuloj estas nun emancipiĝintaj. Kial ne iom elspezi, kiam estas necese. Por la festo, ni devas buĉi porkon, prepari vinon kaj inviti gastojn. Ni ja havas grenprovizon, grasajn porkojn, monon en ŝparkaso." Sed la estro de la komunumo diris al la nova edzo: "Viaj patro kaj patrino geedziĝis siatempe en iu kaduka templo. Ni, anoj de la kooperativo de mizeruloj estu ŝparemaj kaj prefere ne festu lukse!" Tiu penso plaĉis al la avino kaj ŝi diris al la nova bonepino: "Oni ne devas forgesi la suferojn en pasinteco. . . ." Kun ĝojo en la koro ŝi manĝegis la nov-edzinon de la nepo per la rigardo.

La avino kelktempe loĝis en la domo de la pliaĝa filo, kaj alitempe ĉe la dua filo.

La domo de la lasta situas ĉe la norda flanko de la vilaĝa strato. Lia loĝloko estas bone konata en la popolkomunumo.

Antaŭ la Liberiĝo, tiu ĉi loko estis la draŝejo de bienulo, en ĝia oriento estis kabanaĉo por loĝigi lian kamplaboriston. Kaj tie iam vivis Vang Ŝeng kun sia edzino, kiel jarlaborulo por la bienulo. Kia mizera ŝirmejo ĝi estas! La pajla tegmento jam putriĝis, la muroj formitaj el krudaj ŝtonoj apenaŭ restas starantaj, kaj dum someraj ŝtormoj la geedzoj devis subteni la tegmenton per stangoj. Ĝi ne povas ilin ŝirmi kontraŭ ventoj kaj neĝo en la vintro. Sed ili vivis, jaron post jaro, en tiu kabanaĉo, kie oni "eĉ ne povas vivteni musojn". Kaj iliaj infanoj ankaŭ tie naskiĝis kaj kreskadis.

Oni konservis la kadukan kabanon en ĝia originala aspekto. Ĝi fariĝis nun grava parto en la domo de Vang Ŝeng.

Ekvidinte la kabanaĉon, la avino iluziiĝis kvazaŭ ŝi revenis en la mondon de mizero jam pasintan.

"Ve," la avino diris, forviŝante siajn larmojn, "kial vi konservas la kabanaĉon? Prefere malkonstruu ĝin?"


"Estas la estro, kiu tion malkonsilas!" diris la geedzoj Vang Ŝeng. "La estro tamen pravas. Tiu kabano ja estas viva lernigilo! Vidu, panjo, kaduka kabanaĉo apud nova domo! Tio estas bona 'kontrasto'."

Kia kontrasto tio estas! En la loĝjetereno de Vang Ŝeng, tuj apud la kabanaĉo, staras nova domo el kvin ĉambroj kun bazo el blujaj ŝtonoj kaj muroj el blankaj ŝtonoj kaj la fenestroj estas vitraj. . . . Sidante sur la terlito sin apogante sur litajo, la avino povis vidi la kabanon tra la fenestro. Ŝi sidis sur la lito, ridetante kaj kune kun sia filo kaj bofilino alparolante la vizitantojn.

La dua filo, precipe lia edzino, havas tre multon por diri al la gastoj pri la historio de la nova kaj malnova domoj.

*En la loĝjetereno de Vang Ŝeng, tuj apud la kabanaĉo, staras nova domo el kvin ĉambroj.*

*Foto de Song Hjueguang*



“Oni eĉ venis el Ŝanhajo por nin filmi,” ŝi diris, “ni vestis nin per la antaŭe uzitaj, ĉifonaj vestoj, kaj prenis enmane niajn kukurbobovlojn, ladajn ujojn kiujn ni uzis siatempe en almozetado.”

La avino kapjesis, dirante: “Oni neniam forgesu la pasintajn suferojn!”

Vang Ŝeng ne ŝatas aĉeti meblojn aŭ novajn objektojn. Li ĉiam deponis sian monon en la bankon. Sed antaŭ la Printempa Festo de la kuranta jaro, por celebri la revenon de la patrino, li speciale tapetigis la plafonon, rekalkis la murojn kaj ornamis per novjara bildo kaj murornamaj pendaĵoj, kaj instalis “parolkeston”† por amuzi sian patrinon.

Ŝi rigardis la nove plibeligitajn ĉambrojn kun novjaraj bildoj, la kvar grasajn porkojn ekster la pordo, kaj kokinojn ĉie kurantajn en la korto, la faskojn de grandaj orkoloraj maizspikoj, laŭvice pendantajn sub la tegmentrando. Ŝi diris kun ĝojo: “Tiom bela estas la vivo hodiaŭa!”

“Ĉio ĉi ni ŝuldas al nia Prezidanto Maŭ,” diris Vang Ŝeng.

“Estas Prezidanto Maŭ, kiu reunuigis nian karnon kaj oston\*\*,” aldonis lia edzino.

Jes, estas vere ke la patrino de Vang Ĵong kaj Vang Ŝeng estas feliĉa, kaj ke la feliĉon ŝi ŝuldas al Prezidanto Maŭ! Tiel pensas la tuta anaro de Gianming-komunumo.

\* Hejtebla masonaĵo servanta kiel lito uzata de ĉinoj en nordaj provincoj.

† Radioricevilo.

\*\* Aludo pri reunuiĝo de disigita familio.

En la hejmo de najbaro de Vang Ŝeng.

Foto de Vang De kaj Sun Ifu



ĈEN JAŬ FENG:

# Novedzina

**S**UR la draŝejo grupo da senzorgaj junulinoj ridis kaj kantis kun ĝojo en la lumo de la luno. Unuj kantetis novajn filmkantojn dum aliaj kantis fragmentojn el la Kantonaj operoj popularaj en la loko.

Tie staris Gujĵing en vesto kun ruĝaj floroj sur fono blanka. Ŝi ektuŝis per ŝultro sian najbarinon, dirante: “Pro kio vi ĉiam nur ‘nombras viajn piedfingrojn’ kaj ne kuraĝas eĉ eklevi vian kapon!” La alparolito estis des pli embarasita de la vortoj. Ŝi estis nove edzinigita antaŭ nelonge kaj por la unua fojo ŝi partoprenis en tia Novedzina Kunveno. Ŝia aspektis hodiaŭ eksterordinare singena. Ŝia embarasiĝo vekis simpatian de alia virino, kiu rebatis la provokon de Gujĵing:

“Gujĵing! Kiel vi kuraĝas moki alian! Memoru, kiam vi la unuan fojon partoprenis la kunvenon, oni eĉ devis tiri vin el via domo!”

“Efektive! Moki la nigrecon de aliaj la korvoj bone scias, sed pri si mem ili ne konscias!” diris iu virino.

“Nu! Gujĵing ja ne volis ne alveni, ŝi nur volis peti la konsilon de sia karulo, ĉu decas partopreni la kunvenon! Tiel oni ja devas esti inter bonaj geedzoj interkonsiliĝantaj ĉiam unu kun la alia!” aldonis alia virino.

Pro tiuj vortoj eksplodis en la kunvenejo gaja ridego. . . .

Rimarkinte ke preskaŭ ĉiuj sin turnas al ŝi kun moksercemo, Gujĵing diris embarasite kaj haste: “Hej! . . . Mi ja ĝuste ne parolas kun vi!”

“Jen! Bone! Ni komencu la kunvenon!” diris Ĝang Jujing, la estrino de la produkta brigado. Ŝi movis sian tabureton apud la virinon, kiu silentis ĝis nun, kvazaŭ pliaĝa fratino al sia juna fratinetino. La kunvenejo iom-post-iome kvietigis.

“Antaŭe, kiam regis la feŭdismaj moroj, la novedzino devis surgenui por saluti la Ĉielon kaj Teron,” komencis la estrino, “nun ni jam forjetis tian moron kaj anstataŭe okazigas la Novedzinan Kunvenon por festi kaj interkonatiĝi. Ĉu bone?”

“Bone! Tre bone!” Varme aplaudis ĉiuj.

“Mi proponas ke la novedzino unue rakontu al ni, kiel ŝi elektis por si la novedzon!” iu intermetis.

“Vi longlangulino! La prezidanto ankoraŭ ne finis sian parolon kaj vi jam denove volas veki



# Kunveno

tumulton!” unu virino donis pugno baton al la petolinto.

“Ŝs! . . .” Kvieto regis denove en la kunvenejo.

“Nu, mi iom parolu unue,” daŭrigis la estrino, “la produkto de nia brigado fariĝas tagon post tago ĉiam pli abunda kaj nia vivo pli kaj pli feliĉa. En la kuranta jaro estas jam akceptitaj kvin novedzinoj. Mi aŭdis de mia patro ke ekde King-dinastio ĝis Kuomingtango li ne vidis en ĉi tiu vilaĝo ke oni havas 5-6 geedziĝajn festojn en unu jaro.”

Tiam la patrino de la estrino interjetis el la ĉambro: “Ĉu vi ne aŭdis de onklo Liu ke li povis edziĝi kun la onklino nur en sia 44-a jaro!”

La kunveno iris en plene ĝoja atmosfero. Oni konigis al la novedzino la nunan staton de la brigado kaj laŭdis la vivmanieron de la modelaj geedzoj Ĝang Ĵujguj kaj Ĝou Lanĵing. La paro ĉiumonate superplenumas la asignitajn al ili taskojn kaj jam plurfoje estis distingitaj kiel “bonaj komunumanoj”. Ili bone scias, kiel diligente kaj ekonomie mastrumi sian domon kaj vivas en bonstato. Ili bredas ĉiam du-tri porkojn kaj dekojn da kortbirdoj, kaj krome ili havas bonhavan de pli ol cent juanoj en la ŝparkaso. . . .

Pri la modela paro preskaŭ ĉiuj havas ion por prilauĉi. Iu diris ke Ĝang Ĵujguj dum laborado prenas sur sin ĉiam la pezajn taskojn. Kaj Ĝou Lanĵing estas eĉ pli fervora por irigacii la kampojn per vespera funkciigo de akvolevigilo dum sekeco kaj sin anoncis la unua. Kaj ĉiuj esprimis sian pretecon lerni la ekzemplon de la paro.

Post tio la parolo returniĝis al la novedzino. La estrino zorgeme demandis ŝin: “Ĉu vi renkontas ian malfacilon post edziniĝo?” La demando iom ĝenis la novedzinon. Ŝi senforte klinis la kapon kaj dolĉe ridis. La virino apud ŝi intermetis: “Ŝi estis bona komunumanino jam en sia gepatra domo, kaj kunportas al la edza domo sian ŝparmonon de kelkdek juanoj el sia salaĵro!”

En la kunvenejo estis neinvitita ĉeestanto — la pli ol 50-jara avino Liaŭ, kiu havis nefermeblan buŝon. Dum sia edziniĝo ŝi venis el la domo de sia edzo plorante. Ŝi ne povis ne esti tuŝita, vidante ke hodiaŭ la novedzino estas en tiel senĝena kaj agrabla medio. Ne haltigeble ŝi rakontis pri sia edziniĝo, dirante: “En la pasinteco kiam la novedzino venis en domon de la edzo, oni lokis sur la planko de nov-

geedza ĉambro grandan *boĝi-on\**, en kiu estis enmetitaj tabureto, dekalitro da greno, spegulo, tondilo, mezurilo kaj ducent moneroj. La novedzino devis sidi sur la tabureto dum la tuta nokto. Vera turmento! Laŭ la bopatrino tio signifas ke la novedzino devas observi la edzinan moralon, ŝpareme elspezi monon kaj konsumi grenon, kaj diligente lerni la kudradon. Ne estis pensebla la vivmaniero, kian vi nun havas!”

“Avino! Vi scipovas kanti. Ĉu vi ne volas nin amuzi per unu kanto?” proponis junulino.

*Ilustraĵo de Huang Ĝonggjun*



La avino kaj mansvingis kaj kapskuis. Ŝi forte rifuzis: "Miaj kantoj jam delonge elmodiĝis."

Sed persiste petis ankaŭ aliaj: "Kantu almenaŭ unu kanton! Ne gravas, eĉ se ĝi estas eksmoda!"

Ĉar ĉiuj petis, la avino fine ekkantis:

*Estas trezor' en patra domo ĉiu junulino.*

*Ĉe preta tablo ŝi frandaĵojn elektas laŭ plaĉo.*

*Sed fariĝinte iutage ies bofilino,*

*Manŭ' ĉe l' forn' ŝi devas kvazaŭ mizera kataĉo.*

Apenaŭ ĉesis la kantado de la avino, tie jam eksplodis foje kaj refoje gajaj ridoj. . . . kaj kiom konataj la ridoj! Tiaj preskaŭ ĉie estas aŭdeblaj en la nuntempaj vilaĝoj de Ĉinio.

\* Plata ujo por ventumi grenon.

ĜANG ĜIKING, ĈEN TANKIANG:

## La Printempa Foiro en Pekino

LA foiro de Ĉangdian en Pekino, okazanta ĉiujare, dum la periodo de Printempa Festo\* estas loko plej vizitata de Pekinanoj en tiuj tagoj. Ambaŭflanke de la strato tri liojn longa ekster la Paco-pordego, dense staras du vicoj da budoj bele ornamitaj, kun koloraj flagoj flirtantaj en la aero. Homoj tie svarmas, interfrotante al si la ŝultrojn kaj ektuŝante la kalkanumon de aliaj, iuj subtenante maljunulojn kaj aliaj portante infanojn. Iuj infanoj tenas en sia mano sukerumitajn fruktojn 2-3 futojn longajn aŭ paperajn ventoradetojn turniĝante klakantajn kontraŭ la vento, aliaj ludas per balonoj aŭ tenas paperajn lanternojn en la formo de diversaj figuroj. Ĉiuj radiis de ĝojo kaj kontento.

Tiu ĉi foiro havas apartan lokan karakteron. Pli ol sep cent bunte ornamitaj budoj, starigitaj de famaj ŝtataj magazenoj, butikoj kaj metiindustriaj koope-

*"Ankaŭ mi volas grapolojn da sukerumitaj fruktoj."*

*Foto de Aŭ Enhong*



rativoj en Pekino, provizitaj per miloj da var-specoj. Oni povas aĉeti ĉi tie tradiciajn frandaĵojn, festajn ludilojn kaj ĉiutagajn necesajojn.

Preskaŭ ĉiuj vizitantoj al Ĉangdian-foiro volas aĉeti iajn manĝaĵojn kun la loka gusto de Pekino, kiaj *juansjaŭ*-oj<sup>†</sup>, *ajvovo*-oj<sup>‡</sup>, ktp. Oni kunportas ilin hejmen por ĝui kune kun siaj familianoj. Dum la unuaj dek tagoj ekde la 1-a ĝis 10-a de la unua monato en la nova jaro laŭ la luna kalendaro de Ĉinio la vizitantoj jam aĉetis de la Foiro 2,500,000 *ajvovo*-ojn kaj *juansjaŭ*-ojn, kaj 1,600,000 longajn kaj mallongajn sukerumitajn fruktojn. Oni ankaŭ povas havigi al si aliajn frandaĵojn, kiaj konfitaĵo, sudprovincaj dolĉaĵoj, sukeritaj sojfaboj, piz-kaĉo, k.m.a. La komuna karakterizaĵo de ĉi tiuj manĝaĵoj estas malkareco kaj bongusto.

En norda Ĉinio, kie la klimato estas kompare seka kaj malvarma, homoj speciale amas fruktojn. En Ĉangdian-foiro troviĝas kelkdek fruktobudoj por kontentigi la bezonon de la vizitantoj. Estas haveblaj ĉi tie oranĝoj el Siĉuan, sukerkanoj el Guangdong, pomoj el Liaŭning, akvokaŝtanoj el Ĝegiang. Sed la fruktoj plej grandkvante liverataj tie estas ruĝaj kra- tago-fruktoj, persimonoj (*diospyros*), pekinaj blankaj piroj, ktp. Ekde majo, 1962 mezcifere 220,000 kilogramoj da fruktoj estis venditaj ĉiutage en Pekino. Dum la Printempa Festo pli abundaj estas la fruktoj en Ĉangdian-foiro ol antaŭe.

La nombro kaj specoj de ludiloj en la Foiro estas malfacile kalkuleblaj. Infanoj amasiĝas ĉirkaŭ la budoj de paperaj ventoradetoj, diabloj, kajtoj, balonoj, karuselaj lanternoj, per kiuj la etuloj estas preskaŭ sorĉitaj. Ĉe la budo de ludiloj estis multe vendataj ankaŭ lignaj sabroj, spadoj kaj lancoj, paperaj maskoj, famaj argilaj figuretoj el Vuhi, kaj





Homa torento al Ĉangdian-foiro.

Foto de Aŭ Enhong


porcelanaj ludiloj el Gingdeĝeng. Inter la svarmaj vizitantoj troviĝas de tempo al tempo knaboj, kiuj portas maskon de Simio-reĝo kaj tenas en mano orumitan bastonon ŝajnigante sin Simio-reĝo en "ribelo en la ĉiela palaco". Kelkaj knaboj kun ronda kapo kaj grandaj oreloj pendigas sur sia kolo ĉenon de ruĝaj kratagofruktoj, kvazaŭ juna bonzo portanta rozarion.

La paststatua knedisto Lang, ŝatata de la infanoj, per siaj lertaj manoj improvize faras por la junaj klientoj belformajn geheroojn el la historiaj rakontoj. En alia budo la metiartisto Ji Ĝengven el Hunan-provinco per palmofolioj elplektas vivsimilajn serpentojn, fiŝojn, insektojn, drakojn, kiuj kvazaŭ eknaĝos, saltos aŭ flugos. Ilia lerteco estis laŭdata de la rigardantoj.

Kompareble belaj kiel tiuj ludiloj estas la specialaj metiartaĵoj de la ĉefurbo kaj diversaj lokoj en la lando. Krom la famaj skulptaĵoj el eburo, artefaritaj floroj el veluro, klozoneoj, ĉi tie estas haveblaj ankaŭ la tondiloj el Hangĝoŭ, kombiloj el Ĉangĝoŭ, fajencaj tekruĉoj el Jihing, lakitaj manĝobastonetoj el Fuĝoŭ, kanoplektaj korboj el Guangdong,

promenbastonoj el Siĉuan, ktp. La budoj de belskribaĵoj, pentraĵoj, antikvaĵoj konstante altiras maljunulojn en la aĝo de pli ol 50 jaroj. Ili aĉetis pli ol 400 pentraĵojn kaj manskribaĵojn de modernaj kaj antikvaj majstroj.

En la Foiro estis vendataj pli ol 180 specoj da presitaj nacistilaj novjaraj pentraĵoj, kiuj estas ŝataj de multaj vizitantoj, ekz. la bildo "Ni Arde Amas Prezidanton Maŭ", "Kun Prezidanto Maŭ", kaj aliaj pentraĵoj, kiuj simbolas la prosperon de nia patrolando. Ili estis rapide elvenditaj tuj post kiam ili estis elpendigitaj. La vizitantoj al Ĉangdian-foiro ankaŭ interesiĝas pri libroj kaj printempofestaj versparoj.\*\* La budo, starigita de Hinhua-librejo, dum tiuj ĉi tagoj forvendis 2,600 ekzemplerojn de la revolucia romano "Ruĝa Roko", 400 ekz. de la popular-sciencia serio "Centmil Kial?" kaj multajn konsultajn librojn. Iu membro de la Popola Komunumo "Ruĝa Stelo" en antaŭurbo de Pekino vizitante Ĉangdian-foiron ĉijare, aĉetic antaŭ ĉio belan printempan versparon, kiu legiĝas "Senlime belaj estas la riveroj kaj montoj de nia patrujo" kaj "Dekmil printempojn travivos la Popola Komunumo". Lia vizaĝo radias de feliĉo, kaj eble tiu ĉi versparo ĝuste esprimas lian ĝojon.



Estas plantoj kiaj *Nandina domestica*, *Chimonanthes praecox* k.a., la lokaj jasmeno, ĉina rozo, *Hydrangea macrophylla*, ktp., per kiuj oni dekoracias la Foiron eksterordinaire bela. Antaŭ longa vico de la vendbudoj de orkideo multaj homoj aŭskultis la klarigon de la florkulturistoj, kiuj parolas en la suda dialekto. Ili klarigas al la klientoj montrante la ekflorontajn orkideojn ke kelkajn tagojn post plantiĝo, ili jam ekfloros kun delikata aromo. Tiuj ĉi dekelkaj orkideo-vendistoj estas florkulturistoj el la malproksima Popola Komunumo "Tangdi" en Ŝaŭhing-gubernio, Ĝegiang-provinco. Laŭ la tradicio, ĉijare ili alportis pli multe da orkideoj por pliigi la ĝojon kaj printempan belecon por la loĝantoj de la ĉefurbo.

Kelkaj malnovaj loĝantoj de Pekino diris ke Ĉangdian-foiro havas tricent-jaran historion. Oni aŭdis neniam antaŭe ke tiom da vizitantoj tie svarmis, nek vidis tian bonan ordon. Laŭ la informo de la Administra Komitato de la Foiro, la nombro de vizitantoj al Ĉangdian-foiro dum ĉijaraj ferioj de la Printempa Festo meznombro atingis ses-sepcent mil ĉiutage. Pli ol kvin mil vendistoj kaj laborantoj deĵoris en la Foiro. Multaj homoj, kiuj vizitis Ĉangdian-foiron, malgraŭ sia laco, entuziasme rakontas al aliaj, kiuj ĝin ne vizitis, pri tiu ĉi propraokule vidita faceto spegulanta la prosperiĝon de la patrolando.



"Mi volas tiun ĉi paperan ventoradeton."

Foto de Aŭ Enhong


\* La antaŭa novjara festo laŭ la ĉina lunkalendaro.

† Frandaĵo farita el pasto de glueca rizo kun farĉo.

‡ Vaporumitaj buloj el gluec-riza pasto nomata ajvovo-o.

\*\* Versparo konsistas el paro da pendaĵoj, ĝenerale el papero sur kiuj estas skribitaj po unu frazo aŭ verso. Ĝin oni pendigas orname sur muro, kolonoj k.s. Okaze

de Printempa Festo ĉinoj ofte surgluas novan versparon sur pordflugilojn. Per ĝi oni nomas ankaŭ la paron de frazoj mem.





# Notoj en Klasĉambro

Ilustraĵoj de Jang Jungking

**G**UAN Ki estas instruistino de la Dua Dependa Elementa Lernejo de la Instruista Seminario de okcidenta kvartalo de Pekino. Jam 25-jarojn ĝis nun ŝi restis ĉe sia posteno kaj instruis dek sep klasojn unuajarajn kaj mil infanojn. Multaj famliestroj havas la saman deziron ke iliaj infanoj estu instruataj en ŝia klaso kaj multaj instruistoj de elementaj lernejoj ŝin konas kaj estimas.

Tre ĝoje mi havis okazon ŝin viziti kaj kvazaŭ praktikanta seminaria lernanto sekvis ŝian leciondonadon dum pluraj tagoj.

## La Unua Leciono

Eksonis la sonorilo. Mi iris en la klasoĉambron sekvante la lernantojn de la 3-a klaso, kaj sidiĝis sur la plej lasta seĝo. La klaso konsistis el 38 lernantoj, ĉiuj en aĝo de ĉ. 9 jaroj.

Jam griziĝis la haroj de la instruistino Guan Ki. Ŝi ŝajne havis jam ĉirkaŭ 50 jarojn, sed vikleco radiis de ŝia korpo kaj ĉiam aperas intima rideto sur la vizaĝo.


“Hodiaŭ vi ĉiuj estas tre atentaj, tre bone. . . .” La infanoj sidis tute rekte en la seĝoj kaj aŭskultis ŝian lakonan, malrapidan kaj klaran parolon.

Post duono da leciono, la knabo en la dua seĝo de la 5-a vico komencis “distriĝi”. Unue li turnis sian kapon kaj paroletis al la apuda knabino, kiu tamen ne respondis; poste li puŝis ŝian brakon per la mano, sed ŝi restis senmova.

Instruistino Guan estis atente parolanta kaj turnis sian rigardon en alian direkton. Subite ŝi diris: “Ĝaŭ Baŭging estas tre bona; ŝi povas turni sian atenton plene al la aŭskultado.”

Tio donis grandajn kuraĝigon kaj konsolon al la knabino nomita kaj ŝajne samtempe efikis kritike al la knabo, kiu nun revenis al aŭskultado en seriozeco.

Sur la nigra tabulo nun aperis kelkaj frazoj, al kies vakaj partoj, pluraj lernantoj estis alvokitaj por ilin plenigi per konvenaj vortoj. Post kelkfoja manlevo, la petola knabo estis ankaŭ alvokita. Kun sufiĉa memfido li alpaŝis al la nigra tabulo, sed ekster sia supozo li neniel povis kompletigi la du lastajn frazojn. Li stultiĝis starante tie kun kreto en la mano. La infanoj komencis mallaŭtan murmuradon



kaj mi pensis ke li estos nepre riproĉata de la instruistino.

Sed ŝi diris:

“Kiel ni devas lin helpi? Ĉu ni lasu lin iom pensi en trankvilo?”

Tuj silentiĝis la klaso. Instruistino Guan turnis sin kaj mallaŭte donis kelkajn sugestojn al la knabo, kaj tiu fine plenigis la frazojn. Kiam li revenis al sia sidloko, mi legis el lia mieno senton de honto kaj dankemo.

Post la leciono, mi informiĝis, ke li estas “aparta knabo” de la klaso. Antaŭe li jam iom progresis, sed post la somera feritempo li denove regresis. Ŝi postulis ke la aliaj infanoj en la klaso pacience helpu lin kaj pro tio ŝi faris specialan aranĝon inter la lernantojn ĉirkaŭ li. Ja la sindeĝeno de la knabino de lia petolado estis ĝuste por helpi lin atente aŭskulti la lecionon.

## Unu Minuto

Foje, en la instruista preparĉambro mi vidis iun instruistinon iri por doni lecionon viŝante al si larminojn. Post ŝia foriro mi informiĝis de alia instruisto ke ŝi estas nova instruistino, kiu ploris pro incitado de lernantoj. La parolanto aldonis kun rideto:

“Ankaŭ mi iam ploris incitite de lernantoj. Ja ne estas tiom simpla afero teni bonan ordon en la klaso.” Tio instigis min ekatenti kiel instruistino Guan faras en tiu rilato.

Estis paŭzo interleciona. La lernantoj tre gaje sin amuzis en ludoj. Instruistino Guan subite venigis al si la deĵorantan lernanton kaj diris:

“Post malpli ol unu minuto ni havos la lecionon. Diru al ĉiuj ke ili ne tro laciĝu kaj iom ripozu!”

La infanoj komencis kolekti siajn ludilojn viŝante la ŝviton sur la frunto.

Eksonoris refoje. Instruistino Guan staris ĉe la pordo de la klasĉambro. Kun amemo en la okuloj ŝi rigardis al la lernantoj, jen palpante ies kapeton, jen frapetante alies ŝultron, kaj en bona ordo la infanoj eniris la klasĉambro kaj sidiĝis trankvile en siaj sidlokoj.

Ŝi alpaŝis antaŭ la nigran tabulon, kaj, rigardinte al sia brakhorloĝo, ekparolis:

“Unue ni kvietiĝu unu minuton por garantii efikan lernadon en la aliaj 44 minutoj.”

Por tiu unu minuto antaŭ ĉiu leciono ŝi havis ĉiam malsamajn vortojn:

“Hodiaŭ estas la unua tago de la semajno kaj ni havas nun la unuan lernohoron. Mi vidu kiu el vi estas la plej atentema! Estas tre bone ke vi ĉiuj montriĝas tiom atentemaj.”

“Ĵus vi ĉiuj havis tre interesan ludon. Kaj nun mi vidu kiu la unua iĝos trankvila.”

“Nun ni estas en la 4-a lernohoro kaj vi ĉiuj sentas jam lacon. Sed mi volas vidi kiu el vi estas la plej persista, plej energia kaj plej atentema por la lernado.”

En tiu ĉi “unu minuto” ŝi povas stabiligi la trankvilecon de la lernantoj kaj konservi bonan ordon en la klaso. Sed la memrega kapablo de la infanoj estas malforta, kaj estas sufiĉa bone por ili teni sian atenton koncentrigita dum pli ol 20 minutoj. Pro tio estas necese ĉiam averti ilin pri la klasĉambra disciplino.

Instruistino Guan ofte paŝadas tien kaj reen en la ĉambro. Kiam ŝi rimarkis malstreĉiĝon de atento ĉe iu lernanto, ties kapeton ŝi tuj palpis. Tio estis kareso kaj ankaŭ averto. Aŭ ŝi petis tiun respondi iun demandon, kaj poste diris: “Bonege! Sidiĝu.” Aŭ ŝi tiel aludis: “Nun vi ĉiuj estas tre atentemaj krom nur unu kiu klinas sian kapon kaj ne rigardas al la nigra tabulo. Tion mi jam rimarkis.”

Kion la instruistino postulis de la infanoj, estis ĉiam simpla, klara, por ili facile plenumbla kaj ankaŭ utila por firmigi la ordon en la klaso.

“Nun ni metu malpeze la legolibron kaj ne eligu ian sonon.”

“Mi petas vin elpreni paperon kaj plumon, kaj fermi la buŝon.”

“Skribu malrapide, ne preteratentu vortojn kaj frazojn. Sidu rekte kaj tenu ambaŭ manojn sur la tablo.”

Krome ŝi utiligis ankaŭ nigran tabulon kaj vortkartojn antaŭe surskribitajn per lernitaj ideografiaj kaj novaj vortoj, kaj petis la lernantojn voĉlegi kaj lerni parkere por tiamaniere vigligi la atenton de la lernantoj.

La metodoj, kiujn ŝi aplikis, konsistas plejparte el avertoj anticipe aŭ korektoj posttempe. Ŝi neniam riproĉis kolere aŭ montris severan mienon, sed nur sugestis en ĝusta tempo aŭ kritikis post laŭdo, sen vundo al la memestimo de lernantoj.

## La Sinteno en la Instruado

Ĉiufoje, kiam komenciĝis nova lernohoro post 10-minuta interleciona paŭzo, la okuloj de instruistino Guan ĉiam brilis de plezuro kaj ĝojekscitiĝo, kvazaŭ ŝi renkontiĝis kun la lernantoj post longa disiĝo, kaj volus diri:

“Kiom bone, jen ni denove estas en nia klaso!”

En resumado pri atingoj de la lernantoj, ŝi diris: “Vi ĉiuj progresis.” Ŝia voĉo estas plena de ĝojo el la koro. Kiam ŝi daŭrigis: “estonte la taskokajeroj devas esti puraj kaj la ideografiaj nete skribitaj.” Ŝia voĉo estis milda sed firma.

En demandoj, ŝia parolo estis vigla kaj kolorriĉa. Kaj la respondojn de la lernantoj ŝi ĉiam aŭskultis kun granda atento, tiel ke la tuta klaso enfokusigis sian atenton sur respondanton. Al la respondoj de la lernantoj ŝi tre malofte facile neis. Ekzemple: unu lernanto klarigis ke “dormi nebulkonscie” signifas “en tempo kiam oni estos songanta”, ŝi diris jene:





“Estas songĝ — anta! Eble ne songanta! Kiu klarigos plie?” Alia lernanto respondis: “estas en duondormo kun sento malklara.” Per facila svingo de la mano, ŝi jesis la klarigon dirante:

“Jes! Prave! Estas en duondormo kun sento malklara.” ŝi tiel ĝojis, kvazaŭ ŝi trovus pecon da oro en sablo.

Foje, kiam jam pasis pli ol 20 minutoj post la komenco de leciono, unu lernanto hezitis ĉe la pordo de la klasĉambro. Li volis eniri sed hontis montri sin. Tion rimarkinte, instruistino Guan tuj rapidis malfermi la pordon kaj lin enlasis kun rideto. Multaj infanoj turnis la rigardon al li. Instruistino Guan diris: “Li malfruiĝis, certe pro ia speciala kaŭzo, oni ne bezonas lin rigardi.”

Alifoje, instruistino Guan petis iun lernantinon, resume rakonti la enhavon de iu leciono. La lernantino longe staris kaj ne povis eldiri ĝin; mi antaŭvidis ke ŝi eble larmos post momento. Instruistino Guan alpaŝis kaj sin klininte, premis ŝian ŝultron, dirante: “Ne grave, Linjo. Mi pensas ke hieraŭ vespere vi certe estis okupita de iu afero kaj ne povis ripetadi la lecionon. Nun sidiĝu!”

Ĉu tio ne estas troa indulgemo? Sed instruistino Guan respondis al mi ridante:

“Ili mem estis jam en granda ĉagreno. Por kio necesas mia riproĉo? Iafoje indulgo efikas eĉ pli ol riproĉo.”

Mi neniam vidis ĉe ŝi malviglan, malvarman aŭ koleran humoron, sed male, ŝi estas ĉiam vigla, afabla kun mieno esprimriĉa. Ĉio ĉi ne estas afekte farita, sed sincera kaj natura.

## Vizitado al la Familioj de Lernantoj

Instruistino Guan Ki havas intiman rilaton kun la familioj de la lernantoj.

En kunsido de familiestroj, ŝi konkrete parolis pri la bonaj kaj malbonaj punktoj kaj lastaj etaj ŝanĝiĝoj de ĉiuj lernantoj. La plej mirinda afero por mi estis

tio ke ŝi povis pretertuŝe eldiri ankaŭ ilian lastatempan kreskon de la korpaj alteco kaj pezo.

Mi aŭdis de iu instruisto ke, ĉiam kiam instruistino Guan akceptas novan klason, antaŭ ol la lernantoj ekvizitas la lernejon, ŝi jam komencis sian ĝeneralan viziton al iliaj familioj, por ekkoni ilian staton. Kaj kiam komenciĝas la lernado, ŝi povas eduki ilin per ĉiu konvena metodo laŭ ilia aparteco.

Mi aŭdis ankaŭ tian kortuŝan okazintajon: antaŭ unu jaro, en la klaso, kiun nun ankoraŭ edukas instruistino Guan, estis lernanto tre ludama, kies gepatroj estis tre okupitaj de siaj propraj laboroj kaj malofte restis en la hejmo, tial la lernanto ofte ne faris siajn hejmtaskojn. Pro tio, en la difinita tempo de ĉiu semajno, ŝi iris al la hejmo de la lernanto por prepari sian lecionon kaj samtempe lasis lin fari siajn taskojn apude. Ŝia agado multe kortuŝis iun maljunan najbarinon de la lernanto, kiu volonte prenis sur sin la zorgon anstataŭ ŝi. Poste la lernanto estis edukita al kutimiĝo de akurata plenumado de hejmtaskoj.

Estis alia lernanto nomata Li Ĝigjun, kiu estis la dua infano en la familio. Ĝuste kiel la popoldiro priskribas: “amata la unua, dorlotata la plej juna, sed neglektata la meza.”, li estis do la neglektata de la gepatroj. Kaj kiam li vivis en la infanĝardeno, ĝuste la vartistino kiu lin prizorgis, ne kontentis pri sia okupo kaj ne havis simpatian al la infanoj. Pro tio lia karaktero fariĝis tre kruda kaj speciale malobeema. Dum leciono li ofte sin kaŝis sub tablo aŭ forkuris el fenestro. Iufoje li eĉ batis la instruiston. Dum unu kaj duona jaroj instruistino Guan ofte vizitis lian hejmon kaj kune kun liaj gepatroj analizis la kaŭzon kaj plibonigis la edukan metodon. Dank’ al bona kunlaboro inter la familio kaj la instruistino, per komuna prizorgo, kuraĝigo kaj estimado al la knabo, li iom post iom pliboniĝis. La gepatroj de Li Ĝigjun kortuŝe diris al mi:

“Instruistino Guan edukis ne nur nian infanon, sed ankaŭ nin mem. Ŝi donis al ni lecionon, kiel ni traktu la infanon.”

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

## Plenumita la Retiriĝo de Ĉinaj Trupoj de la Ĉini — Hindia Landlimo

Je 1, mar., ĉijare, la Ministerio de Nacia Defendo deklaris, ke la ĉinaj trupoj ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Hindio finis sian iniciativan retiriĝon laŭ la tuta linio de la Ĉini-hindia landlimo je la 28-a de feb. konforme al la

deklaro de la Ĉina Registaro je la 21-a de nov. 1962, t. e. post la sindefenda rebato al la hindaj trupoj, ili sin retiris ne nur al la linio efektive kontrolata, laŭ kiu ili postenis en 7 sept. 1959, sed eĉ en la areojn 20 kilometrojn post tiu linio en la ĉina flanko. Tiu retiriĝo celas, kiel deklariĝis, akceli la solvon de la landlima problemo inter Ĉinio kaj Hindio tra pacaj traktadoj.



# Mutuloj Komencas Paroli

**H**ALTIS la aŭtobuso. Eniris du knabinoj malpli ol dekjaraj. Ambaŭ elprenis 5 cendojn el sia poŝo kaj, donante ilin al la kondukto, diris, "Biletton . . . kvincendan."

Ricevinte la biletojn, ili ekkonversaciis inter si per mangestoj. La tuta pasaĝeraro de la aŭtobuso fiksis sian rigardon sur tiujn du infanojn.

Se ili estas surdmutuloj, kial do, ili kapablas paroli? Se ili ne estas tiaj, kial do, ili interparolas per mangestoj? Tiuj demandoj eĝlitis el ĉies okuloj.

"La surdmutaj infanoj frekventas la lernejon kaj ellernis parolon," klarigis la kondukto, kiu jam konatiĝis kun la infanoj pro ilia ofta veturo sur la aŭtobuso.

Post du haltoj, la du knabinoj atingis sian celokon. "Ĝis revido," ili eliris, svingante siajn manojn, kaj la kondukto kapbalancis kun rideto.

En la malnova tempo, samkiel ĉiuj aliaj kripluloj, surdmutuloj ne estis zorgataj de la socio. Malmulte el ili sukcesis eniri lernejon por surdmutuloj, fonditan de tiel nomataj filantropoj, ili tamen povis nur ellerni manparolon kaj metion kaj renkontis ĉie malestimom de la aliaj. Nun la surdmutuloj ne nur ĝuas egalecon, sed ankaŭ akiras voĉan komunikilon kiel la normalaj homoj. Tio instigis min ekdeziri viziti la Ŝanhajan Surdmutulanan Lernejon. Fine, realiĝis tiu mia deziro. Iun tagon, mi vizitis la lernejon kune kun kelkaj aliaj.

En la negranda klasĉambro sidas pli ol dudek lernantoj. La instruisto montras al la teksto skribita sur la nigra tabulo. Jen la lernantoj laŭtlegas kaj la instruisto korektas erarojn en ilia elparolo; jen la instruisto laŭtlegas kaj la lernantoj sekvas. Ĉu vere tiuj infanoj estas surdmutaj? Preskaŭ nekredeble!

La instruisto pendigas alian nigran tabuleton kun alia teksto skribita sur ĝi. Li vokas unu lernanton per lia nomo. Tuj stariĝas tiu lernanto. Ĉu li aŭdis sian nomon vokitan? Ne, li ne aŭdis, sed nur vidis.

"La lernantoj lernas unue aŭdi sian nomon per vido tuj kiam ili alvenis al la lernejo," klarigis la instruisto, kiu gvidis nin dum la vizito. "Post praktikado ili jam kutimiĝis al tio kaj reagis tre rapide, kvazaŭ ili vere aŭdis."

Nun la lernanto laŭtlegas la tekston skribitan sur la nigra tabuleto, sekvante la movojn de la instruista montrovergo. Estas aŭdeble, ke lia elparolo ankoraŭ ne estas tute sama kiel ĉe la normalaj infanoj. Iuj vortoj kiujn li elparolas estas proksimumaj, sed netute korektaj, aliaj iom malklaraj, aŭ eĉ eraraj. La instruisto korektas la erarojn unu post alia, pacience, malrapide, montrante speciale la korektajn movojn de la lipoj kaj formoj de la buŝo.

"Ekde 1954," rakontis nia kondukto, "ĉiuj surdmutulaj lernejoj en Ĉinio iom post iom enkondukis buŝparolon en la instruado, anstataŭ manparolo. Post kiam la Hanlingva Fonetika Alfabeto estis publikigita en 1958, ni ekuzis la literojn de tiu alfabeto, kaj tio multe helpas al instruado de buŝparolo."

Jen finiĝas la leciono. La lernantoj kurante forlasas la klasĉambrom. La instruisto alvokas unu el ili kaj lin demandas antaŭ la vizitantoj.

"Kia estas via nomo? Kiom aĝa vi estas?"

La lernanto klare respondas kaj ni ĉiuj estas mirigitaj.

"Jam estas ne malmultaj lernantoj, kiuj povas klare respondi al tiuj simplaj demandoj," aldonis la kondukto. "Sed ankoraŭ estas multaj kiuj respondas ne tiel klare."

Surdmutuloj ĝenerale estas homoj, kiuj perdas sian aŭdkapablon. Ne aŭdante sonon, ili ne povas lerni parolon, kaj tiel ili fariĝas mutuloj. Tial, ili lernas parolon ne per aŭdado, sed per vido. Ili rigardas la buŝformon de la instruisto por lerni elparolon kaj per la fonetika alfabeto de la han-lingvo praktikas analizon de sonoj kaj kunigon de sonelementoj. Post ekzercado, ili jam povas kompreni alies parolon per vido al buŝa formo kaj movoj de la lipoj. Tio estas "lego de parolo". Samtempe dank' al imitado de lipmovado, ili ellernas ĝustan prononcon kaj parolon.

Du el la vizitantoj faris provon en "lego de parolo." Ili staris vizaĝo kontraŭ vizaĝo, unu fore de la alia. Unu diris, "Papa", movante la lipojn, sed ne aŭdigante la sonojn.

La alia rigardis kaj diris, "Mama, ĉu korekte?"

"Erare!" Kaj ĉiuj ridis.



La kondukanto klarigis, ke similaj buŝformoj kaj lipmovoj ne estas facile distingeblaj. Tial, dum la lernado fingro-literoj estas uzitaj. La fingro-literoj plejparte estas imito al la formoj de la literoj per la fingro. Kiam oni diras "Papa", oni samtempe faras la literon "p" per la fingroj; tiel konfuziĝo kun "mama" estas evitata.

Lernado de buŝparolo ankaŭ helpas al skriba ekzercado. Multaj ekzercokajeroj de la lernantoj estas montritaj al ni. Inter ili estas kajeroj de la "Buŝparola klaso" kaj tiuj de la "Manparola Klaso". Lernantoj de la sama lernaro sed en la du klasoj havas malsaman rezultaton. Sen fundamenta scio de buŝparolo, la manparola klaso faras plimultajn erarojn en vortordo ol la buŝparola klaso.

La korektadoj per ruĝa inko en la kajeroj altiris nian atenton. "...kun rido diris survizaĝe", "...tre skribas klare", tio estas iuj el la eraroj faritaj.

Kiam oni diris "...skribas tre klare", oni devas fari tri mangestojn montrante tri vortojn: "tre", "skribas" kaj "klare". Se oni ne lernas buŝparolon, estas tre facile erare skribi "tre skribas klare". Lernado de buŝparolo estas la plej efika metodo por eviti erarojn en vortordo.

Ĉi tie estas videbla la grava rolo ludata de buŝparolo, kaj samtempe, la malfacilego en eduko de la surdmutuloj.

Ni ankaŭ faris viziton al la manparolaj klasoj. En la buŝparolaj klasoj, de tempo al tempo aŭdiĝas bruo pli granda ol en klasĉambro de ordinara lernejo. Sed male, en la manparolaj klasoj, estas absoluta silento. La instruistoj forte faras gestojn. Kaj la lernantoj jen stariĝas por respondi, jen por demandi pri siaj duboj, same per energiaj mangestoj.

Nia kondukanto flustre tradukis por ni la manparolon. Ni ĉiuj estis mirigitaj. En la laŭaspekte silentaj klasĉambroj estis studataj subtila liriko, ekzakta rezonajo, elokventa traktato. Estas de la



*Instruistino de la Dua Pekina Lernejo por Surdmutuloj instruas elparoladon al geknaboj helpe de diversaj modeloj.* Foto de Daŭ Ĝihin



*Instruistino de tiu lernejo donas al geknaboj lecionon helpe de aŭdohelpiloj.* Foto de Huang Gingda

instruistoj klarigataj la poemoj kaj popolkantoj per manparolo, aŭ analizata eseo de Lusin kaj eksplikata la politika verko de Prezidanto Maŭ.

Ni ja ne atendis ke tiom riĉan kaj fortan esprimivon havas senvorta parolo.

"En la estonteco, ni ankoraŭ devos utiligi ĝustamezure la manparolon en la instruado, sed pli grava estas enkonduko de la buŝparolo," asertis nia kondukanto en konkludo.

# Miaj Vivo kaj Laboroj

**A**NTAŬ la Liberiĝo en 1949, mi direktis la funkciadon de la Ŝanhaja Anda-kotonŝpinejo, kaj ankoraŭ nun mi restas ĝia ĝenerala direktoro. La diferenco estas nur tio, ke nun ĝi jam fariĝis entrepreno kune funkciata de ŝtato kaj privatuloj. Sed al mi mem tamen okazis pli granda ŝanĝiĝo: Krom direktado de la nomita ŝpinejo, mi funkcias plie kiel la direktoro de la Ŝanhaja Koton-ŝpinteks-industria Kompanio, vicprezidanto de la Ŝanhaja Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, ĉefkomitatano de la Ŝanhaja Federacio de Fabrikistoj kaj Komercistoj (de 1961) kaj prezidanto de la Ŝanhaja Filio de la Komitato por la Ĉina Internacia Komercio (de 1962). Ne nur plimultiĝis miaj funkcioj, sed, pli grave, mi jam elpaŝis el mia malgranda mondo de individua vivo.

Antaŭe, mi firme prenis la sintenon, ke "kiel negocisto oni zorgas nur pri negoco", kaj okupis min pri nenio alia krom la propra entrepreno. Kvankam mi posedis iom da kapablo kaj sperto en administrado, sed tio servis nur al mia privata entrepreno aŭ al la korporacio kaj ne povis garantii glatan prosperadon de la entreprenoj. Nun la entreprenoj, kiujn mi direktas, estas multe pli grandaj ol antaŭe, kaj mi povas kontribui al la patrujo de pli multaj flankoj. Cetere, mia vidkampo pli vastiĝis; miaj entreprenoj kaj laboroj jam strikte ligiĝis kun la brila estonteco de la tuta lando.

Dum la pasintaj du-tridek jaroj antaŭ la Liberiĝo, la plejparto el miaj amikoj estis samprofesiuloj—

ŝpinteksaj entreprenistoj. Sed nun, pli oftigis miaj kontaktoj kun amikoj el diversaj profesioj de la ŝanhajaj industriaj kaj komercaj rondoj; kaj en miaj aktivadoj en la Politika Interkonsiliĝa Konferenco, mi ĉiam pli multe interkonatiĝas kun famuloj el eduka, literatura, arta, medicina kaj aliaj rondoj.

En la pasinteco, miaj entreprenoj plejparte troviĝis en Ŝanhajo, tial mi malofte forlasis la urbon. Nun, preskaŭ ĉiujare, mi havas okazon fari vojaĝojn al aliaj lokoj. En la jaro 1961, mi vizitis Ŝandong-provincon kaj tie en vilaĝoj mi propraokule vidis la grandan avantaĝon de la popolaj komunumoj montritan en organizado de kamparanoj por disvolvi la kolektivitan produktadon kaj en batalo kontraŭ la natura katastrofo. En la sama jaro mi vojaĝis ankaŭ al Fugian-provinco. Kaj tie en montregiono mi vidis ke la konstruado multe progresis, eĉ en regiono de mardefenda fronto, industrio kaj agrikulturo ankaŭ rapide disvolviĝas. Cetere, ĉiujare mi iras al Pekino por ĉeesti kunvenojn de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj kaj la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, por kune konsiliĝi kaj diskuti pri gravaj ŝtataj aferoj.

Komparante la pasintecon kun la nuntempo, mi profunde sentas, ke la popolo kaj ŝtato metis sur min grandan fidon, kaj mi ankaŭ fieras pri tio, ke mi povas kontribui mian parton en la socialisma konstruado de la patrujo.

Ĉiufoje, parolante pri la Anda-kotonŝpinejo, mi havas ĉiam la senton, ke ĝiaj disvolviĝo kaj ŝanĝiĝo estas ne finrakontebaj. La nunaj ŝpinaĵoj kaj teksaĵoj de ĝi produktitaj estas pli delikataj kaj altkvalitaj; la specoj kaj koloroj pli variaj; kun la leviĝo de la kvalito, la kosto tamen reduktiĝis. Tio estis neimagebla por mi antaŭ la Liberiĝo. Precipe ĝojige estas, ke ĝi nun produktas ankaŭ artefaritan lanon. La memoro restas ankoraŭ freŝa, ke antaŭ dudek ses jaroj, kiam mi vizitis la industriajn entreprenojn de artefaritaj fibroj en Japanio, mi pensis: En kiu jaro ni mem povos ĝin produkti? Certe, respondi al tiu demando oni tute ne povis antaŭ la Liberiĝo. Sed nun, la multjara sonĝo fine efektiviĝis! kvankam ĝi faris nur siajn unuajn paŝojn.

Post la Liberiĝo, mia familia vivo fariĝis ankaŭ pli gaja kaj pli feliĉa. En la domo mia edzino ĉiam konservas la bonan ordon. De tempo al tempo ŝi devas ankaŭ partopreni en aktivecoj de la Ŝanhaja Virina Federacio. Ni havas naŭ gefilojn, la plejmulto el kiuj jam finis kursojn de universitato. Iuj el la

*Liu Ginggi kaj liaj familianoj. Foto de Gong Hinŝe*





gefiloj kaj bogefiloj funkcias kiel profesoro kaj inĝeniero, kaj aliaj laboras en ŝtataj institucioj. Ĉe mi vivas du nepoj. Ili estas saĝaj kaj petolemaj. En liberaj horoj mi amuziĝas kun ili per ŝercado, televido, radioaŭskulto ktp. Ili donas multan ĝojon al mia familio.

Miaj malnovaj amikoj bone scias, ke mi ŝatas kolekti ĉinajn antikvajn belskribaĵojn kaj pentraĵojn. Same kiel antaŭe, post la laboro mi invitas kelkajn amikojn kun la sama ŝato al la hejmo por ilin aprezi kaj studi. Vere interese! Antaŭe mi ne inklinis viziti teatron. En la lastaj jaroj prospere floras la teatra arto kaj bonaj teatraĵoj aperis unu post alia, ankaŭ mi iom post iom fariĝis ilia amanto. Nun, ĉiumatene mi lernas *tajĝiĉuan*\* simile al la popoldiro, "sesdekjarulo lernas bokson" (tio signifas ke la penado estas vana), ĝi jam portas grandan bonon al mia sano.

En la lastaj jaroj mi havis ŝancon renkontiĝi en plezura kunesto spicita per tostoj kun la honoraj gastoj el pluraj landoj, ekzemple, prezidanto Sukarno de Indonezio, prezidanto Sekou Toure de Gvineo, prezidanto Kwaame Nkrumah de Ghano, reĝo Mahendra kaj lia edzino de Nepalo, la ĉefo de Kamboĝo princo Norodom Sihanouk kaj la nuna prezidanto de Brazilo Goulart. Krome mi akceptis multajn aliajn eksterlandajn amikojn. Ili venis de landoj kun malsamaj socisistemoj, apartenas al diversaj profesioj kaj haŭtokoloroj, kaj havas malsamajn politikajn vidpunktojn kaj religiajn kredojn, sed ili unuanime laŭdis la atingojn en la paca konstruado de nia lando.

Antaŭ nelonge amikoj el Hongkong kaj Aŭmen vizitis Ŝanhajon kaj certigis al mi, ke mi ankoraŭ restas tiel plenenergia kaj sana kiel antaŭ tri jaroj, kiam mi partoprenis 60-jaran jubileon pri la fondiĝo de la Komerca Ĉambro de Ĉinoj en Hongkong. Jes, kiam iu vidas luman estontecon en disvolviĝo de siaj entreprenoj, kompreneble, li estas ĉiam energi plena kaj sana. Rerigardante miajn travivaĵojn dum la kelkdek jaroj de la industria kaj sociaj agadoj, mi trovis unu veron, ke la vera prosperiĝo de entrepreno



*Liu Ginggi kaj liaj familianoj. Foto de Gong Hinŝe*

kaj luma persona estonteco efektiviĝas nur tiam, kiam la lando akiris sian veran sendependecon kaj memstarecon, ĝiaj industrio kaj agrikulturo estas en rapida disvolviĝo, ĝia enlanda merkato plivastiĝas kaj la vivo de vastaj popolamasoj pliboniĝis. En Ĉinio, mia patrujo, ĉio ĉi jam efektiviĝis dank' al la starigo de socialisma socisistemo kaj disvolviĝo de socialisma konstruado.

*\* Speco de korpoekzerco de ĉinoj karakterizita per malrapidaj kaj mildaj movoj, tre populara precipe inter aĝuloj.*

\* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \*



## Landlima Interkonsento inter Ĉinio kaj Pakistano Subskribita

Je la 2-a de la lasta marto, la "Interkonsento inter la Ĉina Registaro kaj Pakistana Registaro pri la Landlimo inter Hingiang de Ĉinio kaj la Najbaraj Areoj, Kies Defendo Eestas sub Efektiva Kontrolo de Pakistano" estas

subskribita. Kaj laŭ la interkonsento, ĝi tuj ekvalidas post la subskribo. Tio estas nova venko de kunekzistado inter landoj kun malsamaj socisistemoj laŭ la kvin principoj de reciproka respektado de suvereneco kaj teritoria integreco, de reciproka neagreso, de reciproka neinterveno en internajn aferojn, de egaleco kaj reciproka utilo kaj de paca kunekzistado.

# Vizito al la Domo de Militkaptitoj

**E**N flamaj ĝojkrioj, malfermiĝas la blanka kurteno. Rapide ruliĝas la sonoj de ruĝa tamburo manfrapata. Klara, arĝenta ario de fifro ondas en la aero. Unu hinda soldato alivestita kiel hinda junulino, dance paŝetas, kaj ekkantas malnovan popolkanton popularan en Hindio. La kanto estas plena de admiro al juneco kaj sopiro je feliĉo...

Jen estas la sceno, kiun mi vidis la unuan tagon post kiam mi alvenis al la Domo de Militkaptitoj ĉe la landlimaj gvardioj en Tibeto de Ĉinio. La hindaj armeanoj kaptitaj dum ilia atako kontraŭ niaj gvardioj en la orienta sektoro de la landlimo inter Ĉinio kaj Hindio, estis kunvenantaj por sin amuzi per kantoj kaj dancoj. Iu kaptito diris al mi, ke ĉiutage ili vivis gajaj dum la kelkmonata restado en Ĉinio. Li aldonis ke li preĝos, se eble, por beni kaj danki la ĉinan gvardion pro ĝia bona traktado kaj multflanka prizorgado kiujn ili ricevis.

La Domo estas en la suda regiono de Tibeto, kie la klimato estas milda kaj varmeta. Antaŭ ĝi fluas klara rivereto, kaj ĝin ĉirkaŭas aroj da vilaĝoj kaj

*Novajn vatitajn vestojn kaj litkovrilon la hindaj militkaptitoj ricevis de la ĉinaj landlimaj gvardioj.*

*Foto de Kong Fangen*



*Je la 29-a de nov., 1962 hinduistoj el la hindaj militkaptitoj vizitis lamatemplon en la proksimo por fari religian riton. Foto de Juan Ling*

verdaj arboj. Tie estas bele kaj kviete, nek videblas pikildratoj kaj redutoj, nek ekzistas laborpunoj kaj persekutoj. Multaj kaptitaj hindaj armeanoj diris, ke ili "kvazaŭ gastas ĉe fratoj, kaj ĝuas abundon da amikeco kaj plezuro."

Ili loĝas en ĉambroj helaj kaj grandspacaj. Sur la lito estas nigre griza lana litotuko kaj pura vatita kovrilo faldita en bona ordo. Blankaj tualettukoj pendas sur longa ŝnuro. En la lavkuveto kuŝas dento-pasto, dentobroso kaj aroma sapo. Ĉion ĉi necesan por la ĉiutaga vivo al ili disdonis la landlima gvardio de Ĉinio. Ĉiutage, post ellitiĝo iuj el ili legas en sunlumo diversajn librojn kaj gazetojn en la hinda kaj angla lingvoj, iuj fiŝhokas en arbo-ombro kun stango en mano, kaj junuloj sportamaj ofte pilkon ludas kaj sin ekzercas per for- aŭ alt-saltado sur la korto. Ĉe la vesperiĝo, eksonas akordiono kaj fifro. Sidante en rondo la amantoj de literaturo kaj arto kantas popolkantojn de la hejmlando, dancas naciajn dancojn, kaj ankaŭ estas homoj kiuj ŝatas promeni tri-aŭ-kvinope sur la apudaj kampoj kaj montodeklivo, aŭ ĉe la rivereto.

En la Domo de Militkaptitoj la mastrumado de kuirlaboroj kaj manĝopreparado estas plenumata de hindaj armeanoj elektitaj de ili mem. Ili starigis Komitaton de Manĝomastumado. Ili faras manĝon laŭ siaj propraj ŝato kaj kutimo. Tiuj kiuj havas



religian kredon ne nur ĝuas plenan liberon en sia vivo religia, kaj povas libere uzi sian tempon por preĝado sed ankaŭ ricevas kroman manĝon por la festo-tago, kiun ili tradicie solenas. Iu hinda ĉefserĝento, membro de la Komitato, servinta jam pli ol dudek jarojn en la hinda armeo diris al mi: "La kelkmonata vivo en Ĉinio estas la plej bona vivo, kiun neniu el ni hindaj soldatoj iam travivis antaŭe."

La plej neforgeseblaj por la hindaj militkaptitoj estas la amikeco al la hinda popolo kaj la prizorgado al ili donitaj de la ĉinaj laborantoj en la Domo. Helpe de la ĉinaj laborantoj, la militkaptitoj ricevis diversajn faciligojn por korespondado de ili kun sia familio. Multaj post ricevo de respondo el Hindio foj-refoje dankis la laborantojn de la Domo pro iliaj helpoj.

En la Domo estas establita kuracejo speciale por la malsanuloj el la militkaptitoj. Iu hinda soldato malsaniĝis. Ne nur ĉina kuracisto kun zorgemo lin kuracis, sed ĉina laboranto Hu Hjuepeng persone donadis manĝon kaj trinkajon en lian buŝon por lin nutri. Post resaniĝo tiu hinda soldato diris al Hu kun larmoj sur la vangoj: "Dum mia vivo, la ge-

*La 19-an de dec., 1962 nombro da liberigitaj hindaj vunditoj kaj malsanuloj amike adiaŭas ĉinajn kuracistojn kaj flegistojn ilin prizorgintajn.*

*Foto de Juan Keĝong*



*Zorgema flegado al hinda vundito.*

*Foto de Jang Minghuj*

patroj estis la plej bonaj al mi. Sed vi, ĉina oficiro estas pli bona ol miaj gepatroj!"

En tiu Domo, mi renkontis alian hindan ĉefserĝenton, kiu devenis de familio popolarartista en suda Hindio. Li diris ke en la hinda armeo, lia supera oficiro diris al li, ke la ĉina armeo enterigas aŭ bruligas vivantajn militkaptitojn. Tial li venis al la Domo kun ekstrema teruro. Nun, kiam mi demandis lin pri lia vivo en Ĉinio, li ridegis tiom serene kaj metis oblikve sian manplaton ĉe la frunton kaj diris: "Eĉ antaŭ Dio mi devas ĝin diri bona!"

Unu maljuna armeano profunde kortuŝiĝis pro la bona akcepto en Ĉinio. Li vivis 20 jarojn en la hinda armeo kaj iam fariĝis militkaptito de la japana armeo, dum la Dua Mondmilito. Li diris: "Mi povas konfirmi, ke neniu en la mondo estas pli bonkora kaj pli amika ol la ĉino!" Kiam mi demandis lin kian penson li havas antaŭ ol li reiros baldaŭ en Hindion. Li diris: "Kiel kaptito mi povos postlasi nenian donacon, sed mi volas verki kanton per mia tuta koro de amo por danki la ĉinan popolon. La temo de la kanto estas: 'Ĉinio, bona!'"

# Nuntempo kaj Pasinto apud la Tenisejo

La tenisaj konkursoj ne povas esti tiel streĉaj kiel tiuj de piedpilko, kaj la spektantoj ne tiel bolbruas kiel tiuj ĉe konkurso de korbopilko. Tamen ludantoj kaj spektantoj same povas vidi ke granda ŝanĝo okazis en la tenisludo en Ĉinio.

La travivaĵoj de la unuopaj ĉampionoj—por viroj, Ĝu Ĝenhua kaj por virinoj, Ki Fengdi—en la Tenisa Turniro de Dek Unuoj (nome la provincoj Giangsu, Guangdong, Hubej, Siĉuan, Junnan, Gujĝoŭ, la urboj Pekino, Ŝanhajo, Tiangin kaj la Pekina Instituto de Fizika Kulturo) finiĝinta en Pekino la 19an de septembro, estas mallonga historio de teniso en Ĉinio.

Ĝu nun estas tridektri-jara. Kiam li estis dekkvarjara, li estis pilko-knabo ĉe la fremda Junulara Kristana Asocio en Ŝanhajo. Li devis kolekti la maltrafajn pilkojn, kiuj flugis el la korto kaj kelktempe en la arbitaron, kaj enmanigi ilin al la tiel-nomitaj sportuloj, al kiuj teniso estis nur tempo-pasigilo.

Tri jarojn poste, li estis promociita de pilko-knabo al ŝajna kunludanto. Je la unua vido la pozicio ŝajnis pli favora, sed li mem sentis ke li devis pli humile sin submeti al la diversaj humoroj de aliuloj. Li estis postulata stari malantaŭe, sur la baz-linio, kaj sendi glatajn pilkojn al sia kontraŭulo. En servado li estis permesita sendi nur molajn pilkojn, kaj estis ne penseble por li veni ĉe la reton. En Ŝanhajo—tiam duon-kolonio—tenisejoj estis la centro de aktiveco por la “superaj klasoj”, kie ĉinoj estis malpermesitaj paroli en sia propra lingvo. Ĝu kaj aliaj ne estis permesitaj eĉ spekti la konkursojn ĉe la plekt-barilo ĉirkaŭ la ludejo por

ne paroli pri partopreno en la turniroj, kiuj okazis kelkfoje, ĉar tiuj ĉi ŝajnaj kunludantoj estis rigardataj kiel malaltrangaj.


La venko de la ĉina revolucio alportis al Ĝu novan vivon. Ne longe post la Liberigo, li eniris en la Ŝanhajan Instituton de Fizika Kulturo specialistiĝi en sportoj. Tie lia tenisludo multe pliboniĝis kaj en lerteco kaj en teorio. En 1953, li partoprenis la tenisan turniron de naŭ unuoj (nome la orient-ĉinia, nord-ĉinia, centra-ĉinia, sudokcident-ĉinia, nordorient-ĉinia kaj nordokcident-ĉinia administraj regionoj, la Popola Liberiga Armeo, la Lokomotiva Sporta Asocio kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio) kiu okazis unuafoje en Ĉinio. Ekde tiam, li havis ŝancon aliĝi al ĉiu grava tenis-konkurso, inkluzive la tutlandajn kun lia nomo ĉe la kapo de la gajnintoj.

Li estis ĉampiono en la Landa Tenisa Turniro en 1958 kaj la Landa Sporta Kunveno en 1959. Krom ŝanco kiun li havis por elmontri sian lertecon en la hejmlando, Ĝu ankaŭ reprezentis Ĉinion en la internaciaj konkursoj.

Estis en 1957 ke Ĝu unue ludis en la internacia konkurso kiel juna sportisto en la ĉina teamo. Li venkis la faman aŭstralian Gibson kaj la unuarangan ludanton Knight de Britio kaj estis tiel rajtigita por la kvaronfinaj konkursoj. Li venkis ankaŭ la fame konatan ludanton Laver de Aŭstralio. En 1960, Ĝu en paro kun Mej Fugi gajnis la duopan ĉampionecon en la internacia konkurso en Budapesto kaj ankaŭ en Moskvo.

Post la finiĝo de tiu ĉi turniro, Ĝu profunde konsciis ke aperas multaj junaj kaj esperigaj ludan-

*Sporta majstro Ĝu Ĝenhua en ludo.*






toj kun forte ofensiva kapablo, kiaj, ekzemple, Peng Ĝijuan, Daj Jongming, Gaŭ Hongmoŭ. Krome, multaj revenintaj elmigrintaj ĉinoj partoprenis la konkursojn. Havante bonajn fundamentojn, ili estos nova forto en la ĉina rondo de teniso.

Dum la dek tagoj de la turniro, multaj ekscitaj scenoj okazis. La duopa konkurso inter Hi Ŝaŭven kaj Ĝang Gienĉang de Pekino kaj Hi Boĉang kaj Li Fangdoŭ de Junnan-provinco daŭris pli ol kvin horojn, sume en sesdek du ludoj. La unuopa lukto inter Ĝu Ĝenhua kaj Mej Fugi estis decidita post batalado de tri horoj. Tamen, la ĉina teniso ankoraŭ havas longan vojon por atingi la mondan nivelon. Nun, la ĉinaj ludantoj koncentrigas siajn penojn por pilbonigi la teknikon de ekbato kaj proksimiĝo al la reto.

Ki Fengdi, juna ludantino, dudekkvarjara, venis sur la teniskorton post la Liberiĝo. Ŝi ne travivis la malfacilaĵojn de siaj pliaĝuloj, kaj ni povas diri ke ŝi havas glatan vojon en sia sporta kariero. Jen ŝiaj propraj vortoj: "Mia historio de tenis-ludo estas tre simpla kaj finrakontebla per malmulte da vortoj". Ŝi komencis ludi tenison je sia dekkvina jaro, kiam ŝi estis en gimnazio, kaj revis pri trakaj kaj kampaj sportoj, tablo-teniso kaj ankaŭ korbo-pilko. Sur la bazo de sia sperto en tablo-teniso, ŝi povis ludi tenison en kompletoj kun rimarkindaj rezultoj post praktikado nur dum unu aŭ du monatoj.

Ĉe la unua landa turniro kiun ŝi partoprenis en 1957 ŝi fariĝis gajninto de la kvara loko en unuopaj ludoj. En 1958, ŝi gajnis la ĉampionecon de la junula tereno ĉe la Landa Junula Turniro, kaj en septembro de la sama jaro, ŝi denove gajnis la landan titolon en Vuhan kaj tenis la titolon en la jaroj 1959 kaj 1960.

Ki Fengdi, modesta kaj diligenta, ofte parolis pri multe da fortaj kontraŭuloj, kiujn ŝi renkontis.



*Teniso-ĉampionino Ki Fengdi.*

Ekzemple, en la decidaj bataloj post pli ol du horoj de luktado ŝi venkis Jen Dacuj-on en du serioj kaj unu poento estis decidita nur post kiam la pilko estis frapita tien kaj reen ĝis kvardek fojoj. Kaj cetere, ŝi estas forta antaŭa atakanto kun ĉiu bato fatala al ŝiaj kontraŭuloj, Ki lertas en falpafoj faritaj per ŝiaj firmaj mandorsen-batoj. Spite de siaj multaj meritoj, ŝi ankoraŭ pensis ke la ĉinaj tenis-ludantinoj fariĝas pli samnivelaj kaj bezonas pli perfektan teknikon. Sentante ke ne nur energio sed ankaŭ forta volo estas necesa, ŝi decidis sin trejni persiste, por venki siajn mankojn troe alteniĝi al bazlinia ludo, riski en alproksimiĝo al la reto, kaj akiri bezonatan teknikon kaj sperton en internaciaj konkursoj, altigi sian juĝkapablon k.t.p.


En tiu ĉi konkurso, escepte de la unua premio en miksitaj duopaj ludoj gajnita de Gaŭ Hongmoŭ kaj Hju Ŝulian de la Pekina Instituto de Fizika Kulturo, la venkintoj de la aliaj konkursoj estas ĉiuj el Ŝanhajo. Ili estas Ĝu Ĝenhua, Ki Fengdi (unuopaj ĉampionoj), la ĉampionoj de viraj duopoj Mej Fugi kaj Peng Ĝijuan kaj ĉampionoj de virinaj duopoj Ki Fengdi kaj Hang Sajgin.

La vortoj de la du ĉampionoj denove pravas ke kvankam teniso ekzistis en Ĉinio kiel sporto jam pli ol sepdek jarojn, fakte, ĝi ne disvolviĝis grandskale kaj atingis pli malpli altan nivelon ĝis antaŭ lastaj kelkaj jaroj.

Forskuinte la jugon de la malnova socio, teniso servas al la sano de la popolo kaj granda nombro da elstaraj geludantoj aperis de post la Liberiĝo de Ĉinio.



*Elektado de laborpoento-registranto.*



*Ŝuangŝuang oponas subvencii la brigadestron Gin Kjaŭ kaj ŝia edzo Hivang malkontentiĝis timante koleriĝon de la brigadestro.*

*Hivang koleriĝis kaj foriris. La maljuna partia sekretario venas kuraĝigi lian edzinon ke ŝi daŭrigu sian laboron.*



LI NAJHI:

## “Li Ŝuangŝuang”, Filmo

“LI ŜUANGŜUANG” estas komedia filmo kun originala stilo. De multaj jaroj mi jam spektis sufiĉe multe da filmoj, sed trovis nenium simila al tiu de “Li Ŝuangŝuang”, kiu ne nur igas la spektantojn ridi senĉese kaj serenigas ilian koron, sed ankaŭ donis al ili post la rigardo ion utilan kvazaŭ oni aŭskultis lecionon de iu sperta kaj eminenta instruisto.

La filmo estas farita laŭ la samtitola novelo de Li Ĝun, ĉina nuntempa verkisto. Temo kion la filmo surekranigis kvankam ĉefe estas nur la ŝanĝiĝo en familia vivo de la geedzoj Sun Hivang kaj Li Ŝuangŝuang, ambaŭ membroj de la komunumo, tamen tra serio da tipaj okazaĵoj kaj drama intrigo, ĝi profunde spegulas tute novan rilaton inter homoj. El la vivo kaj formiĝo de la karaktero de Li Ŝuangŝuang kaj Sun Hivang, la filmo reliefe montris al ni en miniaturo la fizionomion de la nova vivo de la epoko.

Li Ŝuangŝuang estas kamparanino kun koro malferma kaj justama kaj malkaŝema, kiu cedas al neniu maljustaĵo, rigardas fiagon kiel malamikon, kaj prenas la interesojn de la kolektivo kiel plej gravan aferon. En la principaj problemoj kvankam ŝi estas ĉiam serioza, tamen en la ĉiutaga vivo ŝi estas tre helpema kaj zorgema al la aliaj. Sed la karaktero de Sun Hivang estas ĝuste la malo; ĉe li restas ankoraŭ iom da malnova ideologio kaj restaĵo de sento de edza supereco. Li inklinas al senprincipa starigo kaj konservo de reciproka favoro kaj timas fari malagrablaĵojn al aliuloj. En la ĉiutaga vivo li ĉiam malaprobas la enstrudiĝemon de Ŝuangŝuang en alies aferoj. Kaŭze de la malsamaj karakteroj de la geedzoj ofte aperas tordiĝoj en la familia vivo kaj tiel sinsekve kreiĝas multaj dramecaj okazaĵoj. En la komenco de la filmo, oni vidas, ke Ŝuangŝuang kverelas kun la edzino de Sun Joŭ, kritikante la lastan, kiu ŝtelis tabulojn de la komunumo. Hivang trovas la intervenon de sia edzino tute ne necesa, kaj sekvas la jena dialogo:

Hivang: “De kio vi ricevis la rajton enmiksiĝi? Kio vi estas?”

Ŝuangŝuang: “Mi? Membro de la komunumo!”

Tion dirinte, ekster la supozo de la spektantoj, ŝi kuris antaŭen kaj ekprenis la tabulon por ĝin reporti al la komunumo. La sekvaj scenoj prezentis malkontenton de komunumanoj pro la maljusta difinado de laborpoentoj fare de la registristo, publikigon de la afero fare de Ŝuangŝuang per afiŝo, elektadon de laborpoenta registristo kaj la du-fojan eliron el sia hejmo fare de Hivang pro disputo kun la edzino. La rigardantoj povas vidi la malsamajn sintenojn de la



# Kun Aparta Ĉarmo

geedzoj al la kolektivo el flanka priskribo kaj ankaŭ la profundan amon inter ili. Krome en tiuj scenoj estas interplektitaj multaj interesaj epizodoj de ilia familia vivo. Ĉio ĉi helpas al la spektantoj trovi ĉe tiuj ordinaraj personoj kaj bagatelaj aferoj gusto-plenajn interesajn kaj oni sentas ke la tuta intrigo disvolviĝas tiom nature kaj racie ke devas esti tiel kaj nepre ne aliel.

La heroino Li Ŝuangŝuang estas novtipa figuro kreskanta en la popolaj komunumoj de nuntempa Ĉinio. Ŝi absolute ne estas elpensajo de la aŭtoro, sed vivanta homo el sennombraj membrinoj de la popolaj komunumoj. Ili senĉese influas la aliajn ĉirkaŭ si per siaj kondutoj: persistemo en principo, fervoro en laboro, amo al kolektivo kaj senegoisma justamo. Ĝuste kiel la filmo prezentas ke eĉ homo kun tiom malsama karaktero, kia Hivang, ankaŭ ne povis ne esti forte kortuŝita en la fino. Kiam Hivang revenis post la duafoja eliro kaj vidis ke la virina brigado, kiun gvidas Ŝuangŝuang, estas okupita kun granda ĝojo en bolanta laborado de riĉa rikolto, li ne povis ne senti en si hontegon tiel ke vespere en babilado kun sia edzino li malkaŝis al ŝi kion li vidis ĉifoje dum veturigo kune kun la produktbrigada estro Ginkjao, kiu survoje transportis akvomelonojn por alia homo per la ĉaro de la komunumo kaj proprigis al si la monon de 30 juanoj kiun oni pagis pro la transportado. Ĝuste kiam Hivang estas kontenta pri sia nepartopreno en divido de la ricevita mono, neatendite la edzino kulpigas lin pro tio ke li ne malhelpis la aferon, kaj decideme ĵetas al li:

“Vi egoisto!

“Komprenu, sur ĉiun herbon gutis la ŝvito de komunumanoj!”

Tiel Hivang nur povas rapidi al Ginkjao en la sama nokto kaj konsilas al li konfesi al la komunumo sian kulpon. Efektive, ĉu restas iu alia vojo por Hivang antaŭ tia fakto? La filmo finiĝas per la sceno, kiam Hivang fervore rakontas al paro de junaj geamantoj sian amon kun Ŝuangŝuang, subite li trovis sian edzinon staranta malantaŭ li. Tio kaŭzis eksplodon de ridego inter la spektantoj.

“Li Ŝuangŝuang” estas tre bona miniaturo esprimanta la vivon en la popola komunumo, tial, en la ĉinaj vilaĝoj ĝi estas unuanime bonvenigata de la komunumanoj, kiuj trovas ke en la filmo ili povas vidi fidelajn priskribojn de la intimaj personoj kaj aferoj ĉirkaŭ si. Mi estas konvinkita ke ĉiu, kiu volas informiĝi pri la popola komunumo de Ĉinio, nepre trovos en ĝi ĝojon kaj ion utilan.



*Erĉun notas en sian taglibron la konsilojn de Ŝuangŝuang pri deca sintenado rilate al la amatino.*

*Ŝuangŝuang kaj Hivang denove kunvivas harmonie.*



*Erĉun kaj lia amatino Guĵjing estas klopodantaj eltiri el Hivang lian amhistorion, Ŝuangŝuang alproksimigas neatendite.*



## Pri Mia Filineto

**M**IA filineto lernas en la dua klaso de elementa lernejo. Antaŭ nelonge, okazis en la lernejo kunsido de gepatroj de la lernantoj, en kiu ankaŭ mi partoprenis.

Dum la kunsido, la afabla lernejestrino flue rakontis al ni la lernadon de la infanoj en la nova semestro komenciĝinta aŭtune. Ŝi diris, ke Cuj Bo, tria-klasa lernanto, kiu havas iom pli ol dek jarojn, trovis sur la strato stakon da monbiletoj kun sumo de pli ol 300 juanoj. Li levis kaj tuj donis ĝin al la perdinto. La lernejestrino ankaŭ laŭtlegis liston da nomoj de gelernantoj, kaj daŭrigis: "La nomitaj geknaboj faris en la kuranta semestro unu aŭ kelkajn aferojn utilajn al la publiko. Iu helpis survoje al nekonata maljunulino porti grensakon ĝis ŝia hejmo, alia akompanis propravole knabon, vojerarintan al liaj gepatroj. . . ."

Inter la nomoj estis tiu de mia filineto. Al ŝi okazis jeno: Iutage, ŝi veturis aŭtobuse al lernejo. Ĉe elaŭtobusiĝo ŝi vidis du bulojn de lanfadeno surtere ĉe la haltejo. Ili elfalis de iu virino, kiam ŝi sin premis en la aŭtobuson. Mia filineto tuj kolektis ilin. Vidante ke la veturilo jam estis for, ŝi atendis tie ĝis la alveno de la sekvanta aŭtobuso kaj donis la trovitaĵon al la konduktorino. Dank' al ŝi la perdinto fine retrovis la fadenbulojn.

Aŭskultante la rakonton de la lernejestrino en la sunbrila klasĉambro, miaj pensoj tajdis en mia cerbo. Kiel oni povas ne ĝoji pri tio, ke bona moralo kreskas jam en la geknaboj? Ĉu tio estas la frukto donita de iliaj gepatroj kiuj ilin edukas hejme? Pripensinte mi devis konstati, ke mi apenaŭ okupiĝis pri edukado de mia infano. Estas la nova socio de kiu la nova generacio ricevadas edukon kaj influon el ĝiaj noblaj moroj. Kaj mi ekmemoris alian aferon, kio okazis antaŭ nelonge.

Jam estis malfrua aŭtuno post kiam ni celebris la Nacian Festotagon pasintjare. Pro iom-post-ioma malvarmiĝo ni devis pretigi vintrajn vestojn por la infanoj. Tiam ni ektrovis, ke blua jako el ripa veluro de mia filineto malaperis. Ni traserĉis la ŝrankon kaj komodon kaj enrigardis ĉiun angulon en la domo, sed la dutaga serĉado donis nenian signon. Eble ni jam ĝin perdis? Kiam kaj kie do? Kial restis nenia signo en nia memoro?

Post kelkaj tagoj mi legis en vesperjurnalo karikaturon pri malzorgemulo, kiu retrovis sian perditan

objekton ĉe la Oficejo de Perdaĵoj. Por provi mian ŝancon mi skribis leteron al la koncerna Oficejo, nur rimarkigante ke sur la vestofaldo estis la nomo de mia filineto, kiun brodis vartistino de la infanĝardeno kiun mia filineto vizitis en la antaŭ-lastaj jaroj; sed pri la tempo kaj loko de la perdo mi povis diri nenion.

Forsendiĝis la letero. Ŝajnis al ni, ke estas malmulta espero ĝin trovi, tial ni forgesis la aferon post kelkaj tagoj. Iun posttagmezon, oni telefonis en nomo de la Oficejo de Perdaĵoj. Post demando pri mia nomo, oni diris: "La jako de via infano jam estas trovita. Venu ĝin preni."

Ho, kiom ĝojis mia tuta familio pro la novaĵo neatendita! Ni pensis, ke la vesto eble perdiĝis jenamaniere: Kiam venis printempo kaj fariĝis ĉiam pli varme, mia filineto surmetinte ĝin eliris frumatene, kaj poste ŝi pro varmo ĝin demetis ie, kaj forgesis ĝin porti hejmen. Estis pli varme en la sekvintaj tagoj, kaj oni jam ne bezonis pezan veston. Tial, ankaŭ ni tute ne rimarkis la perdon ĝis post duonjaro.

Tiun vesperon, plenuminte siajn hejmtaskojn, mia filineto elprenis paperon, kaj ŝi mallerte sed serioze skribis la jenan leteron:

*"Kara onklo,*

*Mi perdis mian surveston pro malzorgemo. Nun vi retrovis ĝin por mi. Koran dankon. Mi garantias al vi, ke mi lernos diligente por fariĝi bona infano de Prezidanto Maŭ. . . ."*

Ŝi donis al mi la leteron, petante, "Morgaŭ kunportu ĝin kiam vi iros por preni la veston."

Enirante en la Policejon, kie troviĝas la Oficejo de Perdaĵoj, mi vidis ke ĉirkaŭe staras grandaj vitrosrankoj, en kiuj dense pendas brakhorloĝoj, fontoplumoj, fotografiloj kaj amasas lanvestoj, ŝaloj, ktp. Post momenta serĉo oni kuŝigis antaŭ mi la bluan jakon. Kontrolante mi trovis sur ĝia maniko etiketon kun jena skribaĵo:

*"Trovita de konduktorino de la 14a-linia aŭtobuso, la 30-an de aprilo, posttagmeze. Transdonita de la urba aŭtobusa kompanio al la Oficejo de Perdaĵoj post la limdato de konservado por atendi la serĉanton."*

Mi traserĉis la jakon kaj elpoŝigis tolan buŝkovrilon kaj du pecojn da bombono-papero. En tiu momento mi sentis min kaj serioza kaj ekscitita.



# DUNHUANG

## Trezorejo de Antikvaj Artajoj en Dezerto

**D**UNHUANG sin trovas en la okcidenta ekstremo de Gansu-provinco de Ĉinio, ĉ. 300 kilometrojn okcidente de la ĉina Granda Muro. Laŭ registro de historio en la jaro 366 p. K., estis farita tie la unua kaverno, kaj dank' al aldonaj konstruadoj dum la daŭro de pli ol mil jaroj ĝi fariĝis unu el sanktaj lokoj de budhismo en antikva Ĉinio.

Laŭ nun disponebla historia materialo, en 352 p. K. unu bonzo nomata Jo Zun, kiu hazarde vagis tie, vidis ŝajne ke la montpinto disradias en la brilo de la subiranta suno oran lumon, en kiu aperas figuroj de mil budhoj. La vizio kreitan de natura fenomeno li prenis por la Lumo de Budho. Li entreprenis fosi en rokon por fari la unuan kaverton kiel kultejo de budhoj. Poste, en la sekvaj dinastioj

*Kredantino (parto de murpentraĵo, kaverno n-ro 17, el la malfrua periodo de Tang-dinastio 821-906 p.K.).*



daŭris la foskonstruado de la kavernoj, jaron post jaro, ĝis la 7-a jarcento, la kavernoj jam nombriĝis pli ol mil kaj en ĉiu kaverno estis faritaj freskoj kaj statuoj, kiuj estis du gravaj konsistigaj partoj de la artaĵoj de Dunhuang.

### La Freskogalerio 25-kilometrojn Longa

Laŭ la lasta statistiko la ĝis nun konservitaj ŝtonaj kavernoj de Dunhuang sume nombriĝas 488, kiuj etendiĝas de norde ĝis sude serpentume kun longeco de du kilometroj kaj de supre ĝis malsupre en 4 aŭ 5 vicoj. Se kuniĝus ĉiuj freskoj en la kavernoj la longeco atingus 25 kilometrojn kun alteco de 2 metroj.

La temoj de la freskoj estas tre variaj. Krom mitaj rakontoj la freskoj pripentras diversajn aspektojn de la vivo kaj produktado de la antikva popolo, ekz. la terkulturo, rikolto, ĉasado, melkado, ĉevalraĵdo kaj ŝipveturado ktp., kiuj ampleksis multajn flankojn de la tiama socia fizionomio. Ili estas tre alte taksitaj ne nur pro la arta valoro, sed ankaŭ pro tio ke ili estas rara materialo por la scienca kaj historia studado.

La freskoj de Dunhuang manifestis la realisman tradicion de arto en la antikva Ĉinio kaj prezentis antaŭ ni la genion kaj la seriozan sintenon en arta kreado de la antikvaj majstroj. Ĉu en figurado de homoj aŭ en uzo de koloroj, ili atingis tre altan nivelon. La bildo "La Ĉevalĉaro" estas parto de la historia fresko pri la Cervo-reĝo kaj reprezenta specimeno de la freskoj de la Norda Vej-dinastio (386-534). Ĝi pripentris scenon de la rakonto pri iu droninto, kiu estis savita de la Cervo-reĝo, perfidanta nun sian savinton donante informon al la reĝo kiu Cervo-reĝon persekutas. La blanka ĉevalo tiranta la kaleŝon, estas pentrita en formo eleganta kaj kun sento de fortikeco. La ĉevalo, la kaleŝa tegmento, la vizaĝoj kaj manoj de la homoj estas tuĉe ombrumitaj por fortigi la plastikecon. La tero estas kolorigita per hele bela ruĝo. Kon-



*Avalokitesvaro (murpentraĵo, kaverno n-ro 46, el la prospera periodo de Tang-dinastion 713-762 p.K.).*

traste kun la blanka ĉevalo la tuto montras sin viveca kaj, samtempe, majesta kaj gracia. La fresko "Alveno de Kuracisto" en la kaverno n-ro 217 estas tipo el la freskoj de la periodo de kulmina prospero de Tang-dinastio. Ĝia motivo estas la sutra frazo "kvazaŭ alveno de kuracisto por malsanulo". La fresko prezentas flankan ĉambron en profunda granda domo. Printempaj floroj kaj kliniĝintaj salikobranĉoj duonkovras la luksan dormoĉambron, kie sur la lito sidas juna virino, kiun akompanas junulino kun bebo en la brakoj. En la maldekstra angulo de la bildo estas servistino alkondukanta kuraciston, kiu portas apogbastonon en la mano. La tuta sceno formita el ses personoj, la ĉirkaŭaĵo kaj la interna aranĝo de la ĉambro estas pentritaj, detale kaj harmonie, eĉ la floroj kaj bildoj sur la ekrano post la juna virino estas pentritaj sen preterlaso, sed ĉio ĉi ne impresas per trodetalemo. La okulfrapa punkto de tiu ĉi fresko estas ke la pentristo per sia kompetenta lerteco kaj de la angulo de la flanko kaj malantaŭa pozicio versimile figuris nezorgitan tualeton kaj laman paŝadon de la kuracisto.

En iuj freskoj de Dunhuang oni povas rimarki ankaŭ la riĉan imagopovon de la ĉinaj antikvaj artis-

toj. En la kaverno n-ro 320 troviĝas multaj koloraj flugantaj ĉielaj muzikistinoj, dancistinoj orname pentritaj sur la fono de la blua kaj blanka ĉielo. Ili ŝvebas en la aero supren kaj malsupren, turniĝante dekstren kaj maldekstren, en elegantaj, viglaj pozoj de horizontala, oblikva, ascenda kaj descenda flugado, kvazaŭ naĝantaj fiŝoj aŭ flugantaj birdoj, kaj donas grandan vidĝuon al la rigardantoj kaj vekas ilian fantazion. En la religiaj pentraĵoj de l' okcidenta Eŭropo la anĝeloj havas flugilojn surdorse, sed niaj antaŭuloj ĝin prezentis en alia maniero, ĉefe per flirtado de la longaj pendadoj de vestligaj rubandoj kaj sento de ekvilibro por vivece montri la staton de la facile ŝvebantaj homkorpoj.

### 2411 Antikvaj Skulptitaj Statuoj en la Kaverno

La statuoj de Dunhuang posedas la similajn trajtojn kiel la freskoj, nome la vastecon kaj varieton de la temoj, la realisman artan stilon kaj sur la bazo de tio mirindan fantazion kaj hiperbolon.

La plej fruaj estas la koloraj statuoj de la Norda Vej-dinastio. La bildo "Majtrejo kun interplektitaj kruroj" estas ilia reprezenta verko. La stilo de tiutempaj statuoj karakteriziĝis per siaj simpleco kaj forteco.

Tang-dinastio (618-907 p. K.) estis la plej prospera periodo de la skulptarto de statuo. La reliefo de la karaktero de homoj kaj la anatomia studo de muskoloj estis pli evoluintaj ol antaŭe. El la homstatuoj de Tang-dinastio la plej multaj estas rekte sidantaj figuroj kun interplektitaj kruroj kaj majesta, kompakta kaj serena mieno. La vestofaldoj estas tiel glataj kaj fluecaj kiel la linioj en la pentrado, precize prezentis la grasetajn korpojn. Konforme al la anatomio pri homa korpo, sed ne tro pedante. La bodisatvinaj statuoj plejparte estas sveltaj kaj graciaj. La bildo 1-a de la koloraj paĝoj prezentas buston de bodisatvo, kies belaj kaj maldikaj brovoj kaj okuloj elmontras mildecon, inteligentecon kaj neprofaneblecon de la virino. Kun rideto ĉe la buŝanguloj kvazaŭ ŝi estas afable aŭskultanta la preĝon de homoj. La silka ŝtofo de la vesto kaj jupo, kiuj maldike kaj mole sidas sur la korpo kaj kies faldoj flue ondetas, estas bone sentebila. En la bodisatvo-statuoj de la junulina tipo la antikvaj artistoj laŭdis la bonecon, sagacon, inteligentecon kaj dignon de la virino kaj en tio samtempe ankaŭ esprimis sian sopiron al ĝojo, paco kaj bona vivo.

La kolora bildo sur la dorskovrilo estas figuro de atleto, kiun oni faris per metodo de hiperbolo. La elstarantaj muskoloj kaj artikoj, la ŝvelantaj vejnoj, ĉio montras la preskaŭ eksplodontan forton entenatan en la korpo kaj esprimas la imponecon kaj firman karakteron de la viro. Tiu ĉi statuo igas nin memori



# Mur-pentraĵoj kaj Koloraj Skulptaĵoj de Dunghuang

*Bodisatvo (en la 194-a kaverno, farita en la meza periodo de Tang-dinastio)*






*Muzikantoj en la okcidenta Edeno. (en la 112-a kaverno, pentrita en la meza periodo de Tang-dinastio)*



*Bodisatvo drakon rajdanta kaj flugantaj kaverno, pentrita en la komenco de*



*Ĉasado (en*







Floroj. (en la 329-a  
dinastio)



La Dio de la Suno kaj Luno Asura. (en la 249-a kaverno, pentrita  
en Vej-dinastio, 386 p. K. ĝis 534 p. K.)

La 249-a kaverno, pentraĵo de Vej-dinastio, 386 p. K. ĝis 534 p. K.)





*Sidanta bodhisattvo (en la 328-a kaverno, pentrita en Tang-dinastio)*



pri la skulptaĵoj de Mikelangelo, majstro el Renesanco de Eŭropo, kaj ankaŭ pensi pri la fizika fortikeco kaj spirita kuraĝeco de la antikva laboranta popolo de Ĉinio.

La ĝis nun konservitaj statuoj de Dunhuang sume nombriĝas 2411. Unu sidanta statuo estas 23 metrojn alta kaj por ĝin ŝirmi oni devis trafosi tri roktavolojn. Kaj krome tie troviĝas alia sidanta statuo kiu estas alta en 33 metroj. Ĉiuj ĉi tiuj granddimensiaj kaj artisme faritaj artaĵoj estis kreitaj de ĉinaj antikvaj laboruloj sub kompare simplaj kaj primitivaj kondiĉoj de laboro.

## Dunhuang en Du Epokoj

Dunhuang estis en la regiono, kie en antikveco okazis ofte militoj kaj estis mikse loĝata de diversaj nacioj. Ĉiu milito alportis al ĝi ian katastrofon kaj aldone pro mordado de la moviĝanta sablo kaj eflorskado, pliparto de la kavernojam neniiĝis. En Min-dinastio (1368-1644) Dunhuang foje izoliĝis de la interna lando, sekve tiu ĉi budhisma sanktejo iom post iom dezertiĝis kaj silente trapasis la longajn jarojn enfermita en la dezerta sabloblovado.

Ĝis 1900, pro malkovro de la "Librokolekto en la Ŝtonĉambro" la kavernojam de Dunhuang ekfamis tra la tuta mondo kaj fariĝis brilanta gemo, koncentriganta al si tutmondan atenton. Tio tamen, alportis al ĝi pli grandan katastrofon.

Ĉar tiam loĝis tie *daŭsi*\* Vang. Dum forigo de sabloamasoj el la kavernojam, li trovis ŝtonĉambron, kie estis plene deponitaj raraj historiaj kulturaj objektoj, inter kiuj troviĝis manskribitaj volvaĵoj de sutroj, arkivoj, pentraĵoj, religiaj instrumentoj kaj kupraj statuoj ktp, el la periodo de la 5-a ĝis la 7-a jarcento, sume de pli ol 30,000 pecoj. Ili estis kaŝitaj de la bonzoj loĝantaj en Dunhuang en la jaro 1035 por eviti la militajn detruojn. Tio estis grava malkovro en la historio de la homa kulturo en la 20-a jarcento. Kvankam *daŭsi* Vang ne konis la valoron de la raraj trezoroj, sed la novaĵo ekvekis la avidon de imperiistoj. Sub la regado de la malklera reakcia registaro, la imperiistoj Aurel Stein, Paul Pelliot kaj L. Warner, unu post alia, venis kaj forŝtelis grandan kvanton da sutroj, antikvaj pentraĵoj, koloraj statuoj kaj freskoj. Sole la valoraj manskribitaĵoj el dinastioj de la Norda Vej ĝis la Norda Song (960-1127) jam nombriĝis pli ol 20,000 volvaĵojn. Depost tiam la nomo de Dunhuang fariĝis tutmonde konata. La pristudo de la kulturaj objektoj de Dunhuang disvolviĝis kiel speciala fakto de la arkeologio, sub la nomo de Tunhuanologio.

Nur post la grandskala forrabado fare de imperiistoj, la reakcia registaro ordonis ekspedigi la postlasitajn kulturajojn al Pekino. Sed por transporti tiom valorajn artaĵojn oni pakis nur per matoj

kaj ilin ĵetis sur ĉevalĉarojn, sen uzo de ligna kesto por protektado. Kaŭze de ŝtelado de diversrangaj burokratoj sur la vojo novaj perdoj okazis dum la transportado.

En septembro de 1949, Dunhuang liberiĝis. La popola registaro ordonis la Instituton por Esploro de Dunhuangaj Kulturaj Objektoj plenforte protekti kaj ripari la kavernojam. Oni renovigis 5 preskaŭ defalontajn lignostrukturaĵajn kadukajn markezojn el Tangkaj Song-dinastioj, forigis sabloamasojn, konstruis sablobarajn murojn, fosaĵojn kaj kontraŭakvan digon kaj riparitis pli ol 200 kolorajn statuojn. Ĉiu el la 488 kavernojam estis laŭplane riparta. En la kavernojam estis sternitaj tapiŝoj, kiujn la artistoj speciale projektis por ke la koloroj, linioj, stiloj kaj desegnoj estu harmoniaj kun la respektivaj kavernojam. Estis alfaritaj al ĉiu kavernojam pordoj delikate skulptitaj kaj dum la riparado kaj reordigado oni malkovris 17 aliajn novajn kavernojam de Tang-dinastio kaj de la Kvin Dinastioj. En la lastaj jaroj estas plivastigita la personaro de la Instituto por Esploro de Dunhuangaj Kulturaj Objektoj, kaj la ŝtato organizis landskale specialistojn de antikva arkitekturo, arkeologio,

*Majtrejo kun interplektitaj kruroj (kavernojam n-ro 275).*



# “Ministrino pr

## I

**L**A gvidanta instanco asignis al mi taskon iri al la Lingsana Produkta Brigado por esplori ĉu tie akumuligis lernindaj spertoj en la financa administrado de la produktaj grupoj de post la fondiĝo de la popola komunumo.

Jam krepuskiĝis kiam mi alvenis al la oficejo de la brigado. Kunveno de produktaj grupoj estis iranta tie por diskuti la distribuon, semadon kaj aliajn problemojn en tiu ĉi aŭtuno. La kunveno jam daŭris tutan tagon kaj la brigadestro estis donanta resuman paroladon. Post momento finiĝis la resumo. La grupestroj stariĝis, rektigis la lacajn taliojn, formetis la pipojn kaj estis pretaj por disiri. Tiam envenis el la najbara ĉambro la librotenisto de la brigado, kaj li diris ĝojplene: “Unu momenton! Unu momenton! La proviza-venda kooperativo de la komunumo asignis al ni en telefono kvin mil ĝinojn da kemia sterko. Supera amonia sulfato, kamaradoj! Kiu el viaj grupoj volas aĉeti? Tuj enskribu! Eble oni ne vendos al ni post la limdato!”

Estis la tempo por aŭtuna semado. Kiu ne volis havi iom pli da sterko, precipe amonia sulfato, la atuto el kemiaj sterkoj? Aŭdinte la vortojn de la kasisto, kvar-kvin grupestroj brue ĉirkaŭis lin kun ekbrilantaj okuloj:

“Nu, enskribu por mi mil ĝinojn!”

“Por mi mil kvincent!”

“Por mi du mil!”

“Por mi ĉiom de la restaĵo!”

“Ah, vi intencas monopoli! Neeble, neeble. . . .” kriis la kasisto ridante dum li rapide enskribis. Estis strange ke la grupestro, kiu estis plej proksima al la kasisto, anstataŭ konkure kapti la sterkon, malrapide paŝis al la sojlo, sidiĝis sur ĝi, blovekscitis la paperan ekbruligilon kaj komencis fumi la pipon. Li estis juna kaj altkreska kaj sidante sur la sojlo ŝtopis du trionojn de la pordo. Grandaj estis ankaŭ liaj kranio kaj sentorganoj, precipe la oreloj, kiuj estis tiel grandaj ke ili pendis ĝis la kolo kaj tremetis kiam li iris.

Tiu ĉi “grandorela” grupestro ne atentis pri la kemia sterko, la librotenisto tamen maltrankviliĝis por li. Elpuŝiĝinte el inter la grupestroj kiuj ĉirkaŭis lin por enskribi, li paŝis al la “grandorelulo” kaj diris: “Zeng San, ĉu via Tria Grupo ne volas iom da kemia sterko? Tuj ili forkaptos ĉiom!”



*Avalokitesvaro (kaverno n-ro 159, el la malfrua periodo de Tang-dinastio 821-906 p.K.).*

artajoriparado k.a. por disvolvi grandskale la laborojn de studado kaj kopiado. Por tio estas liverataj bonkvalitaj farboj, speciale konstruita elektrejo, kaj instalitaj elektraj kaj hidrargaj lampoj.

Depost la Liberiĝo, oni okazigis en Pekino 3 ekspoziciojn de Dunhuang-arto kaj krome ankaŭ en multaj fremdaj landoj. Tiu ĉi trezorejo de artaĵoj jam akceptis vizitantojn preskaŭ el la tuta mondo. Multaj sovetiaj kaj orienteŭropaj pentristoj ĝin vizitis kaj inter la eksterlandaj gastoj estis ankaŭ direktoro de egipta muzeo, hinda profesoro, itala ĵurnalisto, Dekano de Kanterberi (Canterbury) kaj multaj aliaj. Moderna hotelo jam staris tie en Dunhuang por bonvenigi kun ĉiam malfermita pordo la amikojn el la tuta mondo.

\* *Daŭŝi* —pastro de Daŭ-religio.



# la Financoj”

*Ilustraĵoj de Vu Venjuan*

La “grandorelulo” returnis la kapon kaj elspirante blovon da fumo demandis kun duonfermitaj okuloj: “Kiom ĝi kostas po ĝino?”

“Tre malkare. Nur dek ok cendojn\* ĝi kostas po ĝino.”

“Mia ĉielo!” diris la “grandorelulo” larĝigante la okulojn. “Unu ĝino kostas dek ok cendojn. Dek



ĝinoj, unu juanon okdek cendojn; kaj cent ĝinoj, dekok juanojn, kiuj estas egalvaloraj al unu aŭ du dan-oj\*\* da tritiko.”

“Ah,” urĝis la kasisto, “ĉu vi ja volas aŭ ne?”

“Nu, por mi enskribu kvindek ĝinojn,” respondis la alparolato kvazaŭ kun granda peno.

Kelkaj apudestantaj grupestroj rideksplodante diris: “Ĉu vi uzos la kemian sterkon kiel okulpaston, Zeng San?”

“Kial miri?” diris serioze la “grandorelulo”. “Se por la aŭtuna semado ni jam pretigis sufiĉe da sterko, pro kio ni do konkuraĉetu tiom da kemia sterko? La aĉetotaj dekoj da ĝinoj aplikiĝos nur por plirapidigi la kreskon de malfortaj plantidoj estonte.”

“Bone,” la librotenisto malaprobe lipgrimacis kaj enskribis kvindek ĝinojn sur la papero. Kiu atendis ke tuj post la enskribo la “Grandorelulo” tamen rimarkigis: “Mi ankoraŭ ne estas certa ĉu mi povos aĉeti la kvindek ĝinojn. Lasu min konsiliĝi . . . post la hejmeveno . . .”

La aliaj grupestroj refoje ekridis kaj diris: “Kia estro vi estas ke vi ne kuraĝas decidi eĉ la aĉeton de kvindek ĝinoj da kemia sterko!” “Vi petos instrukcion de via ‘Ministrino pri la Financoj’, ĉu ne? Hm. . . .” diris unu el ili. Post tio hahaha-bruo denove skuis la ĉambron.

“Kio ridindas en instrukcipeto?” gravmiene diris la “grandorelulo”, tute ne atentante pri la moko.

“Kio?” mi demandis al la grupestro kiu estis apud mi. “Ĉu li ankoraŭ devas demandi ‘Ministrinon pri la Financoj’? Kiu estas tiu ministrino?”

“La librotenisto de la grupo, junulino.”

Por diri la veron, mi multe interesiĝis pri la “grandorelulo” kaj lia “Ministrino pri la Financoj”, ĉar ili ĝuste koincidis kun tio kion mi intencis esplori. Tial kune kun la “grandorelulo” mi iris tiunokte viziti la Trian Produktan Grupon de la Lingsana Brigado.

## II

Post la komenco de la irado, mi demandis la “grandorelulon” pri lia “Ministrino pri la Financoj”. Li ekridis kaj post momento da meditado torente malkaŝis ĉion al mi:

“. . . . Vidinte ke ĉiuj min primokis pro tio ke mi devas demandi la opinion de la librotenistino eĉ pri la aĉeto de kvindek ĝinoj da kemia sterko, vi pensas ke la ‘Ministrino pri la Financoj’ limigas min tro strikte kaj mi la grupestro estas tro senkapabla, ĉu ne? Jes, antaŭe ankaŭ mi mem tiel pensis eĉ sen alies moko. Pro la financaj elspezoj mi ofte disputis kaj kverelis kun ŝi, kaj mi eĉ deklaris foje ke mi neniam staros kun ŝi sub la sama tegmentrando kaj ke ŝi funkcios kiel librotenisto de la grupo, mi ne servos kiel ĝia estro.

“Nu, prefere mi rakontu dekomence. Tio okazis en la jaro kiam mi ĵus fariĝis grupestro kaj ŝi kasisto, t.e., en la jaro kiam fondiĝis la komunumo. Ĵus fari-

ĝinte kadro, mi laboris energiplene. En la vespero de la tago kiam ni estis elektitaj, mi iris al ŝi kaj diris: 'Kiaŭkiaŭ, de nun vi estas la librotenisto kaj mi la estro. Estante la du ĉefaj gvidantoj de la grupo, ni havas tre grandan respondecon. Ni laboru kieleble plej bone.'

"'Kompreneble,' ŝi diris.

"'Ni devas unuiĝi kaj helpi reciproke.'

"'Sendube,' ŝi diris palpebrumante. 'Mi timas nur ke viaj oreloj. . . .'

"Fakte, miaj oreloj estis tre *molaj* † antaŭe. Kion oni diris, tion mi kredis. Ofte mi ne povis fari tujan decidon. Plie, ĉar miaj oreloj estas denaske grandaj, la popolamaso nomas min 'past-orelulo'. Ŝi timis ke mi eble faros eraron pro tiu ĉi malfortaĵo. Tiam mi respondis: 'Aj, nun mi fariĝis kadro. Ĉu mi povas ankoraŭ kondukti kiel antaŭe? Mi garantias ke miaj oreloj estos ne plu molaj. La oficialaj aferoj estos traktataj oficiale.'

"'Tute prave,' ŝi ridis.

"Dum la unuaj tri monatoj depost mia enoficiĝo, mi kunlaboris kun ŝi sufiĉe harmonie. Iutage la komunumano 'Vang la Sentaŭga' venis al mi, petante ke la grupo pruntedonu al li kvin juanojn. Mi bone sciis ke Vang estas 'friponemulo', kiu kutime estas mallaborema kaj ŝatas esti senokupa, kaj ne volis konsenti en la komenco. Sed titolante min grupestro li petis foje refoje, klarigante ke lia infano estas malsana kaj li eĉ ne havas monon por aĉeti medikamenton. Dume li preskaŭ larmis. Kiel kompatinde. . . . Ekmoliĝis mia koro. Mi konsentis kaj tuj skribis por li noton sur slipo, ke li iru kun ĝi al la librotenistino Kiaŭkiaŭ por la mono. Kiu atendis ke post momento



'Vang la Sentaŭga' revenis kaj tordinte en paperbulon la slipon kiun mi donis al li, forjetis ĝin tre malproksimen. 'Furze efikis la slipo,' li kriis. 'La kasisto ne donas la monon!' Mi ekkuntiris la brovojn, elpoŝigis unu juanon kaj petis 'la Sentaŭgan' unue aĉeti medikamenton por la infano per la mono. Poste mi tuj forrapidis por serĉi Kiaŭkiaŭ. Trovinte ŝin, mi rekte demandis: 'Ĉu vi vidis mian slipon?'

"'Jes,' ŝi respondis eĉ ridante, 'Ĉu vi volas ke la grupo pruntedonu monon al 'la Sentaŭga' por ke li konsultu kuraciston por sia infano?'

"'Jes, ja. Kial vi ne donis la monon vidinte la slipon?'

"'Doni monon?' ŝi diris. 'Unue tio ne estas konforma al la regularo.'

"'Kia regularo?'

"'La regularo aprobita de vi, de la komitato de la grupo kaj de la komunumanoj: la grupestro povas decidi nur pruntedonon de unu aŭ du juanoj, la pruntedono de pli ol kvin juanoj devas esti decidita de la komitato kaj tiu de pli ol dek juanoj de la tuta anaro.'

*Vortoj de Ĝingĉen*  
*Bildoj de Je Feng*

## Bildoj pri Antikvaj Dancoj de Ĉinio



(Daŭrigo de la lasta numero)

20. Laŭ ŝtona bareliefo en la Groto de Dekmil Budhoj de la fama ŝtonkaverno en Longmen, Henan-provinco, farita en 680 p.K.



“Nu, mi diris, ‘vi do almenaŭ devas pruntedoni al ‘la Sentaŭga’ unu aŭ du juanojn laŭ la regularo!’

“Jes, mi devus,’ ŝi diris serioze. ‘Kvankam ‘Vang la Sentaŭga’ estas malhonesta, tamen malsaniĝo de lia infano estas tute alia afero. Se ĝi efektive malsaniĝus, ni devus pruntedoni al li kun aprobo de la komitato aŭ al anaro dek aŭ kelkdek juanojn, por ne paroli pri unu aŭ du juanoj.’

“Kiel prave ŝi parolis. Mi demandis: ‘Pro kio vi do ne pruntedonis? Do vi volas intence hontigi min kaj bari la elirejon al la komunumano?’

“Bari la elirejon al komunumano?’ Subite ŝi ĉesigis la ridon kaj movante la du kling-similajn lipojn daŭrigis: ‘Vi estas burokratisma, sed mi ne povas esti same burokrata kiel vi!’

“Kio? Burokrata?’ mi ruĝiĝis pro kolero.

“Aŭdinte tion, Kiaŭkiaŭ tiris min al la malgranda manĝejo, kaj mi vidis tie ke ‘Vang la Sentaŭga’ estas drinkanta sorgbrandon kaj manĝanta bovpiedon aĉetitajn per mia mono. Lia infano tute ne malsaniĝis.

“Kion fari? Post tio mi povis nur konfesi mian eraron antaŭ Kiaŭkiaŭ kaj esprimis mian decidon ke tiam mi nepre bone esploros rilate al tiaj homoj kia ‘Vang la Sentaŭga’ kaj miaj oreloj neniam plu estos molaj.”

Post paŭzo li malrapidigis la paŝadon kaj diris: “Tiaj okazajoj estis ankoraŭ elporteblaj. En plej malbona kazo mi povas fari memkritikon kaj klini antaŭ ŝi la kapon sen scio de la publiko. Sed ĉe iuj aliaj okazoj ŝi metas vin en embarason rekte antaŭ la popolamaso, lasante al vi nenian spacon por elturniĝi. Tio estas apenaŭ tolerebla. . . .

“Lastan aŭtunon, nia komunumo bone plenumis ĉiujn politikojn, precipe tiun de agado konforma al la lokaj kondiĉoj, semis la somerajn rikoltaĵojn ĝustatempe, kaj krome sterkis sufiĉe abunde kaj sarkis unu fojon pli ol kutime. Tial tiun ĉi someron kiam ni rikoltis la meznombra produktokvanto po muo estis pli ol 400 ĝinoj kaj la totala produktokvanto pliiĝis je 30% ol tiu de la lasta jaro. Ĝi estas la jaro de plej alta produktokvanto de somera rikolto depost la Liberiĝo. Ni superplenumis la vendokvoton de greno al la ŝtato je 10,000 ĝinoj. La komunumanoj ankaŭ ricevis pli grandan someran porcion ol lastjare. Ĉar nia kontribuo al la ŝtato estis pli granda kaj ni prizorgis la vivon de la komunumanoj pli bone, ni ricevis la unuan ruĝan flagon en la kunveno de la komunumo por elekti modelajn produktogrupojn. La partia komitato de la komunumo laŭdis min kaj la aliaj grupestroj elmetis skribojn por montri sian decidon lerni de mi. Tiun tagon, dum la juĝado kaj bankedo en la oficejo de la komunumo, mi estis tiel ekzaltita kvazaŭ mi estus ŝvebanta en la aero. Post la bankedo, la filmo-projekcia grupo de la guberniurbo ĝuste preterpasis nian komunumon. Iuj grupestroj, precipe tiuj de niaj najbaraj vilaĝoj, kune urĝis min regali ilin per filmo-prezentado, dirante: ‘La Tria Grupo de la Lingŝana Brigado estas la unua ruĝa flago en la komunumo. Kial vi ne regalu nin?’

“Kiamaniere regali?’ mi demandis.”

“Invitu la filmo-projekcian grupon al via vilaĝo por prezenti unu filmon, tiel ke la komunumanoj kaj de via grupo kaj de la najbaraj grupoj povos rigardi. Tiamaniere samtempe vi regalos la gastojn kaj celebros la sukceson. Kiel bele!”



21. Unu el kvar dancistinaj statuoj el tombo de Tang-dinastio (618-907 p.K.) en Taj-juan, Ŝanhi-provinco.



22. Laŭ dancistina statuo el tombo de Tang-dinastio en Luoĵang, Henan-provinco.



23. Iu kurioza dancistina statuo de Tang-dinastio, prezentanta ŝajne dancan *tajaŭniang* tiam popularan.

“Ja vere. Tio ankaŭ povos elmontri ke nia Tria Grupo estas riĉa kaj malavara. Sen aliaj konsideroj mi konsentis senhezite. Tio vekis longan aplaŭdadon de ili, kaj ili laŭdis ripete pri mia malavareco.

“Mi transgrimis kun la filmo-projekcia grupo kelkajn montojn, helpante ĝin jen per portado de la projekciilo, jen per tiu de la filmoj. Ni marŝadis la tutan posttagmezon. Kiam ni alvenis al nia grupo, jam krepuskiĝis. Kune kun kelkaj komunumanoj mi starigis stangojn kaj pendigis la ekranon. Apenaŭ pendigis la ekranon kiam Kiaŭkiaŭ venis dirante: ‘Ho, filmoprezento?’

“‘Jes,’ mi respondis.

“‘Kiu filmo?’

“‘LA RUĜA VIRINA KORPUSO.’

“‘Brave!’ Ŝi diris ĝoje. ‘Mi volas ĝin rigardi jam delonge. Oni diris ke ĝi estas kaj interesa kaj instrua.’ Subite ŝi demandis denove: ‘Kiu pagos?’

“‘Ni havis riĉan rikolton kaj faros nun regalon. Kompreneble nia grupo pagos.’

“‘Nia grupo pagos? Kiom?’

“‘Mi ankoraŭ ne sciis klare, tial mi tuj demandis la projekciiston apud mi. Li respondis: ‘Tridek juanojn.’

“‘Ekbrilis la okuloj de Kiaŭkiaŭ. ‘Tridek juanojn,’ ŝi diris. ‘Sub kiu rubriko ni pagu?’

“‘Sagaca ideo subite venis en mian kapon: ‘Nu, ĉu nia grupo ne havas ducent juanojn da fonduso? Ni pagu do el tio.’

“‘Kiel grandanime vi parolas. Kvazaŭ riĉulego vi estus.’ Ŝi diris tuj senride: ‘Tridek juanoj egalvaloras kelkajn *dan*-ojn da tritiko aŭ la ŝvitado de la komunumanoj dum unu vintro kaj unu printempo.



24. Dancistino el la fresko en tombo de Tang-dinastio en Hi-an, Ŝenhi-provinco.



25. Bildo trovita en tombo de Tang-dinastio en Hi-an, Ŝenhi-provinco, prezentanta ŝajne *huteng*-dancon tiam popularan.



26. El la Dunhuang-aj Freskoj de la malfrua Tang-dinastio t.e.ĉ. la 10-a jarcento.



Ni ankoraŭ ne atingis la stadion de tia abundeco! Ni povas konkuri kun aliaj grupoj pri terkulturado, sed ne pri elspezo!

“Mi rapidis klarigi: ‘Ĉu vi ne diris ke la filmo estas kaj interesa kaj instrua? Por la komunumanoj. . . .’ Sed ŝi interrompis min kaj ree movante siajn kling-similajn lipojn diris firmdecide: ‘Kamarado grupestro, mi diru al vi jam nun ke tio estas nebla. Laŭ la difino de la membraro la akumulata fonduso povas esti uzita nur por la baza konstruado por kolektiva produktado kaj venki katastrofon en malbonrikolta jaro. Estas neniam difinite ke ĝi povas esti uzita por laŭplaĉe regali aliajn per filmo-prezentado.’ Tion dirinte, ŝi eksvingis la mallongan hararon kaj foriris sen returni la kapon.

“Tiam la anoj de nia grupo jam venis portante siajn benkojn kaj ŝidiĝis antaŭ la ekrano. Ankaŭ tiuj de la najbaraj grupoj venis unuj post aliaj en la prezentejon. Multaj konatuloj min salutis, dankante pro la regalo . . . . La alvenintoj ankaŭ manklakis de tempo al tempo por urĝigi la komencon de la prezentado . . . . Tiam mi vere estis kvazaŭ formiko kuranta en varmega kaldrono kaj ŝvitegis tutkape. Mi povis fari nenion alian ol peti iun intiman komitanon propeti Kiaŭkiaŭ pro mi. Li klopodis por mi kaj alparolis Kiaŭkiaŭ: ‘Kamaradino, lasu pasi tiun ĉi fojon. Similaĵo nepre ne okazos.’ Kaj mi diris: ‘Oni devas havi akomodigemon en laboro. Ĉu vi ne povas esti iom malrigida?’ Neniom ŝi malstreĉis sian persistemon kaj diris: ‘Mi konsentus se la mono estus mia. Sed ĝi apartenas al la tuta grupanaro.’ Fine mi diris preskaŭ ploronte: ‘La rizo jam fariĝis kaĉo. Vi ja devas iel lasi min elturniĝi. . . .’

“‘Vi povos elturniĝi se nur monon vi ne postulos de mi.’

“‘Bone,’ mi diris, ‘kiel do vi konsilas?’

“‘Unue vi memkritiku antaŭ la anoj de nia kaj aliaj grupoj ke vi intencis laŭplaĉe pagi la elspezon de filmo-prezento el la akumulata fonduso por ludi luksecon . . . . kaj diru ke poste vi nepre korektos . . . . Post tio mi havos rimedon por ke vi elembarsigu. La filmon oni povos same rigardi kaj ricevi instruon. . . .’

“Kion fari, se la praveco kuŝis ĉe ŝia flanko! Mi povis fari nenion alian ol pene elteni memkritikon antaŭ la popolamaso konfesante pri kio vere okazis. En la filmo-prezentejo mi ne sciis kien direkti mian vizaĝon, mi preferus ĝin kaŝi inter la du pantalonkruroj. Ve al mi pro la parademo! Estis ankoraŭ bone, ke la komunumanoj ne mokis min; oni nur diris: ‘Surtroniĝinte en Pekino, Li Ziĉeng tuj forgesis la antaŭan malriĉecon.’ Aliaj diris: ‘Tiu ĉi Past-orelulo refoje malkaŝis sian malfortaĵon.’ Ankoraŭ aliaj diris: ‘Ilia ‘Ministrino pri la Financoj’ bone scias la takton, alie kiel la grupo povus pliigi la enspezon ĉiujare?’

“La filmon oni ĝuis dank’ al solvo elpensita de Kiaŭkiaŭ: Ĉiu pagis dek cendojn kaj la kolektita sumo atingis pli ol tridek juanojn. Pro la okazaĵo mi malsanis du tagojn kaj ĵuris ke de post tiu tempo mi neniam plu ludos luksecon. . . .’

Kiam li rakontis ĝis tie, la lunarko komencis aperi en la oriento. Antaŭ ni estis monto kaj vidiĝis malklare serpentumanta vojeto. Ni surgrimpis krutan deklivon. “Eble vi laciĝis,” li diris. “La vojetoj en



27. Ankaŭ laŭ dancistina statuo el tombo de Tang-dinastio.



28. Laŭ la dancistina statuo el tombo de Li Ŝeng, la fondinto de la Suda Tang-dinastio (937-975 p.K.).



29. El fresko “Geedziĝa Cereemonio”, farita en la 10-a jarcento en la 38a groto de la Julin-a Kaverno en Anhi, Gansu-provinco.

la montoj estas malfacilaj.” “Se mi iras kaj iras,” mi respondis, “mi povas al kutimiĝi. Daŭrigu vian rakontadon!”

“Por homoj,” li ekĝemis kaj diris kun profunda emocio “efektive sperto saĝon akriĝas. Post la suprediritaj kelkaj lecionoj, mi fariĝis tre singardema pri la pruntedonoj kaj neproduktaj elspezoj. Mi pensis, ke mi ne plu faros erarojn en financaj aferoj estonte. Kiu atendis, ke kiu havas tian malfortajon, tiu ofte atentis tion sed neglektas alion. . . . Ekzemple, tiun ĉi aŭtunon nia komunumo suferis pro sekegeco senprecedenca dum la pasintaj cent jaroj. Nia grupo kreskigis kvindek muojn da rizplantoj. Al ĉiu parcelo mankis akvo. Mi estis tiel maltrankvila ke la kapo turniĝadis. Mi pensis pri akvo tage kaj nokte, dum manĝado kaj sonĝado. Sen akvo niaj kvindek muoj da rizplantoj estos finitaj kaj tiamaniere la akirebla ora rizo estos oferita al la ĉielo! Iutage, kiam mi estis ĉerpanta akvon kun la komunumanoj por kontraŭi la sekegecon, la provizavenda kooperativo de la komunumo sendis iun diri al mi ke ĵus alvenis kvanto da pumpiloj kaj ke mi tuj iru kaj mendu. Tio ja estis ege ĝojinda novaĵo. Fluge mi rapidis malsupren de la monto eĉ ne lavinte la kotplenajn piedojn. Alveninte tien, mi trovis ke kelkaj aliaj grupestroj jam estis tie. Ĉirkaŭante la pumpilojn, ili estis rigardantaj, elektantaj kaj konkuraciantaj la maŝinojn. Kompreneble, dum tia sekegeco, ja kiu ne volus havigi al si iom pli da pumpiloj? Tiam ankaŭ mi senhezite min enpuŝis kaj komencis konkuraĉeti. Pro tio ke mi estis elokventa kaj priskribis la sekegecon de nia grupo precepte serioza, sekve mi sukcesis mendi plej multe,

entute tri. La estro de la kooperativo al mi demandis: ‘Ĉu vi efektive aĉetos tri?’

“Kia tempo estas nun!” mi diris fanfarone kun malfermita buŝo, ‘Eĉ dek pliajn mi aĉetus.’

“Ne nuligos la mendon?”

“Kial nuligi? Tiuj tri estas tiel fikse menditaj kiel najlo en tabulo.’

“Do iru por la mono kaj revenu por preni la varojn.’ Kaj li diris al mi kiom kostas ĉiu pumpilo.

“Mi flugrapide revenis.

“Unue mi iris al la loko kie grupanoj estis ĉerpantaj akvon kaj rakontis al ili kiel mi pene sukcesis mendi tri pumpilojn. Ĉiuj ekĝojegis kaj multaj eĉ laŭdis mian kapablon kaj diris: ‘Nun la rizplantoj estos savitaj kaj la homoj ne bezonos penlaboregi.’

“Tiam subite mi ekvidis ke el la homamaso elvenis Kiaŭkiaŭ, kiu verŝajne volis paroli kun mi. Mi do rapidis al ŝi kaj diris: ‘Tuj donu al mi monon, ke mi iru kun iuj malsupren por alporti la maŝinojn. Ĉivespere ni starigos ilin apud la rivereto kaj ĉiuj aŭdos la ‘brubrubruon’ de la maŝinoj kaj la ‘murmurmuron’ de la akvo. Mi garantias ke la rizplantoj ekridos kontente.’

“Kiaŭkiaŭ tamen trankvile demandis: ‘Kiom kostas ĉiu maŝino?’

“Mi respondis laŭ la originalaj vortoj de la kooperativestro: ‘Por ĉiu kompleto, inkluzive de la kaŭĉuka kaj fera tuboj kelkdek futojn longaj, la prezo estas ducent juanojn.’ Plie mi aldonis: ‘Malkare, malkare.’

“‘Malkare, efektive, sed tri kompletoj kostos sescent.’ Ŝi pripensis momenton kaj kapskuis malrapide: ‘Neaĉeteble por ni, ĉu?’



30. Laŭ skulptaĵo sur la ĉerkpedestalo de Vang Gian, fondinto de la Antaŭa Ŝu-regno (907-925 p.K.).



31. Movo el la popola danco *gijang* laŭ bildo farita en la 11-a jarcento.



32. Dancmovo de unu dancistino el Dunhuang-fresko farita en Song-dinastio (960-1279 p.K.).



“Tiun fojon mi ekkoleris kaj diris: ‘Ja stranga la librotenistino vi estas. Ĉifoje ne temas pri pruntedono de mono al aliaj, nek pri elspezo por regalo per filmo-prezentado, kaj ankaŭ ne pri malŝparo . . . . sed tion mi faris por kontraŭi la sekegecon, por la produktado. Tio estas tute konforma al la regularo pri la financoj! Kial vi ne volas doni monon? Kial? Mi sentis min tiel plene prava ke mi ŝovis mian fingron antaŭ ŝian nazon.

“Ĉiuj komitatanoj de la grupo kaj la popolamaso min subtenis, dirante: ‘Ĉifoje vi malpravas, Kiaŭkiaŭ. La grupestro elspezas ja por bona afero.’

“Kaj mi min pliproksimigis al ŝi dirante: ‘Ĉu vi donos aŭ ne?’

“‘Ne!’ ŝi respondis eĉ pli malmoliĝinta.

“‘Bone,’ mi diris raŭke. ‘Ĉu devas vi, la librotenistino gvidi min la estron, aŭ mi la estro gvidi vin la librotenistino? Ĉu devas vi aŭskulti la popolamason, aŭ la popolamaso aŭskulti vin? Ne obeante la vortojn de la estro nek akceptante la opinion de la popolamaso, kio do vi estas!’

“‘Librotenistino!’ ŝi diris spite. ‘Ŝi sin turnis for de mi al la amaso kaj demandis: ‘Ĉu vi prialkulis? Kiom povos esti rikoltita el niaj kvindek muoj da rizkampoj ĉijare?’

“‘Pro la sekegeco, eĉ se saviĝos la rizplantoj, maksimume ducent ĝinoj da greno povos esti rikoltitaj po muo,’ asertis multaj el ili.

“‘Jes, ducent ĝinoj po muo, do dekmil ĝinoj el kvindek muoj. Laŭ la merkata prezo de sep juanoj po cent ĝinoj, ili valoras sume sepcent juanojn. Sed por la pumpiloj sescent juanoj devus esti elspezitaj. Krome, estos pagendaj ankaŭ la oleo, riparado, . . . .

Eble la sumo enspezota ne sufiĉus por la elspezoj de la maŝinoj.’

“Tiel solida estis tiu argumento ke ĝi tuj senvortigis min. Ankaŭ la komitatanoj kaj la popolamaso silentiĝis pro ŝia kalkulo.

“‘Ni proponas,’ ŝi daŭrigis, manipulante la du kling-similajn lipojn, ‘ke ni aĉetu ne pli ol unu pumpilon, kiu estos sufiĉa por nia uzo. La mendo pri la aliaj estu decideme nuligita, por ke la kooperativo subtenu aliajn grupojn, kies sekegeco estas pli grava ol la nia. Por la tridek muoj kie la sekegeco estas malpli grava, ni uzu la dek indiĝenajn akvoĉerpilojn. Ĉiu ĉerpilo povas akvumi tri muojn. Se ni ĉiuj nur penos, ni povos plenumi la taskon. Kiel vi opinias? . . . . Nia grupo ne estas tiel riĉa ke ni ne plu havas lokon por teni monon. Se ni povas ŝpari moneron, kial ne ŝparu? Se ni povas cedi unu pumpilon por subteni alian grupon, kial ni nepre ĝin konkuraĉetu kaj firmtenu?’

“‘Prave,’ diris stariĝante la veterana kamparano Avo Liu kiun ĉiuj estimas, ‘tio estas vere bonmas-truma kalkulo!’ Tiam ankaŭ el la popolamaso bruo aŭdiĝis tie kaj tie:

“‘Nu, aĉetu nur unu!’

“‘Bonege estas ke ni nuligu la mendon de la ceteraj! Ni kaj ŝparos monon kaj subtenos aliajn grupojn!’

“‘Ni kutimiĝis al fortobezona laboro. Ĉu ni timus fortostreĉon!’

“Versajne la klopodo per kiu mi sukcesis mendi la pumpilojn denove montriĝis vana.

“Fine ĉiuj konsentis unuanime la opinion de Kiaŭkiaŭ kaj ni aĉetis nur unu pumpilon. Kiam mi



33. Laŭ fresko en Jongl-palaco konstruita en Juandinastio (1271-1368 p.K.).



34. Laŭ ligna dancista statuo de Ming-dinastio (1368-1644 p.K.).



35. Dancmovo de knabineto en la *djangge*-danco de Kingdinastio (1644-1911 p.K.).

malŝupreniris la monton por pagi la monon kaj preni la maŝinon, la estro de la kooperativo, ĉu ŝerce aŭ serioze, diris al mi: ‘Kamarado, en la estonto kiam vi aĉetos ion ajn por la grupo, prefere unue konsultu vian ‘Ministrinon pri la Financoj’ . . . .’

“Kiel ajn, malgraŭ tia sekegeco, nia grupo en tiu ĉi aŭtuno estas ankoraŭ ‘grupo de kvar garantioj’ (T.e. garantioj de manĝoprovizo, semoj, furaĝo kaj kvoto por la ŝtata enaĉeto — noto de la verkinto) kaj la neta enspezo de la komunumanoj ankoraŭ pliiĝis je 3% ol en lasta aŭtuno. Tio rezultiĝis el tio ke ni bone atentis la laborojn kontraŭ la sekegeco: Kvan-kam la produktokvanto de rizo malpliiĝis, ni tamen estis bone rekompencitaj en kulturado de la sekkampaj plantaĵoj kaj de virga tero; krome, ni mastrumis kun laboremo kaj ŝparemo, bone kalkulante pri ĉio . . . . Kiam ajn mi ekpensas pri tio, mi ne povas ne danki la librotenistinon Kiaŭkiaŭ, kiu tiel ofte disputis kun mi kaj hontigis min antaŭ aliaj. Por diri la veron, havi tian ‘Ministrinon pri la Financoj’ estas efektive malofta feliĉo.”


### III

Dum la parolado ni jam transiris la monton. Antaŭ ni kuŝis facile irebla ŝoseo. Prezentiĝis vilaĝo ŝirmata de arbaro. “Jen, ni alvenas,” rimarkis la “grandorelulo”. Li senpacience eniris la vilaĝon, gvidis min antaŭ unuetaĝan domon kaj diris: “Jen la sidejo de la grupa komitato”. Ni enpaŝis kaj mi vidis knabinon sidanta ĉe tablo kaj absorbite kalkulanta per abako. Aŭdinte niajn paŝojn, ŝi levis la kapon kun nigra hararo, paro da brile klaraj okuloj kaj du lipoj kaj maldikaj kaj lertaj. La “grandorelulo” konatigis ŝin al mi dirante: “Jen estas Kiaŭkiaŭ.” Li klarigis al ŝi mian intencon kaj aldonis: “Mi rakontis al li ankaŭ niajn kverelojn.”

Ridante Kiaŭkiaŭ diris al mi: “Aŭdinte kion nia grupestro diris, eble vi supozas ke mi estas avarulino.”

“Tute ne,” mi respondis.

Turnante la viglajn klarajn okulojn, ŝi diris: “Mi devas tiel agi. La supera instanco diris: la konstruado de la komunumoj estas kiel tiu de domo sur la tero. Ni devas ŝpari ĉiun juanon ŝpareblan. Ni devas antaŭeniri paŝon post paŝo. Prave, ni do antaŭeniras paŝon post paŝo . . . . Fakte, niaj ambicioj ne estas malgrandaj.” Tion dirinte, ŝi prenis el tirkesto diagramon pri la tri- kaj kvin-jaraj planoj de produktado kaj vivo de la grupo. Sur ĝi estis science indikite laŭ la pliprodukto en la pasintaj jaroj kiom pliproduktiĝos en ĉiu jaro kaj kiel pliboniĝos la vivo. Kiel belan staton la produkta grupo de montregiona



komunumo havos post kelkaj jaroj: Iom post iom efektiviĝos tie mekanikigo! Tiam Kiaŭkiaŭ ne uzos indiĝenajn akvoĉerpilojn por anstataŭi pummaŝinon! Tiam ili havos ankaŭ filmo-projekciilon kaj povos mem projekcii kiam ajn ili volos rigardi filmojn. . . . La fakto ke ili estas nun tiel ŝparemaj kaj detale kalkulas pri ĉio ja estas por la pli granda celo, la pli feliĉa morgaŭo!

Rigardinte la diagramon kaj poste rigardinte Kiaŭkiaŭ kiu staris antaŭ mi, mi forte sentis: Kiel firman fundamenton kaj kiel grandan vivforton niaj komunumoj havas! Tiun vesperon, ni havis varman interbabiladon kaj la “grandorelulo” aranĝis por mi dormejon en la ĉambro najbara al la kontoro. Post enlitiĝo mi aŭdis malklare, ke ili ankoraŭ interkonsiliĝas pri io en plena akordo. Post momento, ili foriris. Tamen, ĉar mi ankoraŭ ne povis endormiĝi, mi konsideris kiel resumi la sperton de la financa administrado de tiu ĉi popolkomunuma grupo kaj pensis pri ĝia pli malproksima kaj pli bela estonteco. Mi ne sciis kiam mi dolĉe endormiĝis.

\* Cendo: Centono de juano.

\*\* Dan-o: ĉina pezunuo egala al 50 kilogramoj.

† “Havi molajn orelojn” estas ĉina idiotismo kiu signifas “esti tre kredema”.



# POEMOJ EL SONG-DINASTIO

ĜANG JU:

## *Bredistino de Silkraŭpoj*

*Hieraŭ mi vizitis nian urbon,  
Kaj ĵ' tukon malsekigis larmkaskado.  
Neniu el la plene silkvestitaj  
Sin priokupas per silkraŭp-bredado.*

LI GANG:

## *Malsana Bovo*

*Mi plugis jam mil muojn kaj plenigis mil grenejojn,  
Sed kiu min kompatas morte lacan en la nuno,  
Se nur amaso ne plu konus frost-malsato-veojn,  
Senplende kuŝus mi marasma en la vesper-suno.*

LU JOŬ:

## *Al la Filoj*

*Mortinte mi plu povos jam nenion,  
Sed mi bedaŭras splitan la patrion.  
Se Mezĉinion Reĝa Trup' reprenos,  
Al Paĉjo preĝinformu nepre tion.*

Trad. Laŭlum

**ĜANG JU** vivis ĉirkaŭ 1039 p.K. Li plurfoje partoprenis la plej altgradan imperiestran ekzamenon sed ne sukcesis. Poste li vivis ermite en Kingĉeng-montaro, Siĉuan-provinco.

**LI GANG** (1083-1140 p.K.) estis nacia heroo de Song-dinastio. Instalite kiel ĉefministro en la komenca periodo de Suda Song-dinastio, li projektis reformojn pri la ŝtata administrado. Li estis persekutita de la kapitulacistoj kaj mortis sen efektivigo de sia nobla volo. Ne malmultaj el liaj poemoj estas plenaj de patriotismo.

**LU JOŬ** (1125-1210 p.K.) estas unu el la plej grandaj patriotaj poetoj en la ĉina historio. El lia riĉa verkaro konserviĝas ĝis nun pli ol 9,300 poemoj, kiuj profunde influis la ĉinan poezion. La poemon *Al la Filoj* li verkis nelonge antaŭ sia morto. Tiutempe la popolo en Mezĉinio suferegis sub la glavoj de invadantoj kaj la poemo kortuŝe esprimas la sensanceliĝan fidon de la poeto pri la reunuigo de sia patrolando.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

## **La Reĝo de Laoso Entuziasme Akceptita**

Invitita de nia prezidanto Liu Ŝaŭki, la reĝo de Laoso Sri Savang Vatthana vizitis Pekinon je la 6-a de marto kun la kronprince Sourya Vong Savang kaj la ĉefministro Sonvanna Phouma kaj aliaj ministroj. Ili estis entuziasme akceptitaj kaj de niaj ŝtataj gvidantoj kaj de la popolamaso de Pekino.

Tuj post la alveno de la alte distingaj gastoj, prezidanto Liu Ŝaŭki kaj aliaj ŝtataj gvidantoj ilin varme bonvenigis ĉe la aerodromo. Centmiloj da pekinanoj amasiĝis apud la stratoj je kelk-kilometroj longaj por ovacii la gastojn.

Prezidanto Liu kaj la reĝo ambaŭ faris paroladon ĉe la aerodromo akcentante la profundan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Laoso, kaj la gratulojn de Ĉinio al Laoso pro la venko de ĝia heroo batalo por sendependeco, libereco, neŭtraleco kaj paco.

La reĝo kaj liaj akompanantoj restis en Pekino kvin tagojn. Dum la tempo la reĝo intervidiĝis kun kamarado Maŭ Zedong kaj multaj aliaj ŝtataj gvidantoj. Speciale bonveniga amaskunveno kun pli ol dekmil partoprenantoj de la reprezentantoj de ĉiuj rondoj de Pekino estis aranĝita honore al la gastoj. La reĝo kaj liaj sekvantoj vizitis la faman Guanggi-templon por kulturi la budhan denton. Ili ankaŭ vizitis

la Muzeon de Malnova Palaco kaj teksan fabrikon de Pekino.

Ĉe la foriro la reĝo diris, ke li tre ĝojas, ke la vizito renovigis kun la granda ĉina popolo la bonajn rilatojn, kiuj ekzistis inter Ĉinio kaj Laoso.

## **Kreskas Lakto-Provizado en Pekino**

La pekinanoj nun konsumas dekoble pli multe da lakto ol antaŭ la Liberiĝo en 1949.

En 1962, la laktoproduktejoj en la periferio de Pekino provizis la ĉefurbon per 29,500,000 litroj da lakto, t.e. je triono pli multe ol en 1961.

Ekde la kuranta jaro, pli ol 10,000 familioj fariĝis novaj regulaj laktokonsumentoj.

# La Verda Tombo




Foto de Ĝeng Ĝingkang

**P**LI ol 10 kilometrojn for de la malnova Huhehaŭto, ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, sur la suda bordo de Dahej-rivero, kuŝas granda tombo el tero. Ĝi okupas areon de pli ol 130 aroj, kaj altas ĉ. 30 metrojn.

Tio estas la Verda Tombo en kiu kuŝas, laŭdire, la princino Vang Ĝaŭgjun de Han-dinastio, kiu edziniĝis al huna\* reĝo. Oni

diras ke ĉiuaŭtune kiam la herboj flaviĝis ĉie norde de la Granda Muro, sub la senlima ĉielo kaj sur vastega stepo nur la tombo restis kovrata de herboj en verda koloro. Tial ĝi ricevis la nomon Verda Tombo.

Vang Ĝaŭgjun estis korteganiĉino de la Imperiestro Juan de Han-dinastio. En la jaro 33 a. K., reĝo Huanhanie de la sudaj hunoj petis parenĉigon al la Han-imperi-

estro, kaj tiu ĉi ŝin edziniĝis al li. La edziniĝo de Ĝaŭgjun al la huna reĝo multe kontribuis al la paco kaj amikeco inter ambaŭ flankoj. En la sama jaro, la huna reĝo montris sian volon gardi por Han-dinastio ĝian nordan limregionon. Kaj pro tio oni titolis la han-dinastian regperiodon ekde tiu jaro per "Ĝinning", kiu signifas ke "la paco estas fine atingita." Tiu ĉi historia epizodo estas tradicie rakontata kaj vaste konata de la ĉina popolo kun la titolo "Ĝaŭgjun iris eksteren de la Granda Muro".

Multaj beletraĵoj estis verkitaj pri ŝi en diversaj dinastioj de Ĉinio. Jen kial tiom fama estas la Verda Tombo. Estas skribite, ke dum King-dinastio (1662-1722 p. K.), antaŭ la Verda Tombo troviĝis ŝtonaj tigroj, ĉevaloj, leonoj kaj flagoj. Sur la tombo staris malgranda kiosko, en kiu konserviĝis sutroj. Apude staris altaj salikoj. Ĉio ĉi malaperis poste, restis nur la ruina tombo kun sovaĝaj herboj, akompanata de kelkaj epitafaj ŝtonplatoj stariĝitaj depost King-dinastio.

Post la Liberiĝo, la popola registaro riparigis la tombon. Oni konstruis antaŭ ĝi kioskon, kaj ĉirkaŭe balustradon, interne de kiu arboj estas plantitaj. Nun en sia nova aspekto kun la kreskadoj ĝi vere fariĝis Verda Tombo.

\* La hunoj estis nomado loĝanta norde de la nuna Ŝanhi-provinco.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

## Novtipaj Maŝinoj Fabrikataj en Ĉinio

En 1962 estis produktitaj en Ĉinio 210 novtipaj maŝinoj antaŭe ne fabrikataj en nia lando. 38 el ili estas destinitaj por terkulturado. Speciala ilmaŝino por fabriki partojn de traktoroj estas ankaŭ provfabrikataj. Ĝi estas pli efika ol la ordinaraĵoj torniloj. Maŝinoj, kies produkto bezonas alte progresajn teknikojn, ekz-

tiuj por fari artfaritajn fibrojn, sintezajn fibrojn, kaŭĉukon k. a., troviĝas ankaŭ en la vico de novaj produktoj.

## Antaŭfabrikataj Domoj en Ĉinaj Kamparoj

Post vasta esploro de la loĝejoj de la kamparanoj tra la tuta lando, ĉinaj konstruaj inĝenieroj faris centojn da konstruaj desegnoj kaj ilin prezentis al la komunumanoj por aŭskulti iliajn

opiniojn. Nun jam pli ol 10,000 ĉambroj antaŭfabrikataj estas faritaj laŭ la elektitaj desegnoj kaj disdonitaj al popolkomunumoj en diversaj partoj de la lando. Tiuj novaj antaŭfabrikataj domoj ĝenerale konsistas el tri ĉambroj: du dormo-ĉambroj kaj unu kuirrejo. Tiuj por sudaj partoj de la lando havas du etaĝojn aŭ kun mansardo. Iuj gubernioj jam starigis fabrikojn por produkti tiajn domojn.



# Fablaj Rakontoj

## Disputo pri la Foreco de la Suno

Konfucio iam vojaĝis orienten, kaj renkontis survoje du infanojn inter si disputantajn. Konfucio demandis, kion ili pridisputis.

Unu el ili diris: "Mi opinias ke la suno estas plej proksime de ni, kiam ĝi ĵus aperas; kaj plej malproksime, kiam ĝi estas en la tagmezo." Sed la alia asertis la malon: "La suno estas plej malproksime, ĉe ĝia ekapero; kaj plej proksime, en la tagmezo."

"La suno kiu ĵus leviĝas en la mateno estas granda kiel ombrelo, kaj tagmeze ĝi malgrandas kiel plado, ĉu io ne estas granda, kiam ĝi estas proksime al ni, kaj malgranda, kiam malproksime?" diris unu.

"La suno ĵus leviĝanta, nin nur varmetigas; sed tagmeze ĝi varmegas kiel bolanta akvo. Ĉu ni

ricevas nur varmeton de la suno ne pro tio, ke ĝi estas malproksime de ni; kaj varmegon pro tio ke ĝi estas proksime?" diris la alia.

Aŭdinte iliajn argumentojn, Konfucio tamen ne povis solvi la demandon. La du infanoj diris kun rido: "Ĉu ne estas babilajo ke saĝulo vi estas?"

## Ki-regnano Or-avida

Antaŭ longe, en Ki-regno troviĝis homo, kiu oron avidis. Iun matenon, surmetinte siajn veston kaj ĉapon, li iris al vendejo de oro en bazaro. Li kaptis pecon da oro kaj tuj iris returne. La poliestro lin arestis, kaj demandis: "Multaj homoj ĉi tie, kial vi aŭdacas rabi alies oron?" "Ĉar neniu homon mi vidis sed nur la oron, kiam mi ĝin prenis." li diris.

## Homo Perdinta Hakilon

Iu perdis hakilon kaj suspektis ke la filo de la najbaro ĝin ŝtelis. Li observis ties iradon, kaj trovis ke li iras kvazaŭ ŝtelinto de la hakilo; li observis ties mienon, kaj trovis ke ĝi aspektis kvazaŭ tiu



de hakilo-ŝtelinto, li aŭskultis ties parolon — ĝi sonis kvazaŭ parolo de hakilo-ŝtelinto. Unuvorte, lia tuta sinteno montris lin ŝtelinto de la hakilo.

Post nelonge, la hakilo-perdinto iris al valo por fosi teron, kaj tie li retrovis sian hakilon. Post kelkaj tagoj, li denove vidis la filon de la najbaro, kaj al li ŝajnis ke nenio en lia sintenado atestas ke li ŝtelis la hakilon.

BAŬ ĈANGFA:

## La Parfumsaketo de Drakboata Festo

LA 25-a de junio de tiu ĉi jaro estas la kvina tago de la kvina monato laŭ la ĉina lunkalendaro, la tradicia festotago de drakboato en Ĉinio. Oni diras ke ĝi estiĝis memore al nia granda patriota poeto Kju Juan (343-290 a.K.).

En la festotago oni manĝas laŭmore zongzi-ojn (frandaĵo farita el glueca rizo miksitita kun jujuboj, sukero ktp. pakita per folioj en formo de konuso kun triangula bazo), skienojn (*seiaena schlegeli*) kaj aliajn kaj trinkas brandon kun orpimento (As<sub>2</sub> S<sub>3</sub>). En la sudaj provincoj de Ĉinio, kie estas multe da riveroj, oni okazigas drakboatan konkurson; pri tio oni legu la n-ro 3-an de nia lastjara kolekto p. 128. Kaj la infanoj ricevas de sia patrino parfumsaketojn. Pli grandaj knabinaj ofte mem faras ilin.

La parfumsaketo estas farita el malgrandaj pecoj de silkteksaĵo aŭ tuko, remburita per kotono aŭ seĝpulvoro, plus iom da parfuma substanco. Ĝia formo estas delikata kaj tre varia, en la formo de tigro, persiko kaj lozanĝo, zongzi-o k.a. Per formo de tigro oni simbolas majestecon kaj bravon, per la persiko, longvivecon, kaj la lozanĝo, saĝecon kaj lertecon. Ĉio ĉi tio montras ke la ĉina popolo havas ardan amon al la vivo, fervoran aspiron al feliĉa estonteco, kaj la varman esperon en la juna generacio. Lastatempe, oni elfaris alian novan tipon de parfumsaketo en formo de pacokolombo. La ĉina popolo estas ĉiam plena de paca kaj bela espero en okazo de ĉiu tradicia festo.



# “El Ĉina Pentrarto”

## por Niaj Kunlaborantoj!

En kuranta jaro venis amaso da novaj abonantoj al nia gazeto EPĈ, dank' al la varbado de niaj amikoj en diversaj landoj respondantaj la alvokon sur n-ro 5, 1962 de nia gazeto. El la skribintoj de la leteroj multaj varbis centojn aŭ dekojn da abonantoj, al ili ni esprimas elkorajn dankojn!

Nun niaj donacoj — la albumoj “El Ĉina Pentrarto” jam estis dissenditaj aparte al la varbintoj. Se ankoraŭ restas tiuj kiuj ĝis nun ne sciigis nin pri ilia rikolto aŭ preterlasite ne ricevis nian donacon, volu tuj nin sciigi, por ke ni kontrolu kaj ĝin sendu al ili, ni petas.

Libro-Servo de ĈEL

## ĈINAJ POŝTMARKOJ

La 97-a serio de pm. emisiita (1-I-1963) de la Ĉina Poŝto kun titolo “Vivu la Revolucia Socialisma Kubo”.

Amikeco inter Ĉinio kaj Kubo	320-1	4c.	Subtenu la justan batalon de la kuba		
Defendu Kubon	321-2	4c.	popolo	323-4	8c.
Decideme Oponu invadon fare de la			Kubo nepre venkos	324-5	10c.
usona imperiismo	322-3	8c.	La venko apartenas al Kubo	325-6	10c.





En la Epoko de Militantaj Regnoj, en Ĝaŭ-regno estis generalo nomata Ĝaŭ Gua, kiu parkere lernis multajn librojn pri milita arto, sed ne povis ilin apliki lerte.

Foje, la potenca Kin-regno atakis lian landon, kaj Lian Po, veterana generalo de tiu lando estis ordonita rezisti la atakantojn. Por akiri favorajn kondiĉojn, li konstruigis fortikaĵojn kaj prenis defensivon anstataŭ ofensivon. Aŭskultinte al kalumnio, la reĝo misprenis lin timema kaj anstataŭigis lin per Ĝaŭ Gua. Tiu ĉi rigardis sin nekomparebla konanto de milita arto kaj estis tre aroganta. Li tute ŝanĝis la taktikon de Lian Po kaj baldaŭ falis en sieĝon de la malamikoj. Pasis kvardek tagoj kaj ĉesis provianto. Liaj soldatoj estis tiel malsataj, ke ili devis mortigi siajn malsanajn kaj malfortajn kamaradojn por sin savi de malsatmorto. Finfine Ĝaŭ Gua povis fari nenion alian ol provi trarompi la sieĝon kun sia trupo, kaj li mortis en pluvo de sagoj. Kvarcent mil soldatoj de Ĝaŭ-regno kapitulacis kaj estis vivante enterigitaj en unu nokto.

Laŭ tiu ĉi anekdoto oni kutimas sarkasme nomi "strategiisto sur papero" tiun, kiu nur parkere lernas librojn, fanfaronadas, sed ne scias lerte apliki sian scion en praktiko.

## *La Branĉo*

*dediĉita al Ki Bajŝi*

*Enkadrigis fenestro*

*La kvadraton de blu' frumatena,  
Kaj al tiu ĉi spaco la estro —  
Tien pendas la branĉo ĝardena.*

*La hazarda fragmento de vivo,  
Aperinta sur fon' de senfin'  
Ĝi verŝajne aspektas naiva,  
Sed ne tiel perceptas la Ĉin' —*

*Ĝi al li ekvidiĝas — ne peca,  
De foli' viveganta ĝis larvo  
Kaj, surbilde, nomiĝi eĉ deca  
ne "la branĉo", sed ĝuste —*

*"La arbo".*

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## Produkto de Kemiaj Teksaĵoj

Produkto de kemiaj fibroj estas juna industrio en Ĉinio. Lastjare en Pekino ĝi multe disvolviĝis. Kompare kun la produkto en 1961, teksaĵoj per tiaj fibroj ankaŭ duobligis kaj en kvanto, kaj en specoj.

Sole en la Pekina Koton-fabriko N-ro 3, ekipita per ĉinaj maŝinoj, produktis dek tri specojn de sinteza koton-teksaĵo. Ili estas pli elastaj ol la natura kaj ne kuntiriĝas nek ĉifiĝas post lavado.

## Sciencistoj Diskutis pri Rizkulturado

Elstaraj riz-specialistoj en la lastjara februaro kunsidis en Kantonon por diskuti pri rizkulturado en diversaj partoj de Ĉinio. Jam en 1961, la Akademio de Agrikulturaj Sciencoj organizis esploradon pri diversaj specioj de rizo en ok agrikulturaj institutoj, dislokitaj en diversaj partoj de la lando. La esplorado celas trovi reagojn de rizo en malsamaj cirkonstancoj de la tropiko ĝis la frosta zono, dek sep traktatoj de la esplorado estis legitaj en la

kunsido, kaj nova plano por kuranta jaro estas fiksita.

## Grund-plibonigo

Praktikaj paŝoj por plibonigi malfekundan grundon en Hebej-provinco estas fiksitaj de la lokaj sciencistoj. Antaŭ tio la Akademio de Agrikulturaj Sciencoj de Hebej-provinco faris jam por pluraj jaroj vastan esploradon. La ĉefa tasko estas plibonigi la alkalajn grundon kiu ampleksas ĉirkaŭ 8,000,000 hektarojn el la kulturataj kampoj. La sciencistoj faris jam konkretajn proponojn, kaj kelkaj el ili sukcesis en pluraj lokoj.

## Ekipaĵo por Produkti Kemian Sterkaĵon Produktiĝas en Ĉinio

Ekipaĵo por produkti kemian sterkaĵon kun jara kapacito de 25,000 tunoj da sinteza amoniako produktiĝas nun en Ĉinio. Ĉiuj ĉefaj partoj de la ekipaĵo antaŭe estis importitaj el eksterlandoj, nun ankaŭ estas faritaj enlande. Tiu ĉi unua paŝo donas eblon pli kaj pli kontentigi la kreskantan

bezono de kemiaj sterkajoj en la vasta kamparo de Ĉinio.

## Utiligo de Elektro en la Kamparoj Kreskas

Utiligo de elektro en la kamparoj estis neimagebla en Ĉinio antaŭ la Liberiĝo. Ĉar granda parto de la kamparanoj ja eĉ ne povis revii pri uzo de petrolampo ĉiuvespere. Sed nun en la kamparoj de pli ol 1,000 gubernioj oni komencis utiligi la elektran forton ne nur en prilumigo, sed ankaŭ en multaj agrikulturaj laboroj, ekz-e por senseligi grajnoj, fari farunon, forigi semojn de koton, elpremi oleon kaj en kelkaj lokoj eĉ por elektraj plugiloj.

En pli ol 600 gubernioj la elektro estas provizata de la giganta ŝtata elektrosenda reto. La ceteraj lokoj mem fondis elektrejojn kun ne tre grandaj generatoroj. Ili ĉiuj estas kreitaj dum la periodo de la Dua Kvinjara Plano, t.e. en la jaroj 1958-1962. La nuna kampara elektra provizo estas dekoble pligranda ol tiu en 1957.

## Fosilio de Giganta Testudo

En Nanhiong-gubernio de Guangdong-provinco oni trovis fosilion de giganta testudo. Ĝia krusto longas ĉirkaŭ 1.2 metroj, la plej granda testuda krusto el la trovitaj ĝis nun. Ĝi estas trovita kune kun aliaj fosilioj. Laŭ juĝo de famaj paleontologoj kaj specialistoj, la tertavolo en kiu troviĝis tiuj fosilioj apartenas al malfrua mezozoika erao, kaj la fosilio de la testudo laŭtakse estas antaŭ almenaŭ 70,000,000 jaroj.

## Studo pri la Muziko de Naci-malplimulto

La Muzika Esplora Instituto kolektis dum lastaj sep jaroj riĉajn materialojn pri la instrumentaj kaj voĉa muzikoj por dancoj de 26 naciaj malplimultoj en Ĉinio. Krome ili kolektis 2,000 bildojn pri la muziko kaj muzikaj instrumentoj de naciaj malplimultoj dum la esplorado farita en naŭ provincoj kaj aŭtonomaj regionoj.

*Kolekto de Ĉinaj Popolkantoj* en 29 volumoj estas kompilataj. En ĝi troviĝas kaj kantoj de la naciaj malplimultoj kaj tiuj de han-nacio, la ĉina nacia plimulto.

## Hispana kaj Franca Eldonoj de "Pekina Revuo"

*Pekina Revuo* estas semajna revuo en angla lingvo. Ĝi prezentas ĉinajn vidpunktojn pri aktualaj internaciaj problemoj kaj publikigas teoriajn artikolojn kaj gravajn dokumentojn. Aŭtentikaj raportoj pri progreso de Ĉinio ankaŭ aperas en tiu revuo. Ekde marto ĝi eldoniĝas ankaŭ en hispana kaj franca lingvoj kiel dusemajna revuo, ĉiuj gravaj artikoloj de la angla eldono troviĝos ankaŭ en tiuj du novaj eldonoj.

## S-ano Hugo Steiner 85-jara

S-ano Hugo Steiner, fondinto de la fama Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, ĉi-jare celebras sian 85-an datrevenon de la naskiĝa tago. Ni esprimas sincere nian elkoran gratulon.

La fideleco kaj persisteco de s-ano Hugo Steiner al Esperanto estas atestitaj de liaj multaj esperantaj laboroj tre sukcesaj.

Li naskiĝis la 26-an de feb., 1878 en Retz de Aŭstrio. Lia patro estis komercisto, ankaŭ li mem edukiĝis en Komerca Akademio. Sed en 1911, kiam li eklernis Esperanton, ĝi tuj fariĝis la celo de lia vivo. Jam en 1924, li petis emeritiĝon por sin dediĉi tute al la internacia lingvo. En tiu sama jaro li fondis la gazeton "Aŭstria Esperantisto". La Internacian Esperanto-Muzeon li fondis en 1927 en iama ĉevalejo. Ĝi tamen pli kaj pli kreskas kaj nun fariĝis unu el plej gravaj organizoj de E-movado, malgraŭ ke kelkaj esperantistoj nomis lin "frenezulo" ĉe la komenco. La funkcio de IEMW estis interrompita nur dum la tempo de 1938 ĝis 1945, kiam la faŝistoj regis aŭstrion. Ankaŭ li mem estis foje arestita de la Gestapo.

Nun la Muzeo estas subvenciata de la Ministerio de Edukado, kaj ĝia estonteco estis certigita per aliĝo al ŝtata biblioteko de Aŭstrio jam en 1928.

S-an Steiner ricevis multajn distingojn kaj honorigojn pro siaj laboroj por Esp-o kaj por sia patrolando.

Kiel 85-jarulo s-ano Steiner nun verkas la 3-an volumon de la katalogo de IEMW, la laŭalfabetan, (la 1-a, pri E-literaturo, laŭ Internacia Dekuma Klasifiko kaj la 2-a pri la literaturo de la aliaj sistemoj de IL jam aperis) kaj mem tajpos sur matricojn.

Estu al li ankoraŭ multaj jaroj kun same freŝaj energio, pacienco kaj amo al esperanta afero kiel en pasintaj pli ol 60 jaroj!

ĈINA ESPERANTO-LIGO  
REDAKCIO DE E. P. Ĉ.

## "Historio de Ĉinaj Filmoj"

Je la fino de februaro aperis du volumoj pri historio de ĉinaj filmoj; ili estas parto de trivoluma libro, verkita de Ĉen Kihua. La verko estas la unua en sia speco eldonita en Ĉinio. La materialoj kolektitaj en tiuj ĉi du volumoj ampleksas la periodon de 1896,

kiam la unua filmo de Ĉinio estis prezentita ĝis la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko (1949). La sekvonta parto de la historio estos traktata en la tria volumo nun preparata. La unuaj du volumoj ampleksas 900,000 vortojn kaj kun 800 ilustraĵoj. Katalogo el 2,000 filmoj estas aldonitaj ĉe la fino.



# PRI LA ORTOGRAFIO DE PROPRAJ NOMOJ

Jen venis pliaj artikoloj pri tiu ĉi temo. Ni ilin publikigas laŭvice, kun iom da mallongigo.  
— La Red.

## Ĝo Estas Nelogika . . .

Ĝis nun "El Popola Ĉinio" ne aperigis artikolojn favore al la artikolo de s-ano docento V. Gruško (EPĈ, n-ro 4, 1962). Sed mi opinias, ke tiaj estas ricevitaj. Al tiaj apartenas ankaŭ la suba.

Mi deziras respondi al s-anoj J. V. Dolinský kaj J. Fousek (EPĈ, n-ro 6, 1962). Vi s-ano Dolinský, pravas ke ne estas eble precize transskribi la naciajn proprajn nomojn per esperantaj literoj. Sed ni ĉiuj tre bone scias tion. En via gepatra lingvo vi, kompreneble, transskribas la ĉinajn kaj rusajn nomojn per via nacia alfabeto. Eĉ multajn literojn de la latinliteraj lingvoj vi anstataŭas per viaj propraj. Ĉu oni bezonas dubi, ke vi ne precize transskribas tiun ĉi nomojn? Kaj vi konsideras tion absolute normala kaj tute ne ĝena. Kial ne povas same agi la esperantistoj, tiel precize, kiel ebligas tion la esperanta alfabeto? Kial la nepreciza transskribo fonetika devus tiel profunde dolorigi nin esperantistojn, se tio estas tute normala en la naciaj lingvoj? La fonetika transskribo per la alfabeto de la koncerna lingvo ne estas ia kurioza eksperimento. Ĝin uzas jam delonge kelkaj grandaj nacioj. Kaj ĝenerale la alĝustigon de la fremdaj propraj nomoj al nacia alfabeto praktikas ĉiuj nacioj.

La nacia skribmaniero estas kontraŭa al la baza principo de la internacia lingvo — ĉiu litero devas esti elparolebla, kaj ĉiam sammaniere elparolebla. Se oni rajtas uzi por transskribo de propraj nomoj de la latinalfabetaj lingvoj neesperantaj literojn, kial do ne rajtas, ekzemple, la

rusoj skribi la rusajn nomojn en esperanta teksto per la rusaj literoj, t. e. ankaŭ per neesperantaj literoj? Kial por unuj lingvoj tio estas permesata, por aliaj ne? Kial do oni en unu kazo tiel severe respektas la nacian skribmanieron, kaj en alia kazo konsideras tute normala la neprecizan transskribon? Oni eble pravigas sin per tio, ke la tipografioj ne havas la rusajn literojn? Sed estonte, kiam la tipografioj havos ĉiujn necesajn literojn kaj signojn, ĉu do oni devos enkonduki en esperantan tekston ĉiam novajn kaj novajn literojn — ĉiujn neesperantajn latinalfabetajn, la rusajn, ĉinajn, arabajn? Aŭ tio estas la pia rajto de la latinalfabetaj lingvoj? Ne, s-ano Dolinský, tio estas nur nia kutimo, kaj nedemokratia kutimo.

S-ano Dolinský skribas: "Se ni esperantistoj pretendas, ke oni skribu al ni sian nomon laŭ esperanta fonetiko, por ke ni povu ĝin korekte prononci, tiukaze ankaŭ ni devas esti almenaŭ tiom komplezaj, ke ĉiun nomon, kiun neesperantisto ne povas korekte elparoli, vi skribas al li laŭ lia nacilingva fonetiko. . . ." Sed, s-ano Dolinský, temas ja pri fonetika transskribo EN ESPERANTO! kaj neniu postulas, ke en iu nacia lingvo vi uzu la esperantan skribmanieron. Sekve en esperanta teksto oni skribu al hungaro esperante, al germano esperante kaj ankaŭ al rumano esperante. Tio, s-ano Dolinský, estas same la lingva egalrajteco.

De la labirinto estas nur unusola eliro — oni ĉiam en esperanta teksto skribu la proprajn kaj geografiajn nomojn fonetike, tiel precize, kiel ebligas tion la esperanta alfabeto. Estos necese,

ke la lingvistoj-esperantistoj de ĉiu nacio ellaboru la plej proksiman fonetikan skribmanieron de la propraj nomoj de sia nacio.

Respondante al s-ano J. Fousek, mi denove revenas al la rusa lingvo. En la rusa lingvo oni ĉiam skribas ĉiujn proprajn kaj geografiajn nomojn nur per la rusaj literoj, kaj fonetike. Ĉu do oni povas diri, ke la rusoj ne respektas la naciajn lingvojn. Ne. Se oni devas respekti la naciajn lingvojn, do dekoble plimulte oni devas respekti la internacian lingvon kaj ne ŝarĝi ĝin per sen-nombraj neprononceblajoj. Esperanto ne estas ĝusta loko por demonstrado de naciaj apartaĵoj.

Provizore oni povas proponi kompromisan solvon — LA REDAKCIOJ DE ESPERANTAJ GAZETOJ UZU TIAN SKRIBMANIERON, KIAN UZIS LA AŬTORO DE LA ALSENDITA ARTIKOLO.

O. Kingsep

Kohtla-Jarve, Estona SSR



Mi ŝatas legi Esperantan literaturon kaj korespondi kun gesamlingvanoj el diversaj landoj. Apud tio mi ofte deziras profiti materialojn el nia gazetaro por pli efike propagandi la lingvon inter la neesperantista publiko.

Sed kio okazas?

Multfoje mi frontas la neebulon prononci kaj transskribi ĝuste aŭ almenaŭ proksimume ĝuste la proprajn nomojn, kiuj ofte estas intime ligitaj kun certa artikolo aŭ kun alia materialo. Multfoje mi pensis kial oni altrudis al ni la nelegeblajn nomojn. Fine mi eksciis ke en okcidento oni ĉiam skribas la proprajn nomojn naci-lingve sendepende de tio ĉu oni povas aŭ ne legi ilin korekte. Certe por la okcidenta mondo, uzanta latinan alfabeton, tiu metodo estas tre oportuna, sed por la popoloj, uzantaj aliajn alfabetojn, tio estas maloportuna, samkiel maloportuna estas al okcidentanoj uzado de alialfabetaj skribado de la propraj nomoj.

Tre ĝustatempa kaj bona estis la artikolo de docento V. Gruško el Sovetio, kiu sufiĉe argumentite pledis pri tiu problemo.

Sed en n-ro sesa de "El Popola Ĉinio" mi legis skribaĵojn, kiuj pledas pri la malo kaj eĉ asertas, ke "se la nomo estas korekte transskribita (laŭ prononco) certe oni povos korekte ĝin prononci". Estas pledate ankaŭ pri manko de adekvataj literoj kaj sonoj en Esperanto por esprimi iujn sonojn el certaj okcidentaj lingvoj. Estas konfirmata la konvinko, ke ne eblas transskribi la nomojn kaj tial ni devas paciĝi pri la nuna stato.

Responde al ĉi asertoj mi estas devigata sciigi al la esperantistaro, ke adekvataj sonoj en Esperanto mankas ankaŭ por iuj bulgaraj kaj rusaj sonoj, sed ni sukcese transskribas ilin ne tute ĝuste, sed plej trafe por eviti konfuzojn. Kiel oni povus ĜUSTE TRANS-

## LIBROJ PRI INTERNACIA KOMUNISMA MOVADO

Ĉefartikoloj el "Renmin Ribao" kaj "Ruĝa Flago"  
(en diversaj lingvoj)

**Proletoj de Ĉiuj Landoj Unuiĝu por Oponi Nian  
Komunan Malamikon**

**La Malakordoj inter K-do Togliatti kaj Ni  
Leninismo kaj Moderna Reviziismo**

(En la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana, germana,  
rusa, japana, vjetnama, araba kaj taja)

**Ni Unuiĝu sur la Bazo de la Moskva Deklaracio  
kaj Moskva Deklaro**

**De Kie Venis la Malakordoj?**

— Respondo al k-doj Thorez kaj aliaj

(En la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana, germana,  
rusa, japana, vjetnama, araba, taja kaj hindia)

**Refoje pri la Malakordoj inter K-do Togliatti kaj Ni**

— Pri kelkaj gravaj problemoj de leninismo en  
la nuna tempo

**Komentario pri la Deklaro de la Komunista Partio  
de Usono**

**Spegulo por Reviziistoj**

(En la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana, germana,  
rusa, japana, vjetnama, araba, taja, hindia kaj itala)

Eldonis

**FREMDLINGVA ELDONEJO**

Aĉeteblaj ĉe: **Guozi Shudian**, Poŝtkesto 399, Pekino, Ĉinio

SKRIBI la bulgarajn "б", "я", "ю" kaj la rusajn: "л" kaj "и"? Certe, laŭ okcidenta kutimo ni ankaŭ devas skribi niajn proprajn nomojn NUR EN NIA NACIA LINGVO por konservi ĝian originon. La ĉinoj, araboj kaj la aliaj popoloj devas fari la samon pro la kutimo, ĉu?

Se ĉiuj ni komencos agi laŭ tiu sugesto, certe la internacia lingvo baldaŭ perdos sian valoron pro la Babelo kreiĝonta.

Kiel videbliĝas, ne nur en la okcidentaj, sed ankaŭ en aliaj lingvoj estas sonoj kaj literoj, kiuj mankas kaj neniam aperos en Esperanto. Tamen la esperantistoj, neuzantaj latinan alfabeton, sukcesis kaj daŭre sukcesas solvi

la problemojn kaj ĉiam trovi la plej konvenajn formojn por esprimi ĉi sonojn, dume la latinalfabetanoj plue obstinas en tio. Rezulte de tiu agado la esperantistoj en nelatinalfabetaj landoj ĉiam estas embarasataj en transskribado kaj prononcado de la propraj nomoj kaj ofte nur pro tio oni toleras fiaskojn en prezentado de tradukoj el Esperanto en nacian lingvon.

Responde al la ĉeĥaj kamaradoj pri tio, ke eĉ la ĝuste transskribitan nomon oni ne povos prononci ĝuste. Mi povas diri, ke tio estas malvera, ĉar mi mem faris provojn kaj mia aserto konfirmiĝis de la praktiko. Post kelkaj provoj mi bone prononcis la prezenti-



ajaj en la artikolo nomojn. Krome, mi deziras aldoni ke almenaŭ nun mi komprenis kiel oni devas prononci la nomon de la nondfama ĉeĥa komponisto Dvořák. Antaŭe mi próponcadis, — kun multaj penoj, — Dvorjak, sed ne Dvořak kio estas eĉ pli facile al mi.

El tio oni povas kompreni kiom grava estas la esperanta transskribado de la propraj nomoj kaj kialon kiu starigas tiun problemon en la tagordon de nia movado.

Fine de ĉio mi opinias, ke en la nuna etapo estas akceptebla nek la propono de Viktor Gruško, nek la koncepto de la du ĉeĥoj.

Por doni eblecon al okcidentanoj vidi la skribmanieron de la koncerna nomo, oni ĉiam devas skribi ĝin origine t. e. nacilingve, sed por ebligi ĝustan prononcon kaj transskribon en aliajn lingvojn, per nelatinaj literoj, oni devas ĉiam skribi la nomon laŭ la plej ĝusta prononco, uzante por tio NUR Esperantajn literojn, kio evitigos eventuale okazontajn konfuzojn kaj ebligos identan prononcon de la sama nomo.

Konklude al ĉio oni devas akcepti formon oportunan por ambaŭ grupoj kaj kiu forigos la Babelon el la prononcado de la propraj nomoj. Tio donos pli internacian aspekton de nia lingvo. Tio estas: ĉiam skribi la proprajn nomojn en la literaturo kaj en la gazetaro en la du formoj. Transskribadon oni povas ne fari kiam la prononcado nacilingva koincidas kun la sonoj Esperantaj. En ĉiuj dubaj okazoj oni nepre faru transskribon.

En la reciproka korespondado oni devas NUR LA UNUAN FOJON doni la fonetikan transskribon ne nur de la propra nomo, sed ankaŭ de la tuta adreso.

Nur en la KORESPONDO oni povas UNU FOJON indiki la prononcon, sed en la LITERATURO kaj en la GAZETARO oni ĈIAM skribu la DU formojn

unu apud la alia por eviti konfuzojn.

Mi trovas tiun manieron plej taŭga solvo de la problemo.

Ilija Andreev (Илия Андреев) prezidanto de esperantista sekcio, lektoro de Esperanto. Bulgario



## Kiel Tamen Oni Devas Skribi Proprajn Nomojn en Esperanto

Diversaj opinioj ekzistas. Ili ĉiuj estas divideblaj je du ĉefaj specoj: skribado NACILINGVA kaj skribado FONETIKA.

Ni esploru la avantaĝojn kaj mankojn de ambaŭ manieroj.

Sendube, la nacilingva skribo estas la plej oportuna por ADRESOJ SUR LA KOVERTOJ. Neniu povas kontraŭi tion. Sed por esti uzata en libroj, en revuoj ktp., tiu-ĉi maniero ne estas konvena. Ja ne ĉiuj naciaj lingvoj uzas latinan alfabeton. Kaj eĉ la latinalfabetaj lingvoj havas literojn, kiuj forestas en Esperanto (ekzemple: x, q, w, ŭ kaj aliaj).

Ni eldiru la postulon:

POR ĈIO SKRIBATA EN ESPERANTO ONI UZU NUR LA ESPERANTAJN LITEROJN. Se pro iuj gravaj kaŭzoj oni estas devigataj uzi ankaŭ aliajn literojn (kiel x, y, q, w, ktp., aŭ nelatinajn), oni tute klare komprenu, ke la koncerna vorto NE ESTAS ESPERANTA. Logike ni venas al la dua maniero — la fonetika. Sed kion signifas la postulo “skribi fonetike”? Parolante, ke Esperanto estas lingvo fonetika, ni asertas nur, ke en Esperanto por ĉiu litero respondas unu sono kaj por ĉiu sono respondas unu litero, ke ĉiu vorto estas elparolata tiel kiel ĝi estas skribita. Tamen, la fonetikeco de Esperanto ne signifas kaj ne povas signifi la eblecon “skribi fonetike” ĉiun ajn vorton, troveblan en tiu aŭ alia nacia lingvo. Por tiu celo taŭgas verŝajne nur la internacia fonetika alfabeto. Sekve, ankaŭ la foneti-

ka skribado de propraj nomoj ne estas plenkompense ebla. Kion fari? Kiel solvi la problemon? Ni pripensu la NACILINGVAN SPERTON! La rusa lingvo ne havas latinajn literojn. Sed en rusaj libroj kaj gazetoj ni legas la proprajn nomojn de angloj, francoj, germanoj, hispanoj ktp. La ĉina lingvo uzas hieroglifojn, sed ne literojn. Tamen, ĉinoj legas en siaj libroj kaj revuoj la proprajn nomojn de rusoj, germanoj, angloj ktp. Germanoj legas en siaj libroj la proprajn nomojn de rusoj, ĉinoj, hindoj ktp.

Ĉiu nacia lingvo jam praktike solvis por si mem tiun ĉi problemon. Jen estas la solvo: Por ĉiu fremlingva propra nomo ekzistas iu nacilingva ekvivalento. Ne ĉiam ĝi estas absolute preciza, sed malgraŭ tio ĝi estas TRADICIE KONSERVATA. Jen ekzemploj. La nacilingva nomo de unu fama germana poeto estas HEINRICH HEINE. Germanoj elparolas ĝin: “hájnriĥ hájne”. Sed, se mi TIEL diros al la ruso, tiu ne baldaŭ komprenos min. Ni, rusoj, skribas kaj parolas “génriĥ géjne” (Генрих Гейне). La nomon de Mao Zedong rusoj skribas kaj elparolas “máo cze-dun” (Мао Цзэ-дун). Ni diras “ŝekspír”, anstataŭ io simila al “ŝéjkspia” — (mi ne scias la precizan anglan elparolon).

Same agas evidente ĉiuj naciaj lingvoj, neniam pretendante (rimarku!) je la “fonetika skribo” aŭ io simila. Oni ĉiam klare komprenas, ke la uzata nacilingva formo estas, nome, nur NACILINGVA, nur iu PROKSIMA EKVI-VALENTO.

Mi opinias, ke ni esperantistoj sekvu tiun ekzemplon. Por ĉiu

# LIBRO-SERVO al Ĉiuj Niaj Legantoj

Nia legantaro pli kaj pli kreskas, ankaŭ la aferoj de nia Administracio pli kaj pli diversiĝas. Por kontentigi la bezonon de nia vasta legantaro, ekde aprilo ĉijare ni fondis apartan **Libro-Servon** por ekskluzive prizorgi la **abonon** de nia gazeto kaj **mendadon** de ĉiuj esperantaj libroj eldonitaj en Ĉinio. Ankaŭ **specimenojn** oni povas peti de ĝi. Ĝia adreso estas "**Libro-Servo de ĈEL, P. O. Kesto 313, Pekino**". Pri ĉiuj aliaj aferoj oni **nepre** sin turnu rekte al "**P. O. Kesto 77, Pekino**", la adreso de nia Ligo kaj Redakcio de nia gazeto.

Estas petataj ĉiuj niaj ĝisnunaj perantoj, abonantoj kaj legantoj kunlabori kun nia nova servo kaj ĝin helpi per konsiloj.

## ĈINA ESPERANTO-LIGO REDAKCIO DE E. P. Ĉ.

nacilingva propra nomo estu ellaborita iu **ESPERANTLINGVA EKVIVALENTO**, nek absolute kaj precize fonetika, nek pure nacilingva. Tiun esperantlingvan ekvivalenton oni neniam konsideru kiel **PRECIZAN KOPION** de la koncerna nacilingva nomo, sed uzu nur kiel **ESPEANTLINGVAN** kaj nur en **ESPERANTLINGVAJ TEKSTOJ**.

Tia estas mia propono.

Antaŭ ol paroli pri la praktika vojo de ĝia realigo, mi volus aŭdi la opiniojn de la legantoj.

V. Beškarev, USSR.

## Ankoraŭ pri la Ortografio de Propraj Nomoj

S-no Dolinský en n-ro 6 de EPĈ neas la neceson de la fonetika transskribo de personaj nomoj. Li multe rezonas pri neeblo transdoni per esperantaj literoj la prononcon de nacilingvaj nomoj, kvazaŭ la diverssoneco de nacilingvaj vortoj ne estus konata al la esperantistoj. Laŭ lia opinio eĉ Zamenhof mem eraris, dirinte la neceson pri la fonetika transskribo en estonteco de propraj

nomoj. Dolinský skribas interalie: "Ĉu estas tiel ekstreme grave, ke oni sciu korekte elparoli la nomon de sia korespondanto?" Vere, neĝusta elparolo de la nomo de la korespondanto ne estas tre grava. Tio ne malhelpas al la korespondado, ĉar letero, sur kies koverto estas skribita la nomo de la adresato nacilingve, bone atingas la adresaton. Sed tute alia afero estas kun la nomoj de verkistoj, sciencistoj, literaturverkaj personoj ktp., kiujn oni devas ne nur scipovi legi, prononci, sed ankaŭ uzi en prelego, raporto aŭ en traduko en iun nacilingvon, kies alfabeto ne estas latinlitera. Ni supozu, s-no Dolinský, ke vi tralegis en la revuo EPĈ tre interesan artikolon pri iu multsignifa scienca invento, kiun plenumis iu eminenta ĉina sciencisto. Vi ekdeziris pri tiu artikolo fari raporton en via esp. societo kaj traduki ĝin en vian nacian lingvon. Sed kiel vi farus tion, se la nomoj de la inventisto kaj de la aŭtoro de la artikolo estus presitaj per ĉinaj ideografiaj? Efektive vi estus devigita rezigni vian intencon aŭ raporti

sen mencio de la propraj nomoj. Sed la tradukon sen indiko de la nomoj verŝajne akceptus nenia redakcio. En la sama situacio ĉiam okazas esperantisto, kies nacia alfabeto ne estas latinlitera. Por li la nacilingve presitaj propraj nomoj, ofte kun neesperantaj literoj kaj neprononceblaj kunmetaĵoj — sz, ch ktp en esperanta preso prezentas ĉinajn ideografiajn aŭ egiptajn hieroglifojn kaj pro unu-du mallegeblaj personaj nomoj oni ne povas fari tradukon nacilingven. Kiam Zamenhof esprimis sian esperon pri la estonta fonetika skribo de la personaj nomoj, li verŝajne antaŭvidis la ĵus eldiritan maloportunon.

Do, la propraj nomoj devas esti presataj ne nur nacilingve, sed ankaŭ nepre per literoj de la esperanta alfabeto sen uzo de neesperantaj literoj, por ke la prononco estu maksimume proksima al la nacilingva. Ne gravas, se la prononco en la skribo ne komplete koincidas kun tiu de la nacilingva. Estas grave, ke la nomon povas legi ĉiu leganto kaj skribi per nelatinaj literoj.

Mi preferas aplikon de personaj nomoj laŭ propono de Gruško (EPĈ, n-ro 4, 1962), ankaŭ akceptebla estas la propono de Josef Fousek (EPĈ, n-ro 6, 1962). Laŭdinda estas la fakto, ke "El Popola Ĉinio" uzas en preso por la ĉinaj nomoj nur esperantajn literojn. Tiuj nomoj estas bone legeblaj kaj fonetike elparoleblaj.

Dezirande estas, ke la redakcioj de la esperantaj periodaĵoj avertu siajn korespondantojn skribi proprajn nomojn ne nur nacilingve, sed ankaŭ fonetike.

T. Golubcov, USSR





## Pliaj E-kursoj en la Ĉina Popola Universitato

En feb. ĉijare malfermiĝis du pliaj Esperanto-kursoj en la ŝtata Ĉina Popola Universitato kiel fakultata lerno-objekto. La instruado celas doni al studentoj de la lingvistika fakultato fundamentan scion al fremdaj lingvoj. Kaj oni elektis Esperanton kiel la unuan el ili. La kursojn partoprenas entute 122 personoj. El ili 49 estas studentoj kaj la ceteraj estas instruistoj kaj oficistoj de la universitato.

## Scienca kaj Teknika Eldono de "Grajnoj en Vento"

"Grajnoj en Vento" nun anoncis sian sukceson en la organizado de sia "Scienca kaj Teknika Rondo" kaj aperigon de sia scienca kaj teknika eldono. La unua numero devis aperi laŭ antaŭkalkulo en jan. Pliaj interesiĝantoj kaj kunlaborantoj estas dezirataj. Kiu volas pli detale informiĝi pri la afero, skribu al s-ano ALBERTO BARROCAS, Yaguarí 2248, Ap. 3, Montevideo, URUGVAJO.

## Japana Esperantisto en Pekino

S-ano Nukina Joŝitaka, japana esperantisto kaj profesoro de Fremdlingva Universitato de Kobe, vizitis Pekinon kiel membro de delegitaro de la Azio-Afrika Solidara Komitato de Japanio. En la 1-a de marto li estis regalita de Ĉina Esperanto-Ligo. Ĉeestis prezidanto Hujucz, vic-prezidanto Je Laishi, ĝenerala sekretario Ĉen Juan kaj aliaj estraranoj inkluzive k-don Ilin. La gasto kaj gastigantoj havis tre ĝojan kaj amikan konversacion kaj interŝanĝis donacojn memore al tiu ĉi intervidiĝo.

## Novaj E-libroj Eldonotaj en Vjetnamio

En lastaj jaroj niaj vjetnamaj k-doĵ faris grandan kontribuon al esperanta literaturo kaj per tio ili bone plenumis sian taskon akceli la interkompreniĝon kaj amikiĝon inter la popoloj de Vjetnamio kaj aliaj landoj. Nun ili anoncas, ke en 1963 aperos kvar pliaj novaj esperantaj libroj, nome *Senelirejo*, romano de Nguyen Kong Hoan, *La Aventuroj de Ze Men*, fantazia rakonto de To Hoai, *Elektitaj Poemoj* de To Huu kaj *La Lasta Fortreso*, romano de Huu Mai. Ĉiuj tiuj libroj oni povas mendi ĉe XUNHASABA, 32, Hai Ba Trung, Hanojo, Vjetnamio.

## El Sovetunio

### ĈIAM VIGLAS LA ESPERANTA SEKCIO DE CKDM EN MOSKVO

—Tiu ĉi sekcio laŭplane efektivigis sian programon de la lasta sezono de 1962. La plej rimarkindaj estas la jenaj aktivadoj:

1) Esploro pri la decidoj pri problemoj de la internacia lingvo de la I-a Kongreso de la Internacia Societo de Laboristoj en Genevo (1860). K-do I. A. Ivanov raportis en 14, okt. 1962 sian esploron laŭ koncernaj materialoj en la Ŝtata Instituto de Marksismo kaj Leninismo en Moskvo, ke dum tiu Kongreso la internacia lingvo ne estis menciita, nur estis tuŝita la problemoj de ĝenerala lingvo, kiu laŭ protokolaj skriboj devus esti plisimpligita franca lingvo. En la sekvinta kongreso en Lozanna (1867) de la I-a Internacio, laŭ la raporto de franca delegito Giljom estis akceptita limigita rezolucio, dediĉita al reformo kaj plisimpligo de franca lingvo, kiun oni konsideris uzi kiel tutmondan lingvon. Sed la vivo kaj pli-

postaj faktoj montris, ke la internacia lingvo povas esti nur artefarita.

2) Ne malpli grava esploro estis la raporto en la sama tago de k-do N. Rytjkov pri la Konscia Influo de la Homo al la Disvolvo de la Naciaj kaj Internacia Lingvoj.


3) Libera tribuno de Esperantistoj estis iniciatita de la sekcio en 21, okt. 1962. Ĝi estis aranĝita kaj por k-doĵ spertaj kaj por la komencantoj. Oni multe akcentis la bezonon de amuzvesperoj por vigligi esperantajn laborojn.

4) K-do docento I. M. Jablon en la Moskva Ŝtata Universitato raportis, ke prof. E. A. Bokarev estis elektita kiel ano de Akademio de Esperanto.

—Laŭ informo de k-do T. Kulagin, Moskvo.

BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTAJ ELDONAĴOJ EN LITOVIO — Bibliografio de esperantaj eldonaĵoj aperigitaj en Litovio estas farita de k-do J. Petrusis. La bibliografio kolektis sume 62 eldonaĵojn. La unua el ili estas la unua libro de Esperanto por Litovoj, eldonita en 1890, kaj la lasta estas "Litova Esperanto Vortareto" eldonita en 1960. En ĝi estas cititaj ankaŭ esperantaj revuoj eldonitaj en diversaj periodoj.

—Laŭ informo de k-do V. Kalasauskas, Litova SSR.



# Skribas Niaj Legantoj

## NOVA KULTURO

Mi gratulas ĉiujn redakcianojn pro ilia signifo-plena laboro por krei kaj fortigi la tre legindan gazeton, kiu portas la fieran titolon "El Popola Ĉinio". La kulturo de la ĉina popolo havas siajn radikojn en la estinteco, sed la moderna ĉina nacio kreis novan kulturon, kiun la cetera mondo ekkonas per legado de la multaj interesaj kaj instruaj artikoloj, noveloj, poemoj kaj priskriboj, kiuj estas la animo de via gazeto.

*B. Sorensen, Danlando*

## KAPITALISTA KAJ IMPERIALISTA JUGO FORSKUITA

Krom al "El Popola Ĉinio" mi ankaŭ abonas al la revuo "Kina", kiu estas eldonata svedlingve el via lando. Ambaŭ revuojn mi tre alte ŝatas, kaj legas kun granda intereso pri via lando kaj popolo, la plej multnombra en la mondo.

Precipe pro tio, ke via popolo forskuis de si la kapitalistan kaj imperiistan jugon kaj forpelis tiujn rabistojn, estas tre interese legi pri viaj prosperoj en ekonomia kaj kultura rilatoj nun post via liberigo. Ankaŭ pri la esperantista movado ĉe vi kaj en la tuta mondo mi legas kun granda intereso.

*K. Johansson, Svedio*

## FENESTRO AL NOVA MONDO

Je la unua fojo mi ricevis unuan numeron de via bela revuo "El Popola Ĉinio", kun atento kaj granda intereso mi trarigardis ĝin. La revuo rakontas al mi pri la sukceso de via libera popolo laŭ la vojo de socialisma konstruado, pri la vivo en via bela ĉefurbo Pekino, pri la vivo de via gaja kaj laborema popolo kaj ĝia lukto kontraŭ enlandaj kaj fremdlandaj sklavigantoj.

Mi tre ŝatas viajn rakontojn, versaĵojn, popolajn fabelojn kaj kantojn kiuj estas kun profunda senco kaj riĉa enhavo. Ankaŭ mi ŝatas viajn ĉarmajn faŭnon kaj flaŭron.


Mi povas diri, ke la revuo "El Popola Ĉinio" malfermis antaŭ mi la fenestron je unu nova mondo — antikva, nuntempa kaj estonta Ĉinio.

*N. D. Graĥovski, Bulgario*

## VALORA SUGESTIO

Volu samtempe gratuli en mia nomo la redakcion pro la enhavo de EPC, kies kleriga nivelo konstante plialtiĝas. Ĉu estos permesate al mi ia sugesto? Mi trovas tre interesaj artikolojn — kiel eble plej detalajn, laŭ la ebleco de via revuo — pri la ĉina skribado, la ombro-teatro, la pentro-arto kaj, finfine, pri tiuj konindaĵoj de via bela lando, kiujn kompreneble vi bone konas sed pri kiuj ni okcidentanoj kutime nur havas aŭ nebulajn ideojn aŭ nerektajn sciigojn.

*O. C. Otheguy, Argentino*



## NOVELOJ DE LUSIN

LUSIN estas konata kiel fondinto de la ĉina moderna literaturo. Liaj noveloj havas altan literaturan valoron kaj socian signifon. Ili estas nepre legindaj por ĉiuj, kiuj volas aprezi la majstrajn verkojn el la ĉina moderna literaturo kaj koni fundamentan fizionomion de Ĉinio antaŭ la Liberiĝo.

La libro enhavanta 29 novelojn estas preskaŭ kompleta kolekto de la noveloj de la aŭtoro. Aldonitaj estas 28 belaj ilustraĵoj, inter kiuj 12 estas koloraj, foto de la aŭtoro, biografia artikolo kaj kronologiaj notoj.

*Formato: 13 × 21 cm. 464 plus 12 paĝoj*

*Prezo: Rb. 1.61, US\$ 1.80, £0-12-9, Gld. 6.75, Steloj 25*

## NOVA KONTRIBUO


de ĉinaj esperantistoj al la esperanta literaturo post la

*Ĉina Antologio*

TUJ MENDU ĈE **Niaj perantoj aŭ  
Nia Libro-Servo (P. O. Kesto 313, Pekino)**

**ĈINA ESPERANTO-LIGO**





## KORESPONDI DEZIRAS

\***Ĉ. 10** gejunuloj el bela Altaj-regiono dez. kor. kun ĉl. pri ĉt. Skribu al: Gončarov A. E., abon. jaŝcik, 11, Barnaul 99, USSR.

\***Rakauskas V**, Pagrabaŝciai, Videniŝkiai, Moletai, Litovio, USSR, dez. kor. kaj interŝ. pm., kolorajn pk., alumetetikadojn, malnovajn monerojn kaj filat. gazetojn kun tuta mondo. Resp. garantiata.

\***Helju Zauram**, instruistino 35-jaro, Estonio, USSR, Haapsalu, Ed. Vilde 2-3, dez. kor. pri pentroarto, literaturo kaj muziko, kun ĉl.

\***Vitas Andriuŝkevičius**, 21-jara fraŭlo, USSR, Moskovskaja obl., Dolgoprudnij, poŝte restante, dez. kor. kun ĉl. pri ĉt kaj kun eksterlandaj litovoj.

\***Familia esp-ista grupo el 7 personoj** dez. kor. kun esp-istaj familioj kaj kun geknaboj ĉiulandaj. Adr.: USSR, Galiĉ Kostromskoj Svoboda Komunloĝejo 20, Spodobina Tatiana (kiu estas la plej juna anino, sesjara, nun kuŝanta malsana kaj dez. ricevi bk, librojn, ktp.)

\***Asen Doĉev**, Prezviter-Grigorij-str. No. 6, Kolarovgrado, Bulgario, radioteknikisto, 30-jara, dez. starigi kontaktojn kun samprofesiaĵoj kaj kor. kun esp-istoj partoprenontaj la 48-an U.K. en Sofio, en Esp. rusa kaj germana.

\***Treddafil Demirev**, Zografaska-str. No. 3, Kolarovgrado, Bulgario, 24-jara tornisto, dez. kor. kun gejunuloj ĉl. pri ĉt.

\***Kina Rajĉeva**, Hristo-Smirnenski-str. No. 18, Kolarovgrado, Bulgario, 26-jara, modlistino en gisejo, dez. kor. pri ĉt. kun ĉl.

\***Japanaj gejunuloj** dez. kor. kun ĉl. Skribu al s-ro Kataoka Tosihiro, 17 Fuyoryo, Kyomati 1-79, Kawasaki, Japanio.

# Libroj Eldonitaj de ĈEL.

## Verkoj de Maŭ Zedong

	P.	Formato- cm.		Rb.	£
<b>Pri Praktiko</b>	24	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-5
			br.	0.09	0- 0-8
<b>Pri Popoldemokratia Diktaturo</b>	24	13.2×18.7	bd.	0.16	0- 1-5
			br.	0.09	0- 0-8
<b>Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong</b>	18	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-3
			br.	0.08	0- 0-6
<b>Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio</b>	30	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-5
			br.	0.07	0- 0-7
<b>Komentarioj pri la Blanka Libro</b>	56	13.2×18.7	bd.	0.20	0- 1-7
			br.	0.13	0- 1-0
<b>Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an</b>	48	13.2×18.7	br.	0.09	0- 0-9
<b>La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj</b>	44	13.2×18.7	br.	0.07	0- 0-7

## Literaturaj Verkoj kaj Aliaj

<b>Ĉina Antologio (1949-1959)</b>	412	23×15.5	bd.	1.20	0-10-0
<b>Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Res- publiko</b>	88	19×26.3	bd.	0.60	0- 8-6
<b>Vivu Leninismo</b>	102	14×20.5	br.	0.16	0- 2-0
<b>Rakontoj pri Fantom-spitantoj</b>	98	12.3×19	br.	0.33	0- 2-7
<b>Laŭdezira Kalkulo de Kennedy</b>	25	13.2×18.7	br.	0.07	0- 0-7
<b>La Okcidenta Ĉambro (bildrakonto)</b>	88	13×18	br.	0.19	0- 1-6
<b>Karpetoj Transsaltis la Drakpordon (kolorpresita bildrakonto)</b>	30	10.2×20.5	br.	0.16	0- 1-3
<b>Knabino kaj Garolo (kolorpresita bildrakonto)</b>	38	17.2×25.3	br.	0.38	0- 3-0
<b>La Kultura Vivo de la Ĉinaj Labo- ristoj kaj Oficistoj (kun 90 fotoj)</b>	72	16.5×18.5	br.	0.25	0- 2-0
<b>Pejzaĝoj de Ĉinio (albumo kun 48 fotoj, el ili 13 kolorpresitaj)</b>	50	24×26.5	br.	0.63	0- 5-0
<b>Piŝoreskaĵoj de Pekino (12 kolorpre- sitaj pk.)</b>			br.	0.13	0- 1-0
<b>Sinjoro Dongguo (bildrakonto adaptita laŭ antikva fablo)</b>	82	19×15			

Mendu ĉe perantoj aŭ Libro-Servo de ĈEL:  
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

\***Dro. Kornel Kussinszky**, Hungario, Pecs, Jokai u. 35.III.46., pri ĉt. precipe pri jurscienco, literaturo, geografio kaj interŝ. bk. kun aziaj kaj afrikaj s-anoj.

\***Dimo Ĵekov Trudoljubov**, Ĵurnalista, str. Strahil 19, Jambol, Bulgario dez. kor. tutmonde pri ĉt. precipe literaturo, teatro, kino, arto, interŝ. revuojn k ĵurnalojn.

## NIA FUNEBRO

Kun granda ĉagreno ni informas, ke k-do Ĝolabio (Caŭ Mejpiaŭ), unu el la aktivaj kaj kapablaj membroj de nia Ligo kaj intima kunlaborinto de nia gazeto EPĈ., forpasis pro malsano la 26-an de marto 1963 en Kantono.

Li esperantistiĝis antaŭ 30 jaroj kaj multe laboris por disvastigo de Esperanto. En la komenco de la 40-aj jaroj li iniciatis la Hongkongan Esperanto-Asocion kaj gvidis E-kursojn tie. Poste li revenis al la patrolando por partopreni la rezistadon kontraŭ japana invado. Samtempe li instruis Esperanton en la lokoj, kie li laboris. Antaŭ 7 jaroj li edziĝis al k-dino Censinio, ankaŭ kapabla esperantistino kaj nia intima kunlaborantino. Ili do fariĝis unu sola esperantista paro de nia movado. Ili ĉiam planis kiel pli multe labori por kaj per Esperanto. Kiu atendis, ke la morto tiel frue lin forrabis de ni.

Ni funebras profunde kune kun k-dino Censinio pri lia morto, kaj samtempe al ŝi ni kore kondolencas.

ĈINA ESPERANTO-LIGO  
REDAKCIO de EPĈ

EL *Propola Ĉinio*

Dumonata Gazeto Eldonata  
de la Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio:

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Libro-Servo de ĈEL:

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

### Enhavo de N-ro 3 (80) 1963

Bildo sur la kovrilo: **Frua Printempo ĉe la Okcidenta Lago**

**Agromonio en Ĉinio**

**Ĝojego en Printempa Festo**

**Novedzina Kunveno**

**La Printempa Foiro en Pekino**

**Notoj en Klasĉambro**

**Mutuloj Komencas Paroli**

**Miaj Vivo kaj Laboroj**

**Vizito al la Domo de Militkaptitoj**

**Nuntempo kaj Pasinto apud la Tenisejo**

**"Li Ŝuangŝuang", Filmo kun Aparta Ĉarmo**

**Pri Mia Filineto**

**Dunhuang**

**"Ministrino pri la Financoj"**

**Bildoj pri Antikvaj Dancoj de Ĉinio**

**Poemoj el Song-Dinastio**

**La Verda Tombo**

**Fablaj Rakontoj**

**La Parfumsaketo de Drakboata Festo**

**Ĉinaj Poŝtmarkoj**

**Strategiisto sur Papero**

**S-ano Hugo Steiner 85-jara**

**Pri la Ortografio de Propraj Nomoj**

**Esperanto Marŝas**

**Skribas Niaj Legantoj**

**Noveloj de Lusin**

**Korespondi Deziras**

Bildo sur la Dorskovrilo: **Atleto**  
(la 194-a kaverno de Dunhuang, el la meza periodo de Tang-dinastio)

\* **Jeĉka Draganova**, Hristo-Smirnenski-str. No. 18, Kolarovgrado, Bulgario, 23-jara poluristino, kun ĉl. pri ĉt.

Eksterlandaj geesp-istoj hazarde vizitantaj nian proksiman mondkonatan pilgrimlokon Lidice, aŭfable notu en la tiean memorlibron siajn impresojn esp-lingve, kaj anoncu sian alvenon ĝustatempe al E-rondeto de SONP, Kladno, CSSR.

\* **Petja Dim. Kraĉeva**, str. M. Rubenova 60, Jambol, Bulgario.

\* **Vjara Lukova Branĉeva**, str. Rakovski 8, Jambol, Bulgario.

\* **Stojan Andreev**, str. Gastivar 36-A, Jambol, Bulgario.

\* **Stojan Dim. Popov**, str. Kiril 10, Jambol, Bulgario.

\* **Georgi Stefanov Nedelĉev**, str. Rakovski 71, Jambol, Bulgario.

\* **Keranka Velĉeva Minĉeva**, str. Komuna 2, Jambol, Bulgario.

\* **Penka Markova Angelova**, str. Mir 25-A, Jambol, Bulgario.

\* **Nina Paskaleva Bratanova**, str. Rodosto 24, Jambol, Bulgario.

\* **Janka Dimitrova Brânkova**, str. G. Dimitrov 72, Jambol, Bulgario. La sekvantaj kuracistoj dez. kor. kun samprofesiuloj el la tuta mondo.

\* **D-ro Dimitâr Kupenov**, str. Sabi Kolev 16, Jambol, Bulgario.

\* **D-ro Georgi Gârdev**, str. Janko Kirĉev 8, Jambol, Bulgario.

\* **D-ro Eduard Gazdov**, str. Rakovski 21, Jambol, Bulgario.

\* **D-ro Trendafil Gramatikov**, str. L. Karavelov 5, Jambol, Bulgario.

\* **D-ro Ĵeljazko Mavrov**, str. Al. Stambolijski 39, Jambol, Bulgario.

\* **D-ro Vasil Brânkov**, str. G. Dimitrov 72, Jambol, Bulgario.

\* **Eber Paŝeko Barboza**, caixa postal 1115, Belo Horizonte, Brazilo, dez. kor. kun ĉl. pri ĉt.





Traktoroj de la komunumo en laboro.



Amuza programero dum la celebra kunveno de la datreveno de kolektiviĝo.

Kreskas nova generacio de edukitaj terkulturistoj en la komunumo, Gaŭ Fuĝeng ricevis licean edukadon.



La pirarboj plantitaj ĉe la komenco de kooperati jam fruktodonas.



Sur draŝejo de la komunumo.



